László Polgár

# Eduku geniulon!



LÁSZLÓ POLGÁR

# EDUKU GENIULON!

Budapeŝto, 2004

*Originala eldono:*
Polgár László: Nevelj zsenit!
Budapest, 1989

*Intervjuis:* Endre Farkas

*El la hungara:*
Jozefo Horvath (Győr)

*La eldonon subvenciis:*
Dr. Elek István

*Eldonanto:*
Polgár Kft.

© Dr. Polgár László, 2004

ISBN: 963 86531 0 8



## ENHAVO

Antaŭparolo ........ 7
I. Misteroj de pedagogia eksperimento ........ 9
1. Anstataŭ enkonduko… La familio Polgár ........ 9
2. Ekiro el la mortopunkto: ĉu heredaĵo aŭ edukaĵo, donitaĵo aŭ ricevaĵo? ........ 14
II. Eduki eblas ankaŭ tiel ........ 19
1. Pri la nuntempa lernejo ........ 19
2. Ĉiu infano estas promeso ........ 23
3. Genio: ĉu trezoro aŭ balasto? ........ 31
4. Ĉu la infano fariĝu elstarulo? ........ 40
5. Esperanto: unua stadio de lernado de fremdaj lingvoj ........ 48
III. La ŝako ........ 53
1. Kial la ŝako? ........ 53
2. Kiel la Polgár-fratinoj ellernis ŝakludi? ........ 60
3. Kiel ni ŝatigu la ŝakludon al niaj gefiloj? ........ 70
4. Ŝako en psikologio, psikologio en ŝako ........ 75
5. Pri la emancipiĝo de virinoj ........ 80
IV. La senco de la tuta afero ........ 88
1. La familio kiel valoro ........ 88
Ekzemplo de s-ino Polgár Klára: Fadeno iras, kien kudrilo ĝin tiras ........ 95
2. En minoritateco ........ 100
3. Ĉefatestantoj de la geniedukado: la feliĉaj infanoj ........ 105
4. Estu via vivo etika modelo ........ 114
Biografio de Polgár László ........ 120
Pli novaj konkursrezultoj de la Polgár-knabinoj ........ 121
Bildoj ........ 123
Aperintaj libroj de László Polgár ........ 145

## ANTAŬPAROLO

*Genio = laboro + bonŝanco*

*Feliĉo = laboro + bonŝanco + amo + libero*

Ĉi tiu libro mia aperis hungare en 1989. En ĝi mi priskribis, resumis miajn psikologiajn, pedagogiajn eksperimentojn pri miaj filinoj kaj 15-jarajn instruistajn spertojn.

Mi donas ne recepton, nur vidmanieron. Volas neniun persvadi eduki geniulon. Mi volis demonstri, ke eblas eduki geniulojn. Neniun mi alvokas, neniun mi kuraĝigas, ĉiu devas mem decidi, kion li volas fari, mi nur transdonas mian pedagogian sistemon, kaj kondukas ĉiujn tra la vojo, kiun mi trairis kun la certeco, ke eblas kaj ankaŭ valoras eduki geniulojn, ĉar ili povas fariĝi kaj ja fariĝas feliĉaj homoj.

Miaj filinoj plenkreskis. Nun ili jam edukas siajn gefilojn praktikante samtempe sian profesion. Ili volas eduki ĉi tiujn tiel kontentaj, kreemaj kaj feliĉaj homoj, kiel ili mem estas.

La edukado per mia koncepto estas bona por la individuo, dezirinda kaj utila por la socio. Geniulo estas kolektivulo, kion li kreas, fariĝas komuna trezoro.

Ni ne timu eduki optimisme kaj kuraĝe niajn gefilojn (sen domaĝi ankaŭ la materialajn elspezojn!). Mirinfanoj ne estas mirakloj, sed naturaj fenomenoj, ja naturaj fenomenoj ili devas fariĝi. Por la disvolviĝo de la kapabloj de la infanoj respondecas la gepatroj kaj la socio. Amasego da geniuloj perdiĝas tiel, ke ili mem neniam ekscias, je kio ili estus kapablaj.

Nia eksperimento, nia programo kaj vivovojo jam multfoje ripetiĝis laŭ spontanea maniero dum la fluo de la historio (vidu precipe la infanaĝan etapon de la geniula vivovojo). Ni volis nur konsciigi ilin kaj klopodis per tio levi al teoria alto.

Mi deziras al vi sukcesan infanedukadon!

*Budapeŝto, 2004*

La Aŭtoro

# I. MISTEROJ DE PEDAGOGIA EKSPERIMENTO

## 1. ANSTATAŬ ENKONDUKO... LA FAMILIO POLGÁR

„Se mi ne estas por mi – kiu do estas por mi; sed se mi estas nur por mi – kial mi vivis?"

Talmudo

„Neniu estas profeto en sia urbeto."

Proverbo

„La vero estas tre ofte persekutata, sed neniam neniigebla."

*T. Livius*

*– Se en la 50-aj aŭ 60-aj jaroj, ie en Okcidenta Eŭropo iu diris: „Mi estas hungaro", la unua reago de la ĉirkaŭaĵo sonis verŝajne jene: „Ĉu hungaro?! Tiam Puskás kaj futbalo... kaj 6:3...", kaj tuj malfermiĝis la pordoj de interkomunikado. La unua reflekso je la fino de la 80-aj jaroj estas plejofte: „la Polgár-fratinoj... kaj ŝako... kaj Olimpiaj Ludoj en Seulo..." Kiel vi travivas ĉi tiun nekutiman popularecon?*

– Okazis ankaŭ al ni, ke en Okcidento oni ne sciis, kiuj ni estas, kaj oni komencis paroli pri „*Polgár*-oj kaj *Rubik* Ernő". Oni miris kaj samtempe ĝojis eksciinte, ke ni estas tiuj *Polgár*-oj. Ni estas „la hungara miraklo, la tri fratinoj, la mondfamaj infanoj". Ĉirkaŭ 40 000 laŭdaj artikoloj aperis pri ni. Oni skribis pri ni kompreneble ankaŭ malfavore, precipe en Orienta Eŭropo.

*– Eble ne ĉiam malbonvolo kaŝiĝas malantaŭ la rezervoj kaj duboj. Ĉu ne temas pri tio, ke oni timas: vi traktas viajn infanojn kiel ŝakfigurojn, marionetojn?*

– Se ni konsiderus niajn filinojn kiel manipuleblajn figurojn, nur kiel objektojn kaj ne kiel subjektojn de la edukado, ĉu ni povus atingi tiajn rezultojn? Sen la aktiva kunlaboro de ilia malfermita, libere decidanta kaj memstare aganta personeco ni povus atingi nenion. En tia edukado la aktiva partopreno de la infano almenaŭ tiom gravas, kiom tiu de la edukanto. Se ili ne volus kunfari, ili fariĝus vere marionetoj, sed el marionetoj ne edukeblas geniuloj. Mi ne forprenas, sed kontraŭe: mi donas la eblon por tio, ke la

infanoj atingu la liberecon je laŭeble plej alta nivelo. Mi malfermas pordojn al la libereco. Praktike mi kreas la ŝancon, por ke ili faru tion, kion ili ege ŝatas. Krom tio mi priservas, psike flegas, fake manaĝas ilin; mi ebenigas por ili la vojon. Ne miskomprenu min! Dum la pasintaj 20 jaroj okazis ankaŭ, ke mi diris: „Vidu, infanoj, tion oni devas tiel fari!" Sed tio ne estis karakteriza. Tio konsistigis maksimume unu procenton, ĉar preskaŭ ĉiam komune ni priparolis ĉiujn aferojn, kaj mi lasis ilin decidi. Tutcerte ili ja ne estas marionetoj. En la tradicia lernejo la infanoj iagrade certe fariĝas marionetoj: frumatene oni vekas, sendas ilin en la lernejon, kie ili dum la instruhoroj estas tirataj kaj ŝovataj kaprice de la instruistoj kaj membroj de la samaĝa grupo.

– *Multo veras en tio. Tial okazas, ke sesjara infano en septembro ĝoje trapaŝas la sojlon de la lernejo, sed Kristnaske jam ne multe restas el lia ĝojo. Mi kredas al vi, ke kreivan homon oni ne povas formi sen memagado, kaj kontraŭ ilia volo ankaŭ viajn infanojn oni ne povus konduki ĝis la pinto. Tamen el tio ankoraŭ ne sekvas, ke tia infano fakte fariĝas feliĉa, aŭ ke li restas kontenta dum sia vivo.*

– Ne, kaj mi neniam diris, ke ĉiuj elstaruloj logike iĝas feliĉuloj. La atingopovo kaj sintaksado de la homo ne koincidas nepre. Povas okazi, ke iu samtempe estas genia kaj malfeliĉa. Senĝoja, ĉar lia vivo estas malfacila, ĉar la medio ne akceptas lin, ĉar li ne sukcesis atingi ian celitan esplorrezulton, ĉar certaj liaj aferoj disvolviĝis misŝance ktp., sed samtiel povas okazi ankaŭ la kontraŭo. Tiuokaze la geniulon akceptas lia medio, kaj li estas kontenta pri si, ĉar povas fari pozitivan saldon pri sia vivo, ĉar utilas al siaj kunhomoj kaj atingas sukcesojn. Tiam el ĉio ĉi fontas feliĉo. Ne estas hazarde, ke demandante ,,malfacilan homon", ĉu li refoje same aranĝus sian vivon, ni plej ofte ricevas la respondon: „Jes". Tio ja ne povus esti alimaniere: geniuloj estas almenaŭ samtiel feliĉaj, kiel la ceteraj homoj.

Mi ne asertas, ke la vojoj al genieco kondukas nepre ankaŭ al feliĉo, sed jes ja , ke ĝi kondukas tien pli certe, ol aliaj. Kio koncernas konkrete miajn filinojn, ili konfirmas – dank' al Dio – ĉi-lastan aserton. Tiuj, kiuj opinias kontraŭe, verŝajne ne havas sufiĉe da informoj, aŭ eble envias aŭ ĵaluzas. Miaj filinoj estas fakte kontentaj, gajaj, feliĉaj homoj. Tiuj, kiuj konas ilin persone, povas konfirmi tion.

– *Permesu al mi nun demandi pri personaj aferoj. Kian vivkoncepton, kian mondkoncepton vi havas?*

– En la jaro 1968 aŭ '69, en la aĝo de 22–23 jaroj mi aniĝis al la komunista partio, kaj 35-jara (ĉirkaŭ 1981) mi eksiĝis – ĉefe pro mia konflikto kun la Hungara Ŝak-Asocio. Mi havis problemojn unuavice ne pri



la teorio de marksismo, kvankam pri multaj aferoj mi neniam konsentis. Mi ne konsentis ekzemple pri tio, ke nek sian movadon, nek la socion ili konstruis demokratie. Mi ne konsentis ankaŭ pri ilia praktiko de edukado kaj pri tio, ke ili fakte kondamnis la geni- kaj elitinstruadon. Mi ne konsentis pri tio, ke ili neglektis la instruadon de politikaj geniuloj kaj elito. Mi ne konsentis ankaŭ pri tio, ke ili ne anstataŭigis la netaŭgajn, maljunajn gvidantojn per junaj kapabluloj.

Kio koncernas mian vivkoncepton: mia labortempo ekde mia 14-jara aĝo estas 15 horoj tage. Por mi la kvalito estas principa afero. Mi volis fari ĉion, ĉiam plej altnivele. La mezkvalitecon, la orientiĝon al la mezo mi rifuzadis laŭprincipe. Mi strebis al la pinto malgraŭ obstakloj, obeante la admonon de Michel *de Montaigne:* „Dum granda tempesto la maristo de l' antikvaj epokoj alvokis Neptunon: Ho, dio! Vi savos aŭ pereigos min, tute laŭ via volo. Sed kiel ajn vi volas, mi stiros mian ŝipon, kiel necesas!"

– *Kia homo vi opinias vin?*

– Homo, kiun formis lia medio, sorto, la socio kaj li mem. Se mi pense trarigardas mian vivon, mi povas dedukti el ĝi mian karakteron, miajn ecojn. Se mi ekzamenas la trajtojn de mia personeco, mi povas rekonstrui mian sorton. Ĉar ili interefikas. Kompreneble troviĝas en mi ankaŭ t.n. etnaj distingiloj, kiel ekzemple la trostreĉita laboro, trosentemo, sopiro al atingoj, centra rolo de la familio, deziro disvolvi la kapablojn de miaj filinoj, kaj de tempo al tempo eble ankaŭ iom da agresemo, bruemo. Sed ne miskomprenu min! Mi ne asertas, ke mi ŝatas ilin ĉiujn, kaj mi ne asertas, ke mi volis disvolvi ilin en mi. Nur ke ĉi tiujn karakterizaĵojn elformis en mi praktike la sociaj efikoj.

Influis min ankaŭ la atakoj, kiuj trafis min flanke de aŭtoritatoj. Mi konfliktiĝis kun multaj homoj. Ĉi tiuj influoj, kvankam ili certe ankaŭ konstruis, pozitive formis mian personecon, malbonigis en certaj rilatoj la efikecon de mia laboro kaj mian sanon. Tre multe
mi laboris dum la pasintaj 25 jaroj. Tre malmulte mi dormis. Sekve de tio nun jam mi sentas iom da laceco.

– *De fojo al fojo oni akuzas vin: vi obstinas, vi ne estas sufiĉe diplomateca, kelkaj eĉ opinias vin agresema. Kion vi pensas pri tio?*

– Laŭ mi, persistemo kaj konsekvenceco ne egalas al obstino. Sentemo pri problemoj kaj dinamismo ne egalas al agresemo. Tamen niaj sociaj kondiĉoj preskaŭ provokis el ni agresemon. Kiel virton mi konsideras, ke mi ne akceptis senprincipajn kompromisojn. Kompreneble mi ne opinias min perfekta, kaj en kelkaj kazoj mi certe estis jen obstina, jen eĉ agresema, sed oni devas scii, ke agresemo estas tre ofte sekvo de frustriĝoj, kaj da ili –

mi kredas – ni ricevis abunde. La agreseman sintenon karakterizas malamikema, provoka, perforta, ataka kondutmaniero, kaŭzanta dolorojn kaj damaĝojn. Tio absolute ne validas pri mi aŭ ni.

Mi volis esti persistema kaj konsekvenca, sed ne obstina. Mi volis progresi al la starigita celo. Mi klopodis ne tro zorgi pro obstakloj, aŭ provis venki ilin. Mi klopodis resti fidela al miaj humanismaj principoj malgraŭ malfacilaĵoj kaj mizeroj, pasiva kaj aktiva „kontraŭstaro", apertaj aŭ kamuflitaj atakoj. En kelkaj okazoj oni faris ĉion – almenaŭ tiel ŝajnis al ni – por tute neniigi nin kiel homojn. Tio trafis nin unuavice kaj rekte flanke de *Szerényi* Sándor (unua sekretario de la komunista partio inter 1929–31, iama vicestro de la kultura kaj scienca sekcio de la Hungara Socialista Laborista [komunista] Partio, prezidanto de la Hungara Ŝak-Asocio dum pluraj jardekoj), duavice kaj nerekte – kiel tio evidentiĝis el lia antaŭnelonga deklaro – flanke de *Kádár* János (estinta unua sekretario de la komunista partio, iama prezidanto de la Ŝak-Asocio). Ili verŝajne ne povis pardoni min pro mia pensmaniero, konstruita sur humanismo kaj juĝata kiel tro aŭdaca, kaj pro mia eksiĝo el la komunista partio. Tiutempe, jam ĉe nia dua renkontiĝo *Szerényi* akceptis min, eĉ ne salutante, per jenaj vortoj: „Vi estas fripono, anarkiisto" – kaj poste sekvis la minacoj. Post tio longajn jarojn ni ne rajtis veturi eksterlanden. Por povi elveturi al Okcidento ni ricevis pasporton nur en 1985. *(Zsuzsa tiam okupis jam la unuan lokon en la tutmonda ranglisto de ŝakistinoj.)* Estas karakterize, ke dum iu tiama gazetara konferenco *Szerényi* Sándor asertis: „*Polgár* László estas laŭ kuracista opinio ne tute normala homo." Se ni ne atingus kun eksploda rapido la internacian avangardon, se ni ne tiom disfamiĝus, nia kariero estus povinta finiĝi ankaŭ tragike.

Laŭ mi ne veras, ke mi estas kverelema, malpacema, agresema, monavida, perfortema homo. Mi opinias min honesta, sincera, klaravorta homo, tre sentema je justeco. Mi havas grandan liberamon, scisoifon. Mi tre ĝojas, ke laŭ mia scio mi trompis neniun. Pri mia laboro mi starigas tre altajn postulojn, kvankam mi komprenas ankaŭ tiujn homojn, kiuj vivas alimaniere. Aliuloj eble konsideras min maksimumulo, sed mi preferas nomi min realisto optimisto.

*– La esenco de via pedagogia sistemo estas eduki geniulojn kaj feliĉulojn. Demandante vin pri vi mem, mi ne povas ne scivoli pri via opinio, ĉu vi konsideras vin geniulo?*

– Mi povas diri nur, ke mi kreis ion, kion ĝis nun neniu kreis. En ĉi tiu senco eble: jes.

*– Ĉu vi estas feliĉa?*



– Ĉi tiu demando surprizis min, sed mi kredas, ke jes. Mi havas belan familion, feliĉan geedzecon, tri belajn, sanajn, feliĉajn, inteligentajn infanojn, kaj mi sentas krome, ke en mia laboro mi povas ĝui la ĝojon de kreado, ĉar mi efektivigis ion, kio restos daŭre. Mi kredas, ke mi estas feliĉa.

## 2. EKIRO EL LA MORTOPUNKTO: ĈU HEREDAĴO AŬ EDUKAĴO, DONITAĴO AŬ RICEVAĴO?

„Mi ne kredas je genio, nur je persista, brava laboro."

M. *Reger*

„Iu ajn povas atingi mian nivelon, se li tiel diligentas, kiel mi dum mia tuta vivo."

J.S. *Bach*

„Ĉiu neplenumita afero ŝajnas nerealigebla al tiuj, kiuj ne kapablas je grandaj aferoj."

J.F.P. *Retz*

– *Probable ankaŭ viaj objetantoj scias aŭ sentas, ke laŭ sia esenco la ŝakludo estas por vi nur rimedo, kiun vi uzas por realigi gravan, oni povus diri kulturhistorian celon. Kio do estas la esenco de via eksperimento kaj kiu filozofia problemo kuŝas en ĝi?*

– La esenco de mia pedagogia programo estas, ke laŭ mi el ĉiu sana infano edukeblas elstara homo, laŭ mia vortuzo, geniulo. Siatempe, kiam ni komencis ĉi tiun laboron kun mia edzino, ni tralegis amason da libroj kaj studaĵoj. Ni ekzamenis la infanaĝon de multaj eminentuloj kaj rimarkis, ke ĉiuj, kiuj iĝis geniuloj, tre frue specialiĝis pri iu kampo, kaj ni povis dokumenti ankaŭ, ke apud ili ĉiam staris patro aŭ patrino, pedagogo aŭ trejnisto „obsedita" – en la bona senco de la vorto. Do ankaŭ surbaze de niaj esploroj ni povis prave konkludi, ke geniulo ne naskiĝas: oni devas eduki lin. Kaj se eblas eduki elstarulon, ni devas nepre provi tion. Ni tiel faris, kaj nia provo alportis sukceson.

Finfine mi volus pruvi, ke la socianiĝo, ensocia disvolviĝo kaj kadre de tio la geniuliĝo de homo dependas unuavice ne de liaj denaskaj biologiaj fortoj; lia vivovojo ne estas antaŭdecidita ekde la naskiĝo, ĝi konsiderendas precipe kiel socia produktaĵo, konkrete: rezulto de edukado. Provoke esprimante, mi kutime formulas: geniulo ne naskiĝas, geniulo edukiĝas.

Per mia tuta sistemo mi volus pruvi ĉi tiun penson, kaj mia tuta vivo, miaj antaŭaj studoj, faritaj eksperimentoj, planoj por la estonto – ĉiuj direktiĝas al tio. Kvankam la ŝakrezultoj de miaj tri filinoj en pedagogia senco jam konvinke pruvis la pravecon de mia eksperimento, tamen mi ne asertas, ke ĉi tiu rezulto povus hodiaŭ decidi sola la plurmiljaran filozofian demandon, kiel interrilatas la denaska donitaĵo kaj la akirita ricevaĵo, se konsideri la naturan kaj samtempe socian karakteron de la homo.



Pri la pedagogiaj konsekvencoj de mia teorio mi certas, sed la ĝeneralajn filozofiajn koneksojn, kuŝantajn malantaŭ mia eksperimento, eĉ mi mem ne entreprenas definitive decidi. Ĉi-rilate, se uzi la vortojn de *Wallon*, mi diras nur: mi ne povas doni definitivan solvon, mi povas nur indiki direkton.

En la nunaj diskutoj inter filozofio kaj genetiko, ankoraŭ neniu starpunkto venkis. El ĉi tiu situacio mi volus elturniĝi per agadprogramo.

Mi pledas por la socieco, kaj povas aserti, ke sur ĉi tiu hipotezo konstrueblas kohera sistemo, sur kiu la pedagogio povas meti fide sian bazon, kaj pasante laŭ ĝi, kiel ankaŭ mia eksperimento pruvas, atingi sukceson.

– *Estas grava agnosko de via sukcesa eksperimento, ke vi estas invitita fariĝi protektanto de la sekva kongreso de la Eŭropa Societo por Talento en 1990 en Budapeŝto. Ankaŭ en la ĉi-jara kongreso de la societo en Zuriko bone senteblis la nedecidita diskuto, pri kiu vi pli frue parolis. Ekzemple Sebastian Coe, dufoja olimpia ĉampiono diris: pri la talento respondecas la socio. La mondfama fizikisto Manfred von Ardenne opiniis, ke la talento estas ne merito, sed donitaĵo. La prezidanto de la Monda Konsilio pri Talento, Harry Passow asertis: la talento estas eblo – talenta estas infano, se ni, edukantoj nomas lin tia.*

– Ĉe la disvolvo de mia sistemo mi eliras el du faktoj. Unuflanke el tio, ke la nuntempa genetiko scias ankoraŭ tre malmulte pri la homo; kion ĝi scias, tio rilatas unuavice al malsanoj. Aliflanke el tio, ke sana homo havas tiel elastan cerbosistemon kaj flekseblan genostrukturon, ke ĝia efikeco altagrade evoluigeblas per pedagogiaj rimedoj. La vojo antaŭ la pedagogio tiurilate estas libera, la infano estas evoluigebla, kaj el la vidpunkto de la intelekto li formeblas iel ajn. (La elstara hungara verkisto *Illyés* Gyula notis en sia taglibro pri la ĝenerale konata angla flegmo: „La angloj estas angloj sekve de siaj lernejoj, eĉ sian faman flegmon ili havas de tie, ne el la patrina utero.")

La usona psikologo J. B. *Watson* emfazis memfide jam antaŭ pluraj jardekoj: se li ricevus dekkelkon da sanaj beboj, li povus eduki ilin laŭdezire tio, kion oni postulas de li: scienculoj aŭ krimuloj. Sekvante la saman koncepton, la soveta psikologo V. *Turĉenko* opinias: „Estas pli ĝuste ne diri, ke geniulojn oni malofte naskas, diru prefere, ke geniulojn oni malofte edukas." Mi mem inklinas al la psikologia-pedagogia optimismo de *Watson, Turĉenko,* la japana psikologo *Sunigi* Suzuki kaj la aŭstra psikiatro A. *Adler;* ĝuste pro tio mi komencis disvolvi kaj esplori la kapablojn de miaj tri filinoj. La platon por tio mi jam ellaboris antaŭ ilia naskiĝo. Menciendas cetere, ke ekzistas t.n. talento-formadaj, geniul-edukaj lernejoj en Japanio, Israelo, GDR, Usono ktp. (ekz. la „Superbeba Farmo de Glenn *Doman* en Filadelfio).

Tiuj pensuloj, simile al mi, opinias, ke averaĝulo utiligas nur 20...25 procentojn de sia cerbopovo, kvankam ties kapacito ekspluateblus multe pli efike. La homo havas eblon utiligi sian cerbon de 1300 gramoj multe pli, ol 20–25%, sed oni devas tre frue komenci labori tiucele. La teamo de Glenn *Doman* konsideras la aĝon de tri jaroj la lima tempo, kiam la korpa, spirita kaj kreiva evoluo de infano ankoraŭ rimarkinde akceleblas. Ankaŭ mi proksimas al ĉi tiu starpunkto, sed la tempolimon mi traktas pli elaste.

– *Ankaŭ inter la hungaraj fakuloj troviĝis, kiuj pozitive pritaksas vian programon. Ekzemple d-ro Harsányi István, la eminenta hungara eksperto pri talentoesplorado jene aprecis vian laboron en la Hungara Radio (1986-07-12): „Laŭ mia konvinko, la eksperimento de la familio Polgár estas la plej grava hungara psikopedagogia eksperimento dum la miljara historio de nia ŝtato. (…) Tion mi kredas sen rezervoj... Watson ne povis pruvi siajn instruojn en la praktiko, ĉar li neniam ricevis tiun dekon da sanaj suĉinfanoj... Ĝuste pro tio mi konsideras ĝin la plej grava hungara psikopedagogia eksperimento, ĉar kun granda sukceso estas aplikataj la Watson-aj principoj; kaj ankaŭ pro tio, ke temas ne nur pri unu, sed tri infanoj. Tio fakte prezentas la plej interesan kaj fortan pruvon de la tuta afero. Ja kiam deduktiĝis el ajnaj genetikaj eksperimentoj, ke ili devas idente heredi la samajn kapablojn? Tutcerte neniam!... Tiu ĉi eksperimento tio estas aparte gravega eĉ pro la fakto, ke laŭ mia kono ĝis nun neniam doniĝis eblo eksperimenti tiurilate."*

– Prave. La specifeco de mia eksperimento kuŝas en tio, ke ĝi estas – oni povas diri – familia grupeksperimento, kiun ebligis la naskiĝo de miaj tri filinoj. Sur ĉi tiu rezulto mi konstruas mian pedagogian optimismon. Surbaze de tio mi opinias: el ĉiu biologie sana infano edukeblas geniulo, ĉiu sana infano naskiĝas kun tiom da ĝeneralaj donitaĵoj, ke el li povas iĝi personeco de ajna nivelo. Laŭ biologia senco ne staras baroj antaŭ la evoluo de la personeco.

– *Tio do estas la elirpunkto. Ĉu vi resumus laŭteze la bazajn principojn de via koncepto, por ke ni povu poste pridiskuti ilin aparte kaj detale?*

– Miajn pensojn mi resumus en kvin tezoj.

*1.)* La unua rilatas al la tradicia diskuto pri la rolo de naturaj kaj sociaj, denaskaj kaj akiritaj, hereditaj kaj „edukitaj" faktoroj. Antaŭ ĉio, mi eliras ĉi-koncerne ne el du, sed el tri faktoroj. La personecon de la homo mi konceptas kiel kompleksan unuon de tiuj tri faktoroj. En la personeco samtempe troviĝas *(1)* biologie kunnaskitaj *donitaĵoj*, *(2) ricevaĵoj*, akiritaj historie dum lia vivo kaj *(3)* respondaĵoj elbatalitaj kaj „elŝvititaj" de li mem. Tio estas, la valoron de la personeco konsistigas tri onoj: la interefika



triopo de donitaĵo, ricevaĵo kaj respondaĵo. La personeco estas do samtempe:

- donitaĵo de la naturo,
- efiko de la medio kaj
- kreaĵo de la individuo.

Ene de la triopa unuo mi konsideras decida ĉenero la efikon de la ĉirkaŭaĵo, de la socio. Prave, depende de la aĝo ĉiu el ili havas malsaman rolon: en la vivokomencaj monatoj plej regas la biologia efiko, dum la unuaj dek jaroj sendube la socio akcentiĝas ĉiam pli, poste jam plifortiĝas la propra aktivado de la personeco. Sed el la vidpunkto de la disvolvo kaj libereco de la personeco decida ĉenero montriĝas tra la tuta tempofluo lia socianeco.

*2.)* La sekva tezo rilatas al la interpretado de la socianeco. Ene de ĝi mi elstarigas du aspektojn. Unuflanke la tujapudan ĉirkaŭaĵon de la persono (familio, amikoj k.s.), aliflanke liajn pli distajn cirkonstancojn. La unua efektivigas la per-modelan „heredon", la dua la socian-kulturan „heredon". La homon do determinas krom la biologia heredo ankaŭ la efiko, la modelo de la familio kaj la historia-kultura „heredigo" fare de la pli vasta socio.

La socianeco apartenas al la naturo de la homo. La individuo mem travivas sian disvolviĝon sub la efiko de la sociaj fortoj kiel *memrealigon***.** El tio sekvas, ke la edukado devas konsideri la infanon ankaŭ kiel *kunaŭtoron***.**

*3.)* La tria tezo rilatas al la vojo disvolvi la kreivon. Mi opinias, ke ĉiu sana homo naskiĝas kun sufiĉaj biologiaj donitaĵoj, por povi specialigi tiun ĝeneralan donitaĵon en iu konkreta agadformo. Malsame al multaj aliaj pedagogoj kaj gepatroj, mi vidas la taskon de la edukado ne en tio, ke ni esploru kaj trovu en la infano la „donitan" aŭ kaŝitan kapablon. Supozante la ekziston de ĝenerala donitaĵo ĉe ĉiu infano, mi eliras el tio, ke ni devas eduki en li ian specialan kapablon.

– *Foje mi aŭdis vian replikon al rimarkigo de pedagogo, laŭ kiu geniulo naskiĝas kaj ne edukeblas. Vi respondis sarkasme: pli facilas ne eduki, ol eduki geniulon.*

– Jes, prave. Laŭ mia baza principo ĉiu infano naskita sana estas potenciale genia, kaj se oni sufiĉe okupiĝas pri li, li fakte iĝas tia.

*4.)* Mia sekva tezo estas, ke oni povas kaj devas konscie organizi la disvolvon de geniuloj, kaj ne sufiĉas cedi ĝin al la hazardo.

Memkompreneble, la edukado en si mem ne estas ĉiopova, ĉar ĝi dependas ankaŭ de la konkretaj sociaj kondiĉoj. Sed tion, ke ĝia efiko estas enorma, empirie pruvis miaj rezultoj.

Paralele al la diferencaj respondoj al la menciitaj biologiaj, genetikaj kaj filozofiaj demandoj, pri la rolo de la edukado konturiĝis – inter du ekstremoj – pluraj tendencoj en la pedagogio. Unu ekstremo estas la teorio de liberlasado. Ĝiaj reprezentantoj opinias, ke la kapabloj en la homo manifestiĝas eĉ tiam, se nenio estas farata tiucele. Laŭ tio, la tasko de la pedagogio estas lasi libera, kio jam ekzistas; en plej bona okazo oni nur ebenigu la vojon por tio. Ĉi tiu koncepto ofte citas la elstaran romian pedagogon *Quintilianus* (35 – 96 a.Kr.): „La instruanto devas esplori la denaskajn inklinojn kaj adaptiĝi al ili, ĉar kontraŭ la naturo ni ne povas agi."

Al ĉi tiu tendenco oponiĝas la tendenco, kiu asertas la ĉiopovecon de la edukado. Ĝi citas interalie la francan filozofon C.A. *Helvetius* (1715–1771), kiu diris: „La edukado ĉion venkas. Donu al ni la edukadon, kaj ni, dum ne pli ol unu jarcento, ŝanĝos la karakteron de Eŭropo."

Kvankam en la penso de *Helvetius* multo veras, kaj sur individua ebeno ankaŭ mi proksimas al lia koncepto, tamen en sociaj dimensioj mi neniel povas konsenti kun li. Ja fakto estas ankaŭ, ke la pedagogia efiko staras sub la influo de la socia medio: kaj kia estas la socia bezono, postulo, tia fariĝas la ĝenerala praktiko de la edukado.

*5.)* Mia kvina tezo estas la pedagogia humanismo, laŭ kiu la esenco de la formado de personeco estas strebado al la laŭeble plej perfekta memrealigo kaj plej kompleta feliĉo. Ĉiu homo strebu atingi la plej grandan rezulton, atendeblan de li, kaj realigi sin mem – tio povas alporti lian feliĉon kaj ankaŭ tiun de aliaj. Al la pedagogio taskas ankaŭ, ke ĝi celu – kie tio eblas – ne la averaĝon, sed la pinton. Taksante pozitive la elstarajn atingojn, ĝi fiksu kiel finan celon por si la homan feliĉon. Geniulon nome eblas kaj necesas eduki interalie tial, ke tio garantias la plej certan vojon al feliĉo.



# II. EDUKI EBLAS ANKAŬ TIEL

## 1. PRI LA NUNTEMPA LERNEJO

„La homa historio estas konkuro inter katastrofo kaj edukado."

H. G. *Wells*

„Ni sukcesis transformi unu el la plej ĝojigaj homaj agadoj en dolorigan, tedan, spirit- kaj animkonsternan sperton."

J. *Hill*

„Pasante sur sia vojo, la lamulo forlasas la hezite aventureman rapidpiedulon."

J.F. *Bawes*

*– Estas ĝenerale konate, ke vi estas „pedagogi-maniulo", tamen vi ne donis viajn filinojn en lernejon; ili faris siajn studojn kiel privataj lernantoj. Kial?*

– La fakto, ke mi ne sendis la infanojn al lernejo, koneksas kompreneble kun tio, ke mi opinias pri ĝi malfavore. Mi riproĉas al la nuntempa lernejo, ke ĝi edukas ne por la vivo, egaligas tre je tre malalta nivelo, krome ne toleras talentulojn kaj tiujn, kiuj diverĝas de la averaĝo.

*– Ni iru laŭvice, kaj komencu per via unua rimarko: la lernejo edukas ne por la vivo. Vane do asertas la antikva latina diraĵo: „Oni lernas ne por la lernejo, sed por la vivo"?*

– La nuntempa lernejo apartiĝis de la vivo tiom, ke ĝi funkcias kiel iaspeca laboratorio. Mankas la ligo inter mastrumado, politiko, loka publika vivo, ĉiutagaj zorgoj de la vivtenado unuflanke kaj la lernejo aliflanke.

Miaj filinoj, kiuj ne vizitis lernejon, kreskis multe pli ene de la vivo. La nuntempa lernejo ne ŝatigas lernadon. Ĝi ne instigas al grandaj atingoj, edukas nek aŭtonomulojn, nek kolektivojn.

La lernejo ne manifestigas, ne disvolvas la potencialajn kapablojn en la homoj, almenaŭ ne tiom, kiom ĝi povus.

*– Ŝajnas al mi, ke al tio rilatas ankaŭ la dua punkto de via lernejkritiko. Nome, ke la lernejo egaligas je tre malalta nivelo. Kiel vi klarigas tion?*

– La afero estas tre simpla. Se tutlande ekzistas lernejoj de nur unu tipo, la modelo aspektas jene. En ĉiu lernejo troviĝas krom kelkaj eminentuloj multaj mezuloj kaj ankaŭ malfortuloj. La mezuloj pli proksimas al la

malfortuloj, ol al la tre eminentaj. La instruisto kompreneble ne povas adaptiĝi al tiuj kelkaj eminentuloj, do la instrumaterialon li prezentas tiel, ke ĝi konvenu por la plimulto. Sekve, por la eminentuloj la instruhoroj fariĝas tedaj. Eĉ se la instruisto volus, pro la granda nombro da lernantoj en la klasoj li ne kapablus „tajli" la lernmaterialon laŭ individuaj bezonoj, li do ne povas laborigi ĉiun infanon laŭ ties kapablo. Tro ofte li devas laborigi la tutan klason mekanike ripetigante pli-malpli identajn taskojn. En la nuna organiza strukturo oni nur parolas pri instruado provizanta problemsolvajn konojn, sed efektive tio ne realigeblas. Tial en la lernejo suferas kaj la pedagogo, kaj la lernantoj.

*– Ni transiru al via tria riproĉo. Kiom perturbas la nuntempa lernejo la evoluon de talentaj infanoj?*

– Ĝi malhelpas la evoluon de talentuloj pro tio, ke la lerneja instruado estas teda por ili. Oni pruvis, ke subŝarĝado estas pli laciga, ol optimuma ŝarĝo. Krome, la nuntempa lernejo ne toleras la psike elstarajn infanojn, kaj la grupo eĉ diskriminacias ĉiujn, kiuj diferencas de la averaĝo. Ne senkaŭze skribis la hungara poeto *Kosztolányi* Dezső, kiam li adiaŭis sian filon ekirontan en la lernejon: „Mia mano ankoraŭ stumbladas sur via kapo; mi lasas vin foriri, kvankam mi sentas, ke mi ĵetas vin en kaĝon de tigroj." Ankaŭ la fakliteraturo atestas pri tio, ke la nuntempa lernejo estas malavantaĝa por la elstare kapablaj infanoj.

Ĉe multaj talentaj infanoj aperas simptomoj de malsanoj pro lernejaj damaĝoj (sendormemo, diversaj specoj de kardiopatio, kapdoloroj, stomak-doloroj, neŭrozoj kaj psikozoj). Plej ĉagrenas, ke la infanoj elkomunumigas ilin. Permesu al mi mencii kiel kuriozaĵon: famuloj ofte fiaskis en lernejo. Thomas *Mann* fiaskis trifoje dum siaj lernejaj studoj, Albert *Einstein* estis taksata tre malbona fare de siaj instruistoj. En lia lerneja atestilo ili notis: li pensas malrapide, estas malpacema, obsedita de stultaj revoj. Pri Robert *Röntgen* oni konstatis, ke li estas „ekstreme sentalenta". Pri James *Watt* oni opiniis, ke li estas „pezeca kaj malsaĝa" ktp.

Clement *Lanny* kaj liaj kolegoj, kiuj studis la lernejan agresemon, kolektis plurajn ekzemplojn pri tio, kiel senindulgaj, kelkfoje ekstreme senindulgaj estas la infanoj en lernejaj grupoj.

La lernejaj grupoj estas ankoraŭ tre malstabilaj, la periferiaj infanoj metiĝas sub influon de amassugestio; sufiĉas, ke la estro de iu aŭ alia grupo, eĉ pro bagatela kaŭzo, sentu antipation al iu grupano. Ankaŭ la fama usona infankuracisto Benjamin *Spock* mencias, ke oni facile brulstampas elstare kapablajn infanojn „strebaĉulo", „fervorulĉjo" ktp. Kaj la malfeliĉulo tuj fariĝas boksopilkoj por la grupo, ofte tra pluraj monatoj. Ankaŭ la hungaraj



psikologoj *Hermann* Imre kaj Alice atentigas pri la kruela konduto de infanoj, substrekante, ke „la krueleco ne estas konscia, tamen por la trafitoj ne malpli vunda". Al tio mi povas aldoni, kion Plutarko skribis: „La knaboj lude ĵetadas ranojn, tamen la ranoj mortas ne lude, sed serioze."

*– Ne estas do hazarde, ke ofte proponiĝas: oni devus fari ion por ĉesigi la malavantaĝan situadon de talentuloj. En la okddentgermana magazino Bunte Illustrierte (12/1980) mi legis artikolon kun la titolo: „Elstara kapablo – ĉu malfeliĉo?" Nuntempe ankaŭ en Hungario multaj jam alvokas, ke oni mildigu la malavantaĝan situacion de talentuloj. La renoma genetikisto Czeizel Endre skribas kaj diras: „paradokse, la spirite-mense postrestintaj infanoj ĝuas avantaĝojn, kaj estiĝis aparta lerneja sistemo por ili, dum vidiĝas nenia solvo por talentuloj."*

– En Usono, kontraŭe, oni ellaboris talentoflegan programon, eĉ: en pedagogiaj fakultatoj oni jam instruas edukadon de eksterordinare kapablaj infanoj. En 1978 fondiĝis en Hamburgo la Societo por Helpi Eksterordinare Kapablajn Infanojn. Ankaŭ en Sovetunio oni multe faras por la instruado de talentuloj en specialaj lernejoj. Tiaj estas ekzemple la Novosibirska, Taŝkenta sportlernejoj kaj tiu ĉe la Universitato *Lomonosov* en Moskvo.

– En Hungario, se mi bone scias, en la bazlernejoj ĝis nun ne eblis apliki instruadajn formojn, diferencajn de la ĝeneralaj, interalie ne estis permesita la privata instruado de eksterordinare kapablaj infanoj.

– Vere ne. Kiam mi ekzamenis kun mia edzino la sorton, vivovojon de elstaraj homoj, ni decidis, ke por plenumi la lernodevon ni ne elektos la tradician formon, sed ni instruigos niajn infanojn private. Kiam mia unua filino, Zsuzsa, atingis la aĝon de lernodevo, ses monatojn antaŭ la komenco de la lernojaro mi peticiis ŝian liberigon de la vizitado de lernejo, argumentante per eksterlandaj ekzemploj kaj per ŝia progreso en la lernado, ĉar mi sentis endanĝerigita la disvolviĝon de ŝiaj kapabloj en la lernejo. La ministerio plurfoje rifuzis mian peticion, malgraŭ ke multaj subtenis, ankaŭ skribe, mian peton.

*– Lasu min citi el ĉi tiu peticio. Szabolcsi János, mezlerneja pedagogo, internacia ŝakmajstro opinias: „Mi subtenas la peton, ĉar la risko pro ĝia plenumo bagatelas kompare kun la verŝajne granda, eĉ mondsignifa rezulto antaŭvidebla." La ŝakinstruisto Alföldi László: „De Polgár Zsuzsa certe atendeblas mondsignifaj rezultoj kaj tre rapida progreso. Siajn studojn ŝi povos daŭrigi tre longe ankaŭ kiel privata lernantino kun plena sukceso, kaj samtempe ebliĝos la laŭplana kaj maksimuma disvolvo de ŝia ŝakluda kapablo."*

– Malgraŭ tio oni longe rifuzis mian peton; okazis eĉ, ke la oficisto de la koncerna instanco venis al ni akompanata de sekurecpolicano armita per maŝinpistolo, por trakti pri la afero. Plurfoje mi ricevis avertojn de diversaj instancoj, ke oni oficiale iniciatos proceson kontraŭ mi pro malobservo de la leĝo pri lernodevo.

Ni perdis tre multan energion, ĝis ni gajnis ĉi tiun batalon, kaj ricevis la permeson de la Ministerio pri Instruado. La decido tekstis jene: „La infano estas elstare kapabla, mi liberigas ŝin, kiel striktan escepton, de la ĉiutaga vizitado de la lernejo."

Por ĉi tiu liberigo ni devis atendi naŭ monatojn. Kaj poste, ĉe la naskiĝo de nia sekva infano la problemo refojis dekomence. Pene kaj ŝvite ni sukcesis aranĝi, ke ankaŭ ŝi estu privata lernantino.



## 2. ĈIU INFANO ESTAS PROMESO

„Pli aĝaj ni estas pli saĝaj, tamen junaj ni lernas pli facile."

*Aristotelo*

„Multaj aferoj akireblas per mono, multaj per trompo, multaj per falsado. Sed ekzistas unu afero, kiu atingeblas nur per honesta laboro; por kiu reĝo devas labori, samkiel karbisto – kaj tio estas la scio..."

Talmudo

„Okazo kreas ne nur ŝteliston, sed iufoje ankaŭ grandulon."

G. C. *Lichtenberg*

– *Kiuj estas la ĉefaj pedagogiaj principoj, kiujn vi konsideras sekvindaj kaj en la edukado de averaĝuloj, kaj en tiu de talentuloj***?**

– Inter miaj pedagogiaj principoj gravan lokon okupas la veko kaj teno de la interesiĝo de la infano, postulo de atingoj ĉe la infano, fido al li, laŭdo kaj admiro de liaj atingoj. (Plutarko skribas: „Laŭ Ksenofono ne ekzistas pli agrabla muziko, ol se oni estas laŭdata.") En Sovetunio oni faris eksperimenton, en kiu centris kiel baza principo la admiro de la infanaj atingoj. La rezulto estis intensega evoluo de la kapabloj de la infanoj. Krome, al miaj pedagogiaj principoj apartenas ankaŭ la centra rolo de sukcesoj.

Antaŭ kelkaj tagoj mi revenis de Nov-Jorko, kie dum vizito de lernejo mi ekatentis sloganon sur muro: „Ĉiu infano estas promeso." Jes ja, en ĉiuj ebenoj de la pedagogio, en ĉiuj formoj de la instruado la pedagogio devas eliri el ĉi tiu fundamenta koncepto.

Tre gravas, ke la infano ŝatu, kion li faras – nur tiel li instigeblas ja dum longa periodo labori rezultodone. La elformado de profunda interesiĝo havas tre gravan rolon en la evoluo de la personeco, precipe el la vidpunkto de la disvolvo de kapabloj. Interesita, la infano disvolvas sian agadon konsumante malpli da energio, tamen atingante pli grandajn sukcesojn, krome li malpli laciĝas.

– *Kiel vi vidas la rilaton inter sukceso kaj fiasko?*

– Mi pledas ĝenerale por pozitiva instigo. Laŭ mia opinio oni devas krei pedagogian situacion, en kiu la travivo de sukcesoj multoble superas tiun de fiaskoj. Tio validas pri ĉiuj infanoj, sed gravas precipe ĉe la talentaj.

La sukceso- kaj fiaskospertoj, kiel ankaŭ *Adler* demonstris, fortege influas la memfidon – aŭ malcertiĝon – de la infano. Ankaŭ laŭ P. *Michel*, la sperto de sukceso, la admiro far aliuloj, la rekono flanke de pedagogoj grave instigas la pluan agadon, altagrade pliigas la fidon de la infano pri liaj scio kaj forto. Laŭ *Frank:* la fiasko, angoro kaj timemo malkreskigas la atingivon. Sekve de aro da sinsekvaj malsukcesoj povas kreiĝi eĉ damaĝa inhibicia komplekso. Kun la kresko de streĉiteco la agado iĝas pli surfaca kaj la konduto pli maltrankvila.

Same, laŭ la opinio de M. *Juck*, la sukcesoj, spertitaj sur iu kampo plialtigas (kaj la malsukcesoj malplialtigas) la aspironivelon ankaŭ sur aliaj kampoj.

La eksperimentoj de *Helm* pruvas, ke travivo de sukceso malplilongigas la tempodaŭron necesan por solvi postajn taskojn, kaj pliigas la elastecon kaj ideoriĉecon de la pensado, dum sekve de fiasko ekestas blokiĝoj, rigideco, relativa ideomalriĉeco en la pensado kaj kreskas la solvaddaŭro.

– *Ofte okazas sub- aŭ supertaksado de atingoj. Kiu el ili pli malutilas el pedagogia vidpunkto?*

– Pedagogie nur la adekvata taksado estas bona, psikologie malpli danĝeras kompreneble la super-, ol la subtaksado. Sed ni ne forgesu: morale, kaj sekve pedagogie, la troa ekstera sukceso (laŭdo, distingo, premio) faras la infanon tro memfida, kaj tio povas rezultigi ne nur misformitan karakteron, sed ankaŭ malpliiĝantan atingopovon.

Kiel *Nemes* Márta skribas: „Unu afero estas progresi per interna fortostreĉo al elpensita celo, kaj alia estas la ekstera aplaŭdo. La ekstera agnosko sola ne egalas sukceson. Kvankam gravas ankaŭ la ekstera agnosko, sed finfine ĝi prezentas nur formon, kontraste al la enhava flanko, al la efektiva atingo."

Tre gravas do la harmonio inter atingoj kaj ekstera agnosko; kaj tio validas ankaŭ por la koincido de ekstera kaj interna taksadoj. La eĥo sendube pliigas la ĝojon de la kreintoj, tamen ne la laŭta agnosko de la sukceso, sed precipe la varmo de la certagrada kompreno.

– *Ĉu la sukceso ne malpliigas la disciplinitan laboron? Entute, kiel vi opinias pri la disciplino?*

– Mi konsideras la disciplinon tre grava pedagogia faktoro. Mi estas nek por fera disciplino, nek por troa liberemo. Mi pledas por racia kaj memdirekta disciplino, ĉu en infana, ĉu en plenkreskula aĝo. Ĉi-rilate mi multe lernis de *Selye* János: „Mi ŝatas la naturan averaĝan vivmanieron – mi permesas al mi ĉiujn komfortojn en la oficejo, laboratorio kaj hejme, kiuj pliigas la eblon esploradi kaj samtempe vivi kaj ĝui vivon, kiu havas por mi



sencon kaj celon. Sed nenion pli. La vera scienculo vivas monaĥan vivon, for de la aferoj de la mondo, dediĉante sin komplete al sia laboro. Li bezonas memvolan feran disciplinon, por koncentri ĉiujn siajn kapablojn al tasko, eksperimento aŭ manuskripto, postulantaj daŭran kaj nedividitan atenton. Se ni plezurpromenas en la tempo, ankaŭ nia menso progresas nur perpiede." La blindan disciplinon mi tute rifuzas, ĉar ĝi ne venas de-interne. Mi atingas disciplinon per interesigo, ŝatigo de la objekto, kaj ne per trudo. Ankaŭ laŭ *Comenius* disciplino bezonatas: „La instruado sen disciplino similas al akvomuelejo sen akvo."

La disciplineco estas kompreneble ne nur ekstera kadro, sed ankaŭ interna psika kapablo. La eduko al disciplino ĝenerale disvolvas la kapablojn, ĉar ĝi samtempe trejnas ankaŭ al persisto, volforto kaj atentemo.

Laŭ interesa konstato de Lono *Bolin*, „la intenseco de la infana atento ne nur ne malplias, sed eĉ superas tiun de plenkreskuloj."

– *Ankaŭ el tio fontas via pedagogia koncepto, diferenca de tiu de la nuntempa pedagogio, pri la rolo de la frua infanaĝo.*

– En mia pedagogia sistemo la frua infanaĝo okupas centran lokon. Laŭ mia koncepto la frua infanaĝo, t.e. la periodo inter 3 ĝis 6 jaroj, do la antaŭlernejaj jaroj, estas pli gravaj kaj precipe pli bone utiligendaj, ol pensas la nuntempa fakliteraturo kaj realigas la praktiko.

Mi opinias nome, ke la frua infanaĝo estas tute ne frua el la vidpunkto de lernado, eĉ, koncerne specialiĝon, ĝi ne estas tia. R. *Rose*, fakulo pri cerba biokemio, demonstris, ke
en la frua infanaĝo, kun la kresko de la ĉeloj en la cerbo, disvolviĝo de novaj ĉelprocezoj, kaj novaj nervo-interkonektiĝoj, kreiĝas novaj kontaktoj. Sed kiam la cerbo plene evoluiĝis, ĝi tuj rimarkeble perdas ĉi tiun kapablon. Jen la kaŭzo, kial la homo lernas pli malfacile kun la paso de la jaroj.

B. *Bluhm*, profesoro de la Universitato de Ĉikago eksplikas en sia libro „Konstanteco kaj ŝanĝiĝo de la personeco de la homo", ke 50% de la intelekto de la homo elformiĝas dum la unuaj kvar vivojaroj, kaj la eksterordinara komprenivo de la infano, karakteriza ĝis la kvarjara aĝo, iom-post-iom malpliiĝas kun la paso de la tempo. Malavantaĝa medio kaŭzas en la unuaj 4...5 jaroj – laŭ li – pli da damaĝoj, ol eventualaj magraj evoluebloj dum la postaj 10...12 jaroj.

Ĝeneraligante la rezultojn de la esploroj de la Monda Organizo por Sano, *Barnet* konstatas: por la elformiĝo de la konduto de la homo plej gravas la unuaj kvin vivojaroj. Laŭ la opinio de *Turĉenko*, koncerne la spiritan disvolviĝon de la infano malfacilas, eĉ preskaŭ ne eblas kompensi, kion oni preterlasis en la frua infanaĝo. La plej malfacilaj problemoj de la instruado

grandparte solveblus, se oni povus komenci la instruadon sufiĉe frue.

Al la ideo de frua instruado oni ofte obĵetas asertante, ke ĝi kontraŭas la evoluleĝojn de la homa organismo. Efektive, tiaj asertoj ne pli pravigeblas, ol la malo. Ankoraŭ ne estas klare, skribas usona sciencisto, kiom efikas la senpera medio sur la strukturon de la cerbo. Por korekte kaj ĝustatempe instrui la infanon, ni bezonas koni la specifaĵojn de la evoluo de la homa nervosistemo. Sed hodiaŭ ni ankoraŭ ne povas definitive respondi al la demando, kio okazas en la nervocentroj, se ni komencas la instruadon frue, kaj inverse: se multe pli poste.

– *Kion oni povas facile alproprigi en la frua infanaĝo?*

– Unuavice fremdajn lingvojn. Tio ne malhelpas la infanojn en la konstruado de la pensado, ne fuŝas la gepatran lingvon, eĉ kontraŭe, pliriĉigas la personecon. Nuntempe en la tuta mondo oni jam esploras la eblojn de lingvoinstruado en antaŭlerneja aĝo. En Sovetunio, Bulgario, Rumanio, Ĉeĥoslovakio, GDR, Francio, Japanio, Usono, FRG, Svedio ktp. iras sukcesaj lingvoinstruaj eksperimentoj en infanĝardenoj. En plurlingvaj regionoj la infanoj kapablas jam en tre frua aĝo paroli kun plena natureco plurajn lingvojn sen miksi ilin. Laŭ František *Marek* „la lernado de fremdaj lingvoj en la frua infanaĝo tre gravas, ĉar sen ĝi la homo poste tre malfacile esprimas sin spontanee, rapide kaj vortoprete."

Laŭ *Deák* Miklós, en aĝo de 4...6 jaroj la infana voĉaparato ankoraŭ evoluas, estas elasta, facile fleksebla, kaj fiksiĝas nur post la deka vivojaro. La formeblo de la voĉorganoj de infanĝardenanoj estas tre avantaĝa por la perfekta alproprigo de fremdaj lingvoj. Ju pli la infano ankoraŭ proksimas al la stadio de murmurbabiletado, des pli facile li transiras al iu ajn voĉo. Kiel kuriozaĵon mi mencias: infanoj alproprigas pli bonan prononcon ol iliaj instruistoj, se ili ofte aŭdas sonregistraĵojn aŭ povas kontaktiĝi kun infanoj, por kiuj la koncerna lingvo estas la gepatra.

– *Kiajn spertojn vi havas ĉi-rilate?*

– Mi povas ekzempligi miajn filinojn. Mi donis ilin en ruslingvan infanĝardenon, kaj en la aĝo de kvin jaroj ili ĉiuj flue parolis – krom la hungara – ankaŭ la rusan lingvon.

– *Unuvorte, vi havas la sperton, ke oni povus komenci la „seriozan laboron" pli frue, ol nun estas praktikate.*

– Jes. Mi kutimas diri pri la antaŭjuĝo, laŭ kiu la infanoj ĝis la sesjara aĝo ne maturiĝas sufiĉe por lerni, ke la plejparto de plenkreskuloj (gepatroj kaj pedagogoj) ne maturiĝis kaj kvalifikiĝis por instrui infanojn. Se ni volas kontentigi la postulojn de la estonto, ni devas okupiĝi pri la infano en laŭeble plej frua aĝo. Laŭ mia didaktika principo oni devas komenci en la



aĝo de ĉ. 4...5 jaroj la instruadon, kiu laŭ mia koncepto estas nenio alia ol serioza ludo.

– *Ĉu tiamaniere ne perdiĝas tio, kion ni nomas infanaĝo, ĉu ne reduktiĝas la infaneco de la infano?*

– La infaneco ne reduktiĝas, nur la infanbildo, kiu regas en la publika opinio kaj fakliteraturo. Tio ne estas domaĝinda. Laŭ mi la nun disvastiĝinta infanbildo ne baziĝas sur la realo.

La psikologia literaturo kutimas mencii kiel proprecon de la infana ekzisto interalie la senzorgecon, senzorgemon. Oni interpretas ĝin tiel, ke la infano vivas por la momento. Sed efektive ankaŭ la plenkreskulo ŝatas vivi por la momento, eĉ multaj plenkreskuloj nur tiel vivas. Sed la infano estas objektive estulo, orientiĝanta ankaŭ al la futuro. Al la esenco de mia didaktika principo, al la konsekvenca geniedukado apartenas ankaŭ, ke oni devas doni perspektivon al la infano. Se la infano ne vidas perspektivon, ne vidas celon, li povas fari nenion sen gepatra helpo. La infano estas ankaŭ memeduka estulo, kvankam la memstareco ne estas denaska stato, sed ŝtupo de la edukiteco. Kiom kapablas la infano je memedukado, tio dependas de la nivelo de edukiteco, do ĝi estas rezulto de pedagogia laboro. Fakte, ekde la unua momento ni devas eduki la infanon, ebligante al li certan memstarecon.

– Kio estas la rolo de ludo en la vivo de la infano? Se mi diras „infano", oni tuj pensas pri ludo.

– La infanbildo en mia koncepto ankaŭ ĉi-rilate diferencas de la tradicia. Eble tio kaŭzas, ke oni ofte ne komprenas min kaj miajn filinojn. Efektive, mi opinias la ludon tre grava fenomeno, eble pli grava, ol multaj el tiuj psikologoj, kiuj levas ĝin sur piedestalon.

Sed la ludo ne estas antipodo de laboro. Por la infano la ludo tre gravas, sed en la ludo enestas elementoj de laboro. Ĉi tiujn du faktorojn oni ne disigu en la valorsistemo de la infano, ĉar se ekzemple infano aŭdas en aĝo de pleja impresiĝemo, ke „Ludu, filo, ne laboru!", tio poste povos rezultigi, ke li sentos la laboron fremda. Mi, male, opinias, ke la infano ŝatas ne nur ludi: por li prezentas ĝojon akiri informojn kaj solvi problemojn. Povas lin ĝojigi ankaŭ la infana laboro, do la lernado, se ĝi estas sufiĉe motivita, kaj se ĝi signifas konstantan problemsolvadon konvenan al la nivelo de liaj bezonoj.

Laŭ mi oni povas lude lerni, kaj en la ludon oni povas enmeti akiron de valoraj informoj. La ĉiutaga konscio rigide diferencigas la ludon de la infano disde la lernado, t.e. lia laboro. La Hungara Enciklopedia Vortaro

modele esprimas tiun trajton. Jen kiel ĝi ekzempligas la ludon: „Li ne ŝatas lerni, nur ludi."

La infano bezonas ne apartigitan ludon, sed sencohavan agadon. La infanoj ŝatas fari sencohavajn aferojn jam en la etinfana aĝo. Ili ŝatas solvi problemojn ankaŭ dum ludo, eĉ dum plezura ludo. Ju pli signifoplenan, informoriĉan problemon ili solvas dum sia agado, des pli granda iĝas ilia ĝojo, sukcessento. Finfine plej gravas en ĉi tiu aĝo, ke ni veku ĝojon, do bonan senton en ili.

Ĉe miaj filinoj mi spertis, ke la lernado prezentas por ili pli grandan ĝojon ol sterila ludo. Mi havas la senton, ke ludo senigita de informoj rolas ofte nur kiel surogata agado, surogata kontentiĝo.

Tion pruvas ankaŭ la fakto, ke ekzamenante la biografion de escepte kapablaj infanoj, ni spertas, ke ili multe malpli ludas, ol iliaj samaĝuloj. La profundaj kaj longdaŭraj esploroj de L. M. *Terman* en Kalifornio en 1920 malkovris plurajn diferencojn inter la ludo de elstare kapablaj infanoj kaj iliaj samaĝuloj. Kiel oni atendis, la talentajn infanojn multe pli interesis la ludoj postulantaj mensan agadon. Kompare kun la kontrolgrupo iom pli ofte okazis, ke ili ludis solaj. Susanna *Millar* skribas en sia libro „Psikologio de la ludo", ke en certaj okazoj elstare kapablaj infanoj, ne havantaj intelekte samnivelajn samaĝulojn, povas havi malfacilaĵojn dum ludo kun aliaj.

Sekve, mi ĝenerale ne disigas rigide la lernadon disde la ludo, aŭ sur plenkreskula ebeno la laboron disde la hobio.

Mi estas por tio, ke ni faru tiun laboron, kiun ni ŝatas – kiu do povas esti por ni ankaŭ ŝatokupo. Sed tion ni povas efektivigi nur, se ĉe la elekto ni pasie ekŝatis ĝin. Kaj por tio plej taŭgas la infanaĝo. Aliflanke ankaŭ ludo ne ekzistas sen disciplino, samkiel inverse: ankaŭ en la laboro troviĝas ludecaj trajtoj. En la infanaĝo ni devas elformi ĝuste ĉi tiujn kuntenajn faktorojn. Pro tio mi nomas la antaŭlernejan lernadon serioza ludo, kaj la postan ludon ŝatata aŭ hobieca laboro.

*– Tio kondukas al la logika demando, kiom ŝarĝeblas la infano en la frua infanaĝo?*

– La ŝarĝado interrilatas kun la kompleksedo de la personeco, kaj ĝuste tial estas pli ekzakte uzi anstataŭ la antinomio sub- kaj superŝarĝado la diferencigon: bona kaj malbona ŝarĝadoj. Bona ŝarĝado estas tiu, kiu akordas kun la sanstato, krome la korpa kaj spirita statoj kaj evoluebloj de la infano. Malbona ŝarĝado povas esti jen *superŝarĝado*, jen *subŝarĝado*.

*– Kio estas la premiso de bona ŝarĝado?*



– Veki la interesiĝon. La infano ŝatu tion, pri kio li okupiĝas, t.e. li interesiĝu pri tio. Oni devas kutimigi lin iom post iom al la laboro kaj krei ĉe li la unuecon de ludado kaj laboro.

Gravas krome, ke la infanoj kutimiĝu al la lernado kaj laborado. Certa trejniteco necesas por la ŝarĝado. La bone organizitan kaj laŭgradan laboron mi nomas *aktiva ripozo*. Oni ŝarĝu do la infanon tiamaniere, ke li travivu tion kiel aktivan ripozon. Studentoj ekz. regule vizitas tiujn lekciojn, kiujn ili ĝuas, kaj poste ili sentas sin preskaŭ pli ripozintaj ol antaŭe. Kaj se la lekciisto mallerte prelegas, post duonhoro ili preskaŭ endormiĝas pro laceco kaj enuo.

*– Ĉu rimarkinde pliigeblas la ŝarĝado de la infano kompare kun la nun praktikata, se ĉi tiuj kondiĉoj ekzistas?*

– Laŭ mia starpunkto, per taŭga metodo la ŝarĝado kvante pliigeblas. Mi konsentas kun la pedagogia tendenco pledanta por *intensa instruado*. La esenco de intensa instruado kuŝas ĝuste en tio, ke ĝi uzas la eblon de celkonforma ŝarĝado, la laŭgradecon, la subtenon de interesiĝo, la travivon de atingoj kaj sukcesoj.

Same opinias ankaŭ la usonano G. *Doman*. Laŭ lia komparo: kiel la diversaj muskoloj de la korpo povas esti evoluigataj kaj fortigataj nur per regula trejnado, ankaŭ la kapabloj de la cerbo kreskigeblas nur per ĉiutaga trejnado. La manko de regula logika pensado kaj lernemo kaŭzas malkreskon de la inteligento, samkiel en nelaborigata korpo aperas nervatrofio. *Doman* scias surbaze de trijardeka praktika sperto, ke la cerbo plej rapide kreskas inter la unua kaj sesa vivojaroj, kaj ĝi preskaŭ „senŝvite"alproprigas konojn. La kapablo lude lerni malpliiĝas post la sesa jaro, tiam la alproprigo de informoj fariĝas pli peza mensa laboro.

Laŭ mi oni devus pli disvastigi la intensan instruadon sur ĉiuj kampoj. Miaj filinoj ekzemple ellernis ĉiujn lingvojn per intensaj metodoj. Kompreneble ankaŭ la ŝakludon ili faris tiel. Kaj la tablotenison.

*– Refoje mi demandas: ĉu la frua ŝarĝado ne efikas damaĝe sur la evoluon de la infana personeco?*

– Laŭ la nuna stato de la scienco ĉi tiu problemo ne estas plene klarigita. La tradicia vojo, la senŝarĝaj fruinfanaĝaj jaroj povas esti same damaĝaj, kiel la vojo proponata de mi. Mi opinias, ke ĉi-lasta pli utilas.

*– Ĉu vi faris inter naturaj kondiĉoj ŝarĝo- kaj lacecoesplorojn pri infanoj?*

– Jes. Miaj filinoj partoprenis ekzemple dufoje, en 1985 kaj en 1986 t.n. 24-horan maratonan ŝakturniron en Dresdeno. (En 1985 nur Zsuzsa kaj 1986 jam ankaŭ ŝiaj du pli junaj fratinoj ludis en la turniro: Zsuzsa estis 15-

jara, Zsófi 9 kaj duon-, Judit 8-jara.) Laŭ la regularo ili devis ludi 100 partiojn dum 24 horoj, do ili ***devis*** streĉe atenti, praktike sen ripozo. (Nur trifoje intermetiĝis mallonga, 20-minuta manĝopaŭzo.) Aldone al do, ili devis sidiĝi al la ŝaktablo post 16-hora veturo en trajno.

Nu, la konkurson gajnis ambaŭfoje Zsuzsa kun granda supereco de 10 poentoj, cetere antaŭ viraj internaciaj majstroj; kaj ambaŭ ŝiaj fratinoj akiris avanajn lokojn. (90% de la partoprenantaro konsistis el 25- ĝis 30-jaraj viroj.) Zsuzsa atingis en 1985 en la unua kvindeko da partioj tiom da poentoj, kiom en la dua, kontraŭ la samaj partneroj; Zsuzsa kaj Zsófi kolektis en 1986 en la unua kvindeko tiom da poentoj, kiom en la dua. Judit havis iom pli da poentoj en la dua duono, ol en la unua. Zsófi kaj Judit atingis pli da poentoj en la lastaj 40 partioj, ol en la unuaj 40. Tio pruvas la ŝarĝeblon de la infanoj (ili ne laciĝis pli ol la plenkreskuloj, eĉ ...) kaj tion, ke daŭre streĉita atento pliigeblas por difinita celo.

Ne nur la rezultoj montras, kiel miaj filinoj eltenis la ŝarĝadon (en 1986 Zsuzsa kolektis 91,5 poentojn el 100 ludoj, Judit 68,5 kaj Zsófi 66 poentojn), sed ankaŭ la fotoj, faritaj pri ili en diversaj etapoj dum la 24-hora konkurso.



## 3. GENIO: ĈU TREZORO AŬ BALASTO?

„Ni ekvidas nur tion, kion ni volas vidi, kaj ni ekaŭdas nur tion, kion ni volas aŭdi."

*Szent-Györgyi* A.

„Sub talentoprotekto multaj komprenas tion, ke oni devas protekti sin kontraŭ talentuloj."

*Juhász* Gy.

„La homoj rifuzas siajn profetojn kaj buĉas ilin, sed amas siajn martirojn kaj omaĝas al tiuj, kiuj estas mortigitaj."

F.M. *Dostojevskij*

– *La kristaliĝa punkto de via pedagogia sistemo estas – kiel la libido ĉe Freud, la emocio ĉe Wallon – la nocio de genio.*

– La nocio de genio kaj la rilataj teoria kaj eksperimenta laboroj. Kompreneble ne pro tio, ke mi intencas fundamenti la ideologion de geniregado aŭ genipotenco, aŭ ĉar mi konvinkiĝis, ke la sola destino de ĉia pedagogio estas la geniedukado. Ne. Mi estas kontraŭ ĉia elitregado, do mi estus ankaŭ kontraŭ „genikratio". Mi estas kontraŭ ĉia pedagogia aŭtokratio, kaj tiel ankaŭ kontraŭ tio, ke oni ŝablonece transplantu ĉien mian metodon.

– *Kiom diferencas la nocio de genio, uzata de vi, disde la koncepto de la publika opinio kaj fakularo?*

– En la publika opinio nuntempe tre disvastiĝis unuflanke la praa koncepto, laŭ kiu geniulo estas strangulo, diverĝanta de la averaĝo, eksterordinare bizara fenomeno, duon frenezulo, kaj ke geniulo apenaŭ diferencas de frenezulo. Aliflanke oni ofte identigas geniulon kun pintkarieruloj, kinosteluloj, famuloj. Mi malakceptas kompreneble ambaŭ konceptojn de la publika opinio; ne nur tiun, kiu identigas geniulojn kun duonfrenezuloj, sed ankaŭ tiun, kiu vidas geniulon en ĉiu kinostelulo, famulo, renomulo.

– *Ne estas pli klarigita la situacio eĉ en la pedagogio. Mi mem demandis kelkajn esploristojn, kiel ili difinas la nocion de genio, kaj la plimulto respondis, ke ili ankoraŭ eĉ ne pensis pri la afero.*

– Tiu ĉi stato karakterizas unuavice la pedagogion. Iom pli bona estas la situacio en la psikologio, kvankam ankaŭ la psikologio ne traktas la aferon laŭ ĝia signifo, malgraŭ ke ĝi jam transpasis la koncepton de la itala kuracisto kaj kriminalisto Cesare *Lombroso* (1835–1909) pri „genio kaj

frenezeco". Ekzemple, kelkaj psikologoj provis malkovri la sekreton de *Einstein*, do ili analizis lin anatomie (pezo, volumeno, sulkiteco de la cerbo), sed ili trovis nenian diferencon kompare kun la averaĝo. Post la morto de *Lenin* cerboesplora instituto en Moskvo same scivolis, ĉu malkovreblas ia diferenco en lia cerbostrukturo, sed ankaŭ ĉi tiu esploro povis demonstri nenion konkretan.

– *Se la nocio de genio tiom malcertas en la publika opinio kaj fakrondoj, kial vi insistas pri ĝi? Ĉu vi ne havas antaŭjuĝon pri ĉi tiu nocio?*

– Por ekspliki miajn pensojn mi povus uzi kompreneble ankaŭ alian nocion. Tion rajtas ĉiu esploristo. Sed mi insistas konscie pri la nocio de genio – uzata kompreneble laŭ mia difino –, por redoni ĝian rangon, kaj, reportinte ĝin sur la teron, demokratiigi ĝin. Mi insistas pri ĉi tiu nocio,

- ĉar mi volus komprenigi, ke genio venas ne el alia mondo, sed estas ja ĉi-monda estaĵo, celo atingebla rezulte de edukado;
- ĉar mi volus pruvi, ke ĝi havas nenion komunan kun frenezeco, eĉ inverse: ĉiu sana homo havas denaskan potencialon por ĝi, kaj genio estas normala finrezulto de la disvolviĝo de ĉi tiu potencialo;
- ĉar laŭ mia sento ĝi estas ĝenerala kategorio, kiu povas servi por la kompleta karakterizo de ĉiuj specialaj manifestiĝoj: artisto, sciencisto, organizisto, laboristo, sportisto, politikisto, pedagogo ktp.
- ĉiuj povas esti geniuloj; la kvalifiko „genio" esprimas samvalide por ĉiuj ĉi terenoj la elstarecon;
- ĉar (kaj mi uzas ĉi tiun kategorion precipe pro tiu kaŭzo) mi vidas potencialan geniulon en ĉiu individuo naskita sana. Mi ligas la geniecon nek al kasto, nek al raso. Ĉe mi la genio estas demokratia nocio. La tasko kaj devo de la pedagogia laboro estas konduki la homojn en ĉi tiu direkto. Aliflanke estas rajto de ĉiu geniulo konsideri sin tiu sen ajna hontemo. Mi uzas ĉi tiun nocion por – agnoskinte la elstarecon – instigi al kvalito, kaj por ke la genio (kvalito, elstareco) estu en nia socio ne objekto de hontemo, sed tiu de fierado.

– *La genio do estas ĉe vi ne nur nocio, sed tuta kompleksa koncepto.*

– Unue, mi distingas la potencialan genion disde la realiĝinta. Laŭ mia koncepto ĉiu infano naskita sana estas potenciala geniulo, sed ĉu li fariĝas tio aŭ ne, dependas de la cirkonstancoj, de la edukado kaj de li mem. Tion pruvas ankaŭ la fakto, ke en la 20-a jarcento – interalie pro la socia bezono – multe pli da geniuloj „realiĝis", ol ekzemple en la 18-a aŭ 19-a jarcento. La vojo de potenciala geniulo al la fakta geniuliĝo estas liberecbatalo, procezo de liberiĝo de la genio. Tre verŝajne la socio de la estonto estos tiu



de la evoluintaj, memrealigaj, liberaj individuoj, kie la genio validos kiel normala, ĉiutaga ekzistoformo, kaj ne kiel individua „ekstravaganco".

Sed hodiaŭ ni ankoraŭ troviĝas for de tio. Nun la plejmulto de la loĝantaro estas averaĝe kapabla, kaj ĝis la nivelo de elstaruloj (alivorte: geniuloj) leviĝas nur malmultaj, kvankam multe pli, ol ni imagus.

– *Ekspliku ĉi tiun penson pli detale! Al mi ŝajnis ĝis nun, ke geniulo estas la hazarda koincido de socia medio kaj donitaĵoj.*

– Ne sen kaŭzo asertas *Einstein*, ke la erudita menso estas favorato de la bonŝanco, sed nur la erudita iĝos tia. Mi interpretas ĉi tiun konstaton jene: genio = laboro + favoraj cirkonstancoj (sub favoraj cirkonstancoj mi komprenas sociajn kondiĉojn).

Ĉiu sana infano kondukeblas al la pinto. Tion konfirmas ankaŭ la fakto, ke la plejmulto de la infanoj ellernas unu lingvon ĝis la aĝo de unu kaj duonjaro. Pripensu, ĉu ne genia atingo? Se li daŭrigus tiel, en la aĝo de 10 jaroj li jam scipovus paroli 5 aŭ 6 lingvojn. Do genio rezultas unuavice el edukado kaj memedukado. Ĉi tiun aserton konfirmas ankaŭ la opinioj de mondfamaj geniuloj. Lasu min citi kelkajn ekzemplojn:

T. A. *Edison:* „Genio egalas al 1% da inspiro kaj 99% da ŝvito."
Ch. *Chaplin:* „Talento = nenio; disciplino = ĉio."
C. *Cuvier:* „Genio estas unuavice atento."
M. *Gorkij:* „Talento egalas al amo labori."
J. S. *Bach:* „Iu ajn povas atingi mian nivelon, se li tiel diligentas, kiel mi dum mia tuta vivo."
J. W. *Goethe:* „Genio? Eble nur diligento."
H. *de Balzac:* „Ĉiu homa talento konsistas el du komponantoj: pacienco kaj tempo."

Simile rilatas al la problemo nuntempe ankaŭ la elstaraj psikologoj, okupiĝantaj pri la kreivo. Laŭ la soveta eksperto pri la temo B. Nikitin, ĉiu korpe kaj spirite sana novnaskito posedas enormajn rezervojn por disvolvi siajn kapablojn, kaj ju pli frue ni utiligas ilin, des pli bone. „[La infanoj] havas jam antaŭ la infanĝardena aĝo enorman kapaciton por lerni, kaj oni povus ĝin multe pli intense utiligi." (Li faris siajn konkludojn, utiligante interalie la spertojn pri siaj gefiloj. En la aĝo de 2 jaroj kaj 8 monatoj ĝis 3 jaroj kaj 4 monatoj ili jam kapablis legi, 3,5-jaraj ili posedis la aritmetikajn, skribo- kaj legokonojn postulatajn en la unua klaso ktp.)

Laŭ la usona psikologo Maya Pines milionoj da infanoj damaĝiĝas neripareble sekve de tio, ke en la decida aĝo – de la naskiĝo ĝis la 6-a jaro – oni ne instigas sufiĉe la evoluon de ilia intelekto. Laŭ la franca verkisto G. Duhamel „ĝis la kvina jaro ĉiu infano estas geniulo."

Simile opinias ankaŭ Glenn Doman, unu el la plej konataj sciencistoj pri genio: laŭ li ĝis la 3-a vivojaro el ĉiu etinfano edukeblas geniulo, kaj „ĉiu etinfano devus esti programita kiel elstara geniulo." Al siaj kritikantoj, laŭ kiuj li volas „bredi" elitajn geniulojn, li respondis: „Jes ja, ni edukas eliton. Sed ĉu vi scias, kiom da infanoj devus aparteni al ĉi tiu elito? Unu miliardo. Nuntempe ekzistas proksimume tiom da infanoj en la mondo." Mi supozas, ke en la monda populacio:

80% estas potencialaj geniuloj en la 1-a jaro de sia vivo,
60% estas potencialaj geniuloj en la 3-a jaro,
50% estas potencialaj geniuloj en la 6-a jaro,
40% estas potencialaj geniuloj en la 12-a jaro,
30% estas potencialaj geniuloj en la 16-a jaro,
20% estas potencialaj geniuloj en la 18-a jaro, kaj
nur 5% estas potencalaj geniuloj en la 20-a jaro.

– *Kiel statas ĉi tiu relativa socia malevoluo, se ni projekcias ĝin al la aĝo de 22–35 jaroj?*

– En tiu aĝo plejparte jam decidiĝis, kiom da geniuloj realiĝis: proksimume 0,1–0,01 procentoj de la loĝantaro.

Realiĝinta geniulo egalas, laŭ mia opinio, al elstarulo. La elstarulo diverĝas unuflanke kvante disde la averaĝo (li scias pli multe, pli vaste ol la averaĝo), aliflanke li realigas socie pli valoran, pli originalan kreadon. La elstaruleco mem havas plurajn ŝtupojn. Mi distingas tri:

*1)* genikandidato aŭ antaŭgeniulo (*1..5%* en ĉiu faktereno),
*2)* geniulo (0,2...0,5% en ĉiu faktereno),
*3)* supergeniulo (1 en ĉiu faktereno).

*Sekve:*

| Handikapitoj | | | Normaluloj | | | Elstaruloj (Geniuloj) | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| idiotoj | imbecilaj | debilaj | sufiĉuloj | averaĝuloj | kapabluloj | elstare kapablaj | superkapablaj | eksterordinare kapablaj |
| mense ege post-restintaj | mense meze postrestintaj | mense iom post-restintaj | nepretendemaj | naturaj | pretendemaj | genikandidatoj, antaŭgeniuloj | geniuloj | supergeniuloj |



(Kompreneble, ĉi tiu divido estas nur relativa. Evidente, ĉiu konkreta persono povas transiri el unu kategorio en alian.)

– *Prezentu ekzemplon por ilustri la klasifikon.*

– Evidente, oni plej bone konas la propran fakterenon. Mi prenos miajn ekzemplojn el la ŝako. Se bonkapabla ŝakisto atingas – ni supozu – 2350...2450 Élő-poentojn, tiam elstarulojn, t.e. geniulojn karakterizas la sekvaj rezultoj: elstare kapablaj, t.e. genikandidatoj situas inter 2450 kaj 2550. Geniuloj, superkapabluloj povas plenumi ĉ. 2550… 2650 poentojn, kaj tiujn super 2650 ni povas nomi supergeniuloj.

*Mondskale* en la ŝako (inter plenkreskuloj) troviĝas

– da supergeniuloj (super 2650) 2–4 personoj,
– da geniuloj (2550…2650) 50–60 personoj,
– da genikandidatoj (2450…2550) 300–400 personoj.

*En Hungario*

– supergeniuloj ne ekzistas,
– da geniuloj troviĝas 4–5 personoj,
– da genikandidatoj ĉ. 15 personoj,
– da pretendemaj, bonkapablaj ĉ. 70 personoj.

– *Kie situas nun la Polgár-fratinoj?*

– Zsuzsa en sia aĝogrupo troviĝas en la kategorio de supergeniuloj, en plenkreskula kategorio ŝi estas antaŭgeniulo. Sed Zsófia en la Roma konkurso de marto 1989 atingis rezulton tute klare karakterizantan plenkreskan supergeniulon. Koncerne sian ĝeneralan rezultaron, je plenkreskula nivelo ŝi troviĝas proksime al genikandidatoj, laŭ sia aĝogrupo ŝi apartenas al la kategorio de supergeniuloj. Judit (kiu ricevis Oscar-premion pro siaj rezultoj atingitaj en 1988) estas nedisputeble supergeniulo, t.e. laŭ sia aĝogrupo ŝi apartenas al la kategorio de supergeniuloj, kaj eĉ tie ŝi estas n-ro 1! Je plenkreskula nivelo ŝi lokeblas en la kategorion de genikandidatoj (en la aĝo de nuraj 12 jaroj!!!).

– *Gratulon! Sed en tiu rilato stariĝas alia demando. La tempofaktoro. La historio jam konis multajn mirinfanojn, sed ne el ĉiuj fariĝis mirplenkreskuloj". Kiel klarigeblas tio?*

– Infano estas geniulo, se li antaŭas siajn samaĝulojn je 5–7 jaroj. Mi estas konvinkita: se mirinfano ne fariĝas „mirplenkreskulo", la kondiĉoj malfavoras al sana kaj laŭorda laborado. Inter bonaj kondiĉoj el ĉiu mirinfano fariĝas mirplenkreskulo. Iuj asertas: ekzistas frue kaj malfrue maturiĝantoj. Laŭ mia interpreto: la kondiĉoj ne ĉiujn favoras por la ascendo. Okaze de bonaj kondiĉoj la ascendo sukcesas frue (laboro kaj bonŝanco havas ĉi tie gravan rolon), inter malpli favoraj pli malfrue. Cetere

ekzistas terenoj, kie oni povas iĝi geniulo ankaŭ en pli maljuna aĝo (filozofoj, verkistoj).

*– La gazeto Spiegel – eble iom malice – rimarkis, ke vi klarigas la aferon jene: „Genio troviĝas en ĉiu homo ĝis tia grado, kiom la socio ne ruinigis ĝin." Sed se ni diferencigas geniulon nur kvante de averaĝulo, ni povas paroli ankaŭ pri negativa tipo, ekzemple „krima geniulo aŭ genia militkrimulo". Ĉu ne ĝenas vin tia geninocio?*

– Jes ja, ĝi ĝenus min. Sed mi ja ne tiel konceptas ĝin. Laŭ mi genio estas valorentena nocio. Mi konsideras geniulo nur tiun, kiu realigas socie utilan agadon. La genio estas do unueco de kvanto kaj kvalito.

*– Sed se tio veras, kial ĝenas multajn homojn jam la nura vorto „genio"?*

– Pri tio oni povus longe diskuti. Jacques *Barzun* skribas: „Nova vero sonas neeviteble kiel frenezaĵo: ju pli granda vero, des pli granda frenezaĵo." La homoj malfacile toleras tion, kio diverĝas de la averaĝo. Ju pli iu diferencas de la tipaj mezuloj, des malpli oni toleras lin. Tio karakterizas ne nur laikojn, sed ankaŭ fakulojn. Eĉ inter sciencistoj ni trovas tiajn ekzemplojn. Ankaŭ *Einstein* ne estis komprenata de siaj kolegoj; en la germanaj universitatoj troviĝis fizikistoj, kiuj deklaris erarvojo la teorion de relativeco. Miajn filinojn ĉikanas ne nur la publika opinio. Eĉ samfakuloj, kunsportistoj ofte atakas ilin.

*– Do la vivo de geniuloj ne facilas. André Malraux diras: „La talento ne estas bonfara fondaĵo, la talento estas plago de la naturo, kaptilo por la karaktero, malbeno, trairo sur brulanta, falonta ponto, balasto sur la kolo kaj kurego sur monton." Kiel vi vidas: ĉu la vivo de geniulo konsidereblas beno aŭ malbeno? Kaj kiel ili prijuĝas sin mem?*

– Iuj el ili – tre malgranda parto – opinias sian staton malbeno, aliaj beno. La plimulto sentas ĝojon fontantan el la regula kreado, travivo de beleco kaj sukcesoj. Tio signifas staton de beniteco. Sed kvazaŭ malbeno surpezas la vivon de geniulo, se li ne atingas la starigitan celon. Lia seniluziiĝo povas iĝi grandega depende de la postuloj, kiujn li metis al si. Multo dependas ankaŭ de lia sento de realeco kaj de memedukado.

La vera malbeno venas tamen de-ekstere. Enorman damaĝon kaŭzas, se oni taksas malalte, kion geniulo kreas, se oni ne traktas lin laŭmerite, se li ne ricevas moralan kaj materialan subtenojn por sia laboro. Ankaŭ senrespondeca kritiko povas efiki terure. Ĉio ĉi tre malfaciligas la vivon de geniuloj. „Hodiaŭ la situado estas plurrilate pli malfavora ol en la mezepoko – konstatas *Selye* János –, ĉar per la riĉa rimedaro de amaskomunikado unusola demagogo povas veneni en kelkaj monatoj la pensadon de la publiko, kaj peli la plebaĉon en sovaĝan furiozon kontraŭ la plej elstaraj reprezentantoj de la propra nacia kulturo."



*– Tio starigas novan demandon: Ĉu genio estas trezoro aŭ balasto?*

– Ĉiurilate, unusence kaj objektive: trezoro. En nia epoko, kiam la internaciaj kontaktoj rapide evoluas, la interŝanĝo de materialaj kaj spiritaj kreaĵoj inter la diversaj popoloj akceliĝas, la internacia konkurenco sur ekonomia, scienca, teknika, kultura kaj sporta terenoj same intensiĝas – geniuloj ludas ĉiam pli gravan rolon. Neniel estas indiferente, kiom da geniuloj loĝas en iu lando. La edukado de geniuloj estas unu el la premisoj de la socia progreso, kaj iu socio elkondukeblas el ekonomiaj malfacilaĵoj grandparte nur per edukado, instruado.

Profesoro Hans *Eysenck*, unu el la plej elstaraj pledantoj por la edukado de geniuloj asertas, ke sen artefarita spirita elito la socio tre postrestos la internacian evoluon. La inventaĵoj kaj ideoj de superaverâgaj talentuloj fariĝas fieraĵo de la tuta socio, krome iliaj patentoj estigas novajn industriajn branĉojn, kaj per tio novajn laborlokojn.

Ne estas hazarde, ke rekoninte tion, gvidantoj de la plej grandaj internaciaj konzernoj subtenas la pionirojn de la edukado de geniuloj, kaj ke inter la mecenatoj de la jam menciita Instituto *Doman* troviĝas ankaŭ la Usona firmao *U. S. Steel Corporation* kaj la Japana *Sony*.

*– Se tiel, kiel do povas okazi, ke geniuloj ofte troviĝas en malavantaĝa situacio?*

– Estas alia afero, ke la medio ne ĉiam traktas favore geniulojn. Sed kompreneble ni ne kulpigu nur la socion. Ni komprenu bone: ne estas facile inklinigi averaĝulon akcepti geniulon. Jam en la lernejo talentan infanon ofte elkomunumigas lia klaso. La instruistoj ne sukcesas atingi, ke la klaso ŝatu la talentulojn. Multfoje la instruisto mem ne rekonas la talenton, kaj eĉ malhelpas ĝian disvolviĝon. En plenkreskula aĝo tio okazas eble pli eksplicite.

*– Ĉu ne temas pri tio, ke geniuloj estas nekonformismaj kaj tro sentemaj, sekve ili alprenas pli akran kritikan sintenon?*

– Tio ne estas certa. Ne estas certe, ke ili havas en ĉiuj direktoj pli grandan senton de kritiko. Geniulo havas vere pensmanieron diferencan de la averaĝo, sed li ne ĉiam rivelas ĝin en interhomaj rilatoj, t.e. geniulo ĝenerale ofendas neniun. Male, kutime lin oni ofendas. La ofendon elvokas ne lia konduto, sed liaj atingoj. Kial ofendus homojn genia pentristo, genia muzikisto, genia ŝakisto? Ĉu pro tio, ke ili elstaras en sia fako?

*– Eble per tio, ke ili rompas ŝablonojn. La alipensado mem ne egalas al ofendo. Tio maksimume nur ĝenas, iritas aliajn. Se tiel estas, ankaŭ la geniulo devas tion akcepti kaj formi sian personecon konforme al tio.*

– Mi konsentas pri tio. Mi ne volas aserti, ke neniu geniulo havas misformitan personecon. Li povas esti tia, kaj tial oni tre atentu, ke li ne fariĝu tia. Oni starigu por li kiel celon la multfacetan disvolvadon de lia personeco kaj ankaŭ formadon de humanismaj trajtoj. Ankaŭ li mem devas kontribui al tio, t.e. lia memeduko devas efiki en ĉi tiu direkto. Mi ĉiam multe klopodis evoluigi ĉe miaj infanoj pozitivajn homajn ecojn. Tiuj kompreneble utilas ankaŭ en ilia laboro, en la efektivigo de ĉiam pli grandaj atingoj.

*– Ekzistas elstaraj ŝakmajstroj, kiuj havas misforman personecon. Flórián Tibor, internacia grandmajstro kaj majstrotrejnisto, kiu konas la Polgár-fratinojn kaj multajn aliajn junajn ŝakistojn, rimarkis: „Estas mirinde, kiel sanaj estas ankaŭ psike ĉi tiuj infanoj. Eĉ la eksterordinaraj atingoj ne difektis ilin, malsame al iliaj kolegoj, kies karakteron ne unufoje distordis la sukcesoj." Por ke la rilato inter la socio kaj geniulo restu relative sana, ambaŭ flankoj devas agi tiudirekte.*

– Sed unuavice la socio devas agi... Mi konsentas kun *Selye* János, kiu skribis: „La scienco floras, nur se ĝi radikas en socio respektanta la scion; jam multaj scienculoj forlasis sian patrolandon por trovi konvenan atmosferon." Pensu ekzemple pri la hungaraj!

*– Ĝenerale mi akceptas la etikan starpunkton, laŭ kiu, se du flankoj diskutas, ĉiam la pli fortan, pli multnombran flankon ŝarĝas pli da respondeco. Tamen ankaŭ la malplimulto, la geniuloj ne rajtas ion ajn fari, ankaŭ ilin ne eblas liberigi de la devo de toleremo. Ankaŭ ili devas posedi moralajn ecojn ebligantajn sanajn kontaktojn kun la socio.*

– Tio estas vera. Geniulo ne havu kapricojn de kinostelulino. Li ne kredu sin dio kaj aliulojn simplaĉuloj. Tio ja facile kondukus al subtaksado de aliuloj kaj neglektado de la laboro de aliuloj. Geniulo ne pufigu, tro reklamu sin, li ne estu monavida. Li ne volu regi. Cetere, geniuloj eĉ ne volas geniulan gvidadon. Nature, la socio bezonas esti gvidata de geniuloj. Geniuloj alkutimiĝis ĝuste al tio, ke ili servu, kaj, se necese, direktu – en la scienco aŭ sur aliaj utilaj kampoj.

*– Tion mi akceptas, kaj tio plie evidentigas la devon de la socio konsideri siajn geniulojn trezoro kaj ne balasto.*

– Mi aldonus: konsideri ilin etalono. Oni traktu ilin kiel atingendan normon. Ne estas indiferente, kian valorsistemon havas iu socio, ĉu ĝi starigas kiel celon provizi ĉiujn per propraj somerdometoj, luksaj artikloj



k.s. aŭ ĝi konsideras valoro la kreadon kaj orientas al kvalito kaj eminenteco. Se ĝi altrangigas verajn homajn atingojn, ĝi altigas per tio la rangon de la laboro.

*– La flego kaj prizorgo de talento, konvena taksado de geniuloj estas do unu el la kondiĉoj por la progreso de la socio.*

– Tiu socio atingas pli altan ŝtupon, kiu efektivigas ĝin pli perfekte. La alvoko „Eduku geniulon!" signifas ne nur pedagogian taskon. Ĝi devas iĝi ankaŭ socia celo.

„Ĉio, kion ni vidas realigita en ĉi tiu mondo, estas nenio alia ol ekstera rezulto, praktika realiĝo, enkorpiĝo de pensoj, kiuj vivis en eminentuloj tra la mondo; la animo de la tuta mondhistorio – ni rajtas aserti – estas ilia historio" – skribas T. *Carlyle*, la skotdevena angla historiisto kaj literaturhistoriisto.

## 4. ĈU LA INFANO FARIĜU ELSTARULO?

„La plej granda inter ĉiuj mirakloj estas, ke la efektivaj mirakloj povas esti naturaj, eĉ, ili devas iĝi tiaj."

G. E. *Lessing*

„Ne subiru la suno, sen ke vi faris ion!"

Latina dirajo

„Ni devas kredi, ke ni estas talentaj pri io, kaj ke tion ni devas nepre atingi."

M. *Curie*

*– Mi imagas al mi familion, kiu atendas kun senlima ĝojo sian unuan infanon, flegas lin kun senfina amo kaj kapablas ekirigi lin sur la nekonata vojo de geniedukado, kiu povus konduki ankaŭ al malsukceso...*

– En Hungario vere ne ekzistis ĉi-rilata sperto, sed ni havis kritikajn konojn pri tio, kiel malĝojiga estas la nuntempa lernejo. Sed el niaj legaĵoj ni sciis, ke pluraj eminentaj individuoj plenkreskis en famili-pedagogiaj kadroj, kiel privataj lernantoj. Nature, mi neniam konsideris ĉi tiun vojon kiel unusole taŭgan. Refoje mi emfazas, ke mi estas adepto de pedagogia plurismo. Mi ne riproĉas gepatrojn aŭ pedagogojn, kiuj ne iras mian vojon (pli aŭ malpli bonan, sed alian), mi ne rifuzas pedagogiajn eksperimentojn, diferencajn de la mia, kaj ne volas eksplode ŝanĝi la tutan hungaran lernejan sistemon. Mi kredas je pedagogia multfaceteco, kaj ene de ĝi komprenebla ankaŭ je mia propra metodo.

*– Tamen nun vian eksperimenton, konatan pli detale nur de amika rondo, kaj la bazajn principojn de via pedagogia sistemo vi publikigas kaj tiel transdonas al la internacia faka publiko.*

– Jes, ĉar mia famili-pedagogia eksperimento venis en stadion, kiam la vojo farita ĝis nun iĝis teorie ĝeneraligebla, kaj la rezultoj pruvis la ĝustecon de miaj konceptoj. Sed ankaŭ la alia flanko, la faka mondo turniĝis al ni almenaŭ kun scivolemo.

Mi opinias, ke sur ĝusta vojo iras ankaŭ tiuj, kiuj klopodas enkonduki en la kadroj de la nuna lernejo diversajn reformojn kaj eksperimentas per la t.n. diferenciga instruado direkte al talentoflegado. Sed ĉi tiu vojo, kvankam pli bona ol la antaŭaj, ne sufiĉas. Laŭ mia opinio oni povas nun transiri al la organizita instruado (inter konsciaj kaj instituciaj kadroj) de vere elstare kapablaj infanoj, nomataj de mi geniuloj. Tial ke tiurilate eĉ internacie estas



malmulto farita, transdonante miajn spertojn, mi celas unuavice ĉi tiun terenon.

*– En kia formo vi antaŭvidas la geniedukadon?*

– Mi konsideras realigeblaj du formojn de organizita geniedukado (kaj ene de ĝi plurajn variantojn):

*1)* Unu el ili estas la famili-pedagogia aŭ alivorte privatlernada formo. Oni povas tiel labori pri propraj aŭ adoptitaj infanoj (aŭ pri ambaŭ). En ĉi-lasta kazo eĉ pluraj familioj povas kunlabori kaj kompletigi la edukatan rondon per infanoj el aliaj familioj.

*2)* La alia formo estas la specialigita genieduka faklernejo. Unu varianto povus esti

– la lernohejmo, kie la infanoj loĝos daŭre,
– la alia: lernohejmo kun familia fono.

La familia pedagogio (alivorte: la sistemo de privataj lernantoj) estas historie tre malnova. Kiam mi esploris ĉi tiun problemon kaj kolektis materialon, mi renkontis tre multajn tiajn kazojn. Mi diras nur kelkajn ekzemplojn. En libro pri la familio *Mendelssohn* oni povas legi, ke sen la patro la filo Felix *Mendelssohn* neniam povus iĝi tio, kio li fariĝis. La patro sentis, ke li ne plenumas siajn patrajn devojn, eĉ dungante la plej eminentajn instruistojn por la filo. Lia edukmetodo estis eksterordinare rigora. Lia baza principo sonis jene: ĉiu atingo reprezentas nur unu ŝtupon en la evoluo, ĉio bona povas iĝi eĉ pli bona. La mesaĝo de lia pedagogio estas: la edukado de infanoj neniam finiĝas; kaj la gepatroj, dum ili vivas, neniam ĉesu esti konsilantoj kaj „kondukantoj" de siaj gefiloj.

Pri Yehudi *Menuhin* mi legis, ke por liaj gepatroj la naskiĝo de filo kaj disvolvado de lia talento signifis kun memkomprenebla natureco, ke sian vivon ili subordigu al la kariero de la filo. La patro forlasis en 1928 sian bele progresantan pedagogan karieron, por ke la familio povu kune vivi kaj li povu organizi la koncertojn de Yehudi.

*– Ŝajnas al mi, ke tiu situado ripetiĝis kvazaŭ ovosimile ĉe vi... Antaŭ dek jaroj vi kaj via edzino forlasis la instruistan postenon.*

– Ne hazarde mi menciis, ke antaŭ la naskiĝo de miaj filinoj mi studis la fakliteraturon kaj troviĝis sub ties influo. Eĉ sendepende de tio mi reprezentas la starpunkton, ke oni plifirmigu la rolon de la familio en la socio, kaj propagandu, instigu ĝian laboron en la sfero de edukado. Oni ne transdonu ĉiujn funkciojn al la lernejo. Krome, se troviĝas familioj maturaj, kapablaj je edukado kaj samtempe oferpretaj, oni instigu, subtenu tian familian pedagogion, laborantan ĉu por propra, ĉu por adoptita infano. Nome, la familio kreas kaj certigas la unuan interagadan kampon por la

infano. La familianoj fariĝas la unuaj modeloj por la infano. En la kadroj de la familio konturiĝas la koncepto de identeco (memkonscio) de la infano.

Tre favoras la evoluon de escepte kapablaj infanoj, se la ambicio de la gepatroj direktiĝas al tio, ke ili eduku lin elstara homo. En ĉiuj tiuj okazoj, kiam ni renkontas tre fruan riveliĝon de esceptaj kapabloj, konstateblas, ke aŭ la gepatroj, aŭ aliaj personoj (plej ofte pedagogoj, trejnistoj) penis rekte disvolvi tiujn kapablojn. Laŭ la renoma germana pedagogo Hermann *Noch*, la bazo de edukado de escepte kapablaj infanoj estas „la pasia rilato de matura homo al formiĝanta homo – favore al ĉi-lasta". Komence la rilato estas tiel intima, ke la amo determinas la imitadon de la modelo kaj la plenumadon de taskoj.

Cetere, la amo ege gravas. Estas konata la Sokrata anekdoto, ke foje la majstro resendis al la patro junulon rekomenditan por lernado ĉe li. Demandite, kial li faris tion, Sokrato respondis: „ĉar li ne amas min sufiĉe".

*– Se mi bone komprenas viajn pensojn, la komenca tasko de la edukado konsistas ne en tio, ke la gepatroj malkovru la talenton kaŝitan en la infano kiel subtera rivereto, sed en tio, ke ili direktu, orientu lin per bona metodo al la elektita specialiĝo.*

– Jes, laŭ mia principo oni ne provu trovi la talenton, sed elektu taŭgan pedagogian metodon por disvolvi la talenton.

La unua trajto de la geniedukado – mi povus diri, la plej grava novaĵo, distinganta ĝin de la nuntempa instruado – kaj ĝia nepra premiso estas la frua specialiĝo direktiĝanta al unu konkreta tereno. Ja veras, kion Homero skribis: „Homo ne povas esti sperta pri ĉio, unua en ĉio." Pro tio la specialan terenon elektu la gepatroj laŭ sia bontrovo. Gravas nur, ke jam frue, en la aĝo de 3–4 jaroj estu elektita iu fizika aŭ mensa tereno, kaj la infano ekiru sur tiu vojo.

*– Kiel vi resumus la esencon de specialigita edukado?*

– Intensa instruado sur la elektita kampo de speciala agado. Miaj filinoj venis ekz. sur la kampon de la ŝako, kio signifas, ke ekde ilia 4–5-jara aĝo ili ŝakludis 5–6 horojn ĉiutage.

*– Kiujn aliajn terenojn oni povas ankoraŭ elekti laŭ via opinio?*

– Iun ajn. Se iu volas fariĝi muzikisto, li devas okupiĝi 5–6 horojn pri muziko, se fizikisto, tiam pri fiziko, se lingvisto, do pri lingvoj. Inter la kondiĉoj de intensa instruado la infano baldaŭ eksentas la scion, perceptas la memstarecon, atingas sukcesojn, kaj post nelonge kapabliĝas memstare apliki siajn konojn. Ni prenu ekzemple la lingvolernadon. Ni supozu, ke iu vizitas kursejon por interpretistoj en la lernejo por geniuloj, kie li okupiĝas 5–6 horojn pri la unua fremda lingvo, laŭeble pri Esperanto. (Kial ĝuste pri



ĉi tiu lingvo, mi klarigos poste.) Post kelkaj monatoj li jam korespondas kun eksterlandaj infanoj, partoprenas renkontiĝojn en- kaj eksterlandajn – ankaŭ pli longdaŭrajn –, kie li travivas seriozajn sukcesojn tiamaniere, ke li flue konversacias en la jam ellernita lingvo. Ĉu agrabla sento por la infano? Agrabla. Ĉu utile por la infano? Utile. Ĉu utile por la socio? Utile. En la sekva jaro oni povas fari la samon per la sekva fremda lingvo – ni diru: per la angla – kaj en la postsekva denove per alia.

La samo validas por iu ajn tereno de la vivo. Tiamaniere la infano fakte ĝuas, kion li faras, ĉar li vidas, ke tio havas sencon. En la nuntempa lernejo la lernanto ne konscias, kial li lernas. Sed en la genieduka lernejo la infano scias, ke post kelkaj monatoj li parolos Esperanton, en la sekva jaro la anglan, en la postsekva la germanan ktp. Aŭ sur la kampo de ŝakludo: en la unua jaro li ludas je la nivelo de la tria kategorio, post la tria jaro je tiu de la unua, post la kvina jaro jam kiel majstrokandidato, post 6–7 jaroj kiel majstro, post 8–10 jaroj kiel internacia majstro, post la 15-a jaro kiel grandmajstro. La infano tiel vidas la celon kaj sencon de sia laboro.

*– Kompreneble ankaŭ ĉi tie nepra kondiĉo estas, ke la pedagogo intense okupiĝu pri la infano.*

– Ĉe la geniedukado necesas, ke la pedagogo (ĉu la gepatroj, ĉu profesia pedagogo aŭ trejnisto) staru en rekta, konstanta kaj intensa kontakto kun la infano. Pro tio imageblas nur 10–15-membra grupeto. Praktike devas elformiĝi intensa kunlaborula kontakto inter la infano kaj plenkreskulo, en kiu la infano ne sentu sin „subulo". Pripensu, kiel avantaĝe estas, se la infano konscias jam en la aĝo de 10 jaroj, ke ankaŭ li scias multe, ke li estas samvalora homo kiel la plenkreskuloj, ĉar en lia vivo ekzistas almenaŭ unu tereno, kiun li regas tiel aŭ eĉ pli bone ol la plenkreskuloj.

*– Ĉu la infano havas do en la geniedukado ankaŭ poziciajn avantaĝojn?*

– Jes. Laŭ la usona socipsikologo Kurt *Lewin* observeblas evoluo de retrokupla kaŭza interrilato inter kapabloj kaj medio. Por talenta infano ekz. ne malmultaj avantaĝoj originas el tiuj specialaj favoraj kondiĉoj de la ĉirkaŭaĵo, kiujn li mem elbatalas por sia estonteco. Ekzemple, se la kostojn de la instruado, vojaĝoj, aĉeto de fakliteraturo kovras iu patrono. Al tio aldoniĝas ankaŭ psikologiaj avantaĝoj.

*– Troviĝas homoj, kiuj opinias, ke per la frua specialiĝo vi propagandas ian mallarĝvidan fakbarbarecon.*

– Tute ne. La psikologio kaj pedagogio bone konas la fenomenon de „transfero" (transigo). Elformado de kapablo sur iu tereno havas tiel ĝeneralan valoron, ke ĝi facile
taŭgigas la homon por alpropriĝi aliajn fakterenojn. Transfero signifas, ke la infano ellernas lerni, alproprigas la kapablon de lernado.

La specialiĝo havas kompreneble nur relativan sencon, laŭenhave ĝin ĝenerale akompanas multflankeco. Se iu preparas sin ekzemple por komputila programado, li devas lerni matematikon, komputikon, fremdajn lingvojn; krome li certe vojaĝos tra la mondo, renkontos eminentajn personojn de la publika vivo, sportos, faros kulturan agadon ktp. Kial tio estus malvasteco? Zsuzsa parolas 7 aŭ 8 fremdajn lingvojn, vojaĝas eksterlanden, verkas artikolojn kaj librojn, analizas ŝakpartiojn, tablotenisas, naĝas ktp.

Cetere, oni interpretu korekte la unudirektan evoluon. Kvankam unudirekteco signifas enprofundiĝon, penetron en profundon kaj alton, tamen ĝi tute ne unuflankigas la tutan personecon. Estas vere, ke la geniedukado specialigas la infanon sur unu tereno, sed tio ne signifas rezignon pri ĉiuj aliaj terenoj. Unudirekteco ne egalas al unuflankeco, samkiel ĝia inverso, la multdirekteco ne estas per si mem multflankeco. Unudirekteco povas pariĝi kun multflankeco, dum multdirekteco povas esti ankaŭ nulflankeco, aŭ nur hipokriteco, malantaŭ kiu kuŝas nula scio. Multflankeco povas signifi ankaŭ faktan kompetentecon pri nenio aŭ snobecan „kompetentecon". Kiel *Seneko* diras: „Kiu ĉie ĉeestas, nenie troviĝas."

Oni povas facile konvinkiĝi, ke mia sistemo pli proksimigas la homon al kiel eble plej vasta multflankeco, ol la nuntempa lernejo, kiu kondukas pli verŝajne al grizeco kaj mezeco.

– *Do la specialiĝo, proponita de vi, entenas la bazan multflankecon de nia tempo, la kompleksecon de la personeco.*

– Jes. La geniedukadon oni devas kunligi kun la kompleksa edukado de la personeco, kaj ene de ĝi kun la formado de emociaj kaj moralaj valoroj. En la geniedukado tio estas tasko samgrava kiel la frua specialiĝo. Dum la nuntempa lernejo ne povas plenumi sian taskon de edukado pro la granda nombro da infanoj kaj studobjektoj, dum por ĝi la edukado restas nur slogano, por la geniedukado validas la formado de kompleksa personeco kiel baza postulo, baza kondiĉo. Interalie pro tio, ke la laborrilato inter pedagogo kaj edukato estas tre intima. Ĉi tiu „ĉeesto" mem edukas ankaŭ spontanee, sed ĝi kompletiĝas per celkonscia, laŭplana programo. Oni devas prepari sin por la edukado de infanoj same konscie, kiel por la fakinstruado.

– *Eble ĝi estas eĉ pli malfacila tereno!*



– Jes, ĉar sur ĉi tiu tereno la pedagogiaj tradicioj estas pli malriĉaj, kaj la tasko mem nemezureble pli komplika. Ne troviĝas pli kompleksa, multfaceta materiformo, ol la homa psiko. Inter la celoj de la edukado mi kaj mia edzino konsideris plej gravaj unuavice la elformadon de la sekvaj trajtoj: kredo, kuraĝo, fortosento, persisto, entuziasmo, objektiva taksado de personoj kaj objektoj, kontraŭstaro al malsukceso kaj ankaŭ al la tentoj de sukceso, insista strebado al la celo, pacienco, inventemo, tolero de kritiko eĉ tiam, se ĝi malpravas, kapablo liberiĝi disde streĉoj, elteni konfliktojn (plialtigo de la nivelo de frustradtolerado), disciplino, planado, bezono de streĉita laboro, altiriĝo al mensa ŝarĝiĝo, granda emo al laboro, avido je atingoj, starigo de realaj celoj, konscia direktado de ripozo, liberiĝo disde ŝablonoj, serĉado de novaj vojoj, sinvenigo en konvenan humorstaton (bona humoro, trankvilo kaj batalemo samtempe).

Krome ni celis ankaŭ tiajn valorojn, mondkonceptajn kaj moralajn normojn, kiel amo al la fratinoj, gepatroj, pedagogoj, respekto al pliaĝuloj, maljunuloj, reala taksado de samaĝuloj kaj plenkreskuloj, kaj ke la infanoj ne preferu la plezurojn de la fizika vivo, la simbolojn de la socia rango al la krea laboro ktp. Lige kun tio mi volas aparte paroli pri la pozitiva vanteco. Ni diris al niaj filinoj, ke ili lernu diligente, ĉar tiel ili kapabliĝos je grandaj atingoj. Ni atentigis ilin, ke samtempe povas ekzisti nur unu mondĉampiono, do ili starigu kiel celon fariĝi bonaj ŝakistoj, sportiste indaj, honestaj homoj. Ili konsciu siajn kapablojn kaj elbatalu, kio apartenas al ili, sed neniam damaĝu aliulojn. (Bedaŭrinde sufiĉe da frapoj, doloroj ili ricevis jam de la vivo por kompreni tion.) Ili havu memrespekton, konu la proprajn kapablojn, sed ili ne deziru roli kiel steluloj.

Grava funkcio de la geniedukado estas la kapabligo por memedukado. Ĝi komenciĝas per tio, ke ni estigas en la infano memstaran interesiĝon kaj memstaran interesitecon. Iom post iom ni kapabligas ilin je memklerigo, memedukado, memstareco kaj krea laboro. La pedagogo-kunlaboranto ja ne povas ĉiam esti apude. Do unu el la plej gravaj edukaj taskoj estas: edukado al memedukado. Ĉi-lasta kontribuas interalie, ke la infano ŝatu, kion li faras, ke en lia vivo ne apartiĝu la laboro disde la hobio.

– *Kia estu, laŭ via opinio, la rilato de la infano al la samaĝulaj grupoj?*

– La nuntempa psikologia kaj pedagogia fakliteraturo emfazas unusence la gravecon de la samaĝula grupo. Sed en mia pedagogia koncepto ĝi ricevas iom alian akcenton. Laŭ mi, por la infano gravas unuavice ne tio, ke li havu laŭaĝe konvenajn kunulojn, sed prefere spirite (mense) taŭgajn partnerojn, amikojn indajn je la nivelo de liaj intelektaj kapabloj. Se la

societaj rilatoj de la infano limiĝus ekskluzive aŭ grandparte al samaĝulaj grupoj, tio malrapidigus la progreson de la escepte kapabla infano.

*– Ofte oni starigas la postulon, ke infano ne restadu tro longe inter plenkreskuloj.*

– Tio estas malavantaĝa nur, se la intelektaj niveloj tro diferencas, kaj se la rilato inter infano kaj plenkreskulo ne konvenas, ekz. se la plenkreskulo ĉion altrudas al la infano, do se li forprenas ties memstarecon, iniciatemon. Sed se li klopodas progresigi ĝuste ĉi tiujn trajtojn ĉe la infano, tio ne damaĝas, sed male, utilas. Per tio mi ne volas diri, ke la infano devas esti ĉiam en societo de plenkreskuloj. Oni devas trovi la ĝustan proporcion de restadoj inter plenkreskuloj kaj samaĝuloj. Mi kredas decida tion, ke li pasigu sian tempon en la societo de tiuj, kiuj havas similan nivelon de intelekto, samajn interesiĝojn, kaj bone sentas sin en tiu interkontaktiĝo.

Jen konkreta ekzemplo de Zsuzsa. Se en la aĝo de 13 jaroj ŝi estus ŝakludinta nur kun 13-jarulinoj, kiuj estis pli malfortaj ol ŝi je pluraj kategorioj, tio estus, laŭ mi, tute malutila por ŝi. Ankaŭ por ŝiaj partneroj ne estus agrable esti „nokaŭtitaj" en ĉiuj partioj. Zsuzsa mem ne estus profitinta el la afero, ĉar ŝi bezonis partneron ludantan similnivele, kaj tiaj troviĝis nur inter plenkreskuloj.

Tamen tio ne kaŭzis zorgojn, la aĝodiferenco mem ja ne malhelpas estigi eĉ amikajn rilatojn kun aliuloj, do havi samtempe bonan amikon kaj bonan kunlaboranton. Cetere, la amikeco ofte fontas el kolegaj rilatoj. Oni tiel faras samtempe la hobion kaj laboron.

*– Vi edukis el ĉiuj tri filinoj ŝakgeniulon. Kial? Ĉu ili inklinis al tio, aŭ vi kondukis ilin en ĉi tiu direkto?*

– Kiel mi diris, principe edukeblas intelekta kapablo de ajna direkto; per taŭga metodo formeblas geniulo sur iu ajn tereno. El la vidpunkto de la pedagogia eksperimento estus evidente pli forta atuto, se mi estus edukinta ilin sur tri diversaj terenoj (ekzemple matematiko, ŝako, muziko), antaŭanoncinte tion. Certe ankaŭ tio estus sukcesinta. Sed mia tiama financa situacio kaj disponebla tempo ne permesis tion. Tiam la tri infanoj estus bezonintaj tri instruistojn-trejnistojn, ĉiutage ni devus iri kun ili al tri diversaj lokoj, ni devus aĉeti pianon, faklibrojn pri muziko, ŝako kaj matematiko ktp. Do laŭ nia sistemo solveblis pli facile la lernado, ĉi-maniere la infanoj formas unu teamon; kaj kio plej gravas: la familio povas pli multe kunesti. Mi atribuas al la familio centran rolon, kaj tre ĝojigas min, se la familio multe kunestas.

*– Ĉu ne estas malavantaĝe, ke ĉiuj tri infanoj specialiĝis sur la sama tereno?*



– Apud la avantaĝoj preskaŭ vanuas la malavantaĝoj. Estas vere, ke kelkaj psikologoj ne proponas ĉi tiun vojon opiniante, ke la infanoj fariĝos ĵaluzaj, enviaj – poste eĉ malamemaj. Sed tio ne okazas ĉe ĝusta edukado.

*– Ĉu vi rakontus, kiel vi imagas unu tagon de genieduka lernejo?*

– Eble jen tiel:

- 4 horoj da speciala studobjekto (ĉe ni: ŝako)
- 1 horo da fremda lingvo. En la unua jaro Esperanto, en la dua la angla, en la tria laŭvole elektita. En la stadio de la komenca, t.e. intensa lingvoinstruado necesas plinombrigi la studhorojn al tri – malfavore al la speciala studobjekto – dum 3 monatoj. Somere: studvojaĝo eksterlanden
- 1 horo da ĝenerala studobjekto (gepatra lingvo, natursciencaj kaj sociaj konoj)
- 1 horo da komputiko
- 1 horo da moralaj, psikologiaj, pedagogiaj konoj (interalie humurinstruado, ĉiuhore 20 minutoj da ŝercrakontado)
- 1 horo da gimnastiko, libere elektebla, solvebla ankaŭ individue, eksterlerneje. La divido de horoj kaj studobjektoj trakteblas kompreneble elaste.

*– Ĉu vi akceptus laboron en simila genieduka lernejo?*

– Se vi demandas, ĉu mi kredas je ties sukceso – tiam jes. Sed ĉu mi praktike entreprenus ion tian, tio dependus de la kondiĉo, ĉu mi ricevus sufiĉan socian subtenon. Ĉar temas ne nur pri tio, ke mi laciĝis pro la ĝisnunaj multnombraj bataloj, sed ankaŭ pri tio, ke por la pedagogoj partoprenantaj en la geniedukado tre gravas la trankvilo kaj fido. Sen tio la laboro ne progresas. Se oni devas disputi senĉese kun la gazetaro, kun diversaj aŭtoritatoj, saĝumantaj – sed agi ne kapablaj – pedagogoj kaj psikologoj, defendi sin kontraŭ ili, tio damaĝus la laboron. Por mi sufiĉis unufoje tia milito. Aliflanke, kelkajn jarojn mi devos ankoraŭ koncentri min ankaŭ al la plua evoluo de miaj filinoj.

*– Vi faris pioniran laboron kun ties riskoj kaj ŝarĝoj. Vi prenis sur vin ne simple pionirecan, sed partizanan militon.*

– Povas esti. Malgraŭ tio mi opinias, ke la metodo de geniedukado skizita de mi ne estas tro komplika strukturo. Do oni ne devus tiel timi ĝin, kiel oni nun faras aŭ kiel timinda ĝi nun ŝajnas.

## 5. ESPERANTO: UNUA STADIO DE LERNADO DE FREMDAJ LINGVOJ

„Sur la tuta tero estis unu lingvo kaj unu parolmaniero."

Genezo 11.

„Tuta cento da plej grandaj elpensoj ne faros en la vivo de la homaro tian grandan kaj bonfaran revolucion, kian faros la enkonduko de lingvo internacia!"

L. L. *Zamenhof*

„Nenian privilegion al iu ajn nacio, al iu ajn lingvo..."

V.I. *Lenin*

– *Antaŭ la plua prezentado de via pedagogia sistemo permesu al mi iom deflankiĝi. Mi scias, ke la tuta familio parolas Esperanton. Ĉu vi elektis ĝin hazarde? Aŭ ĉu ĝi funkcias kiel helprimedo por ŝakludado? Eventuale kiel parto de via pedagogja sistemo?*

– Kaj la unua, kaj la dua, kaj la tria. Sed la plej gravan vi ne menciis. Por mi Esperanto estas humanisma valoro, kiu krom esti batalilo kontraŭ rasa, genta kaj nacia diskriminacioj, rolas ankaŭ kiel rimedo kontraŭ lingva malegaleco. Ĝi konsistigas unu el la eblaj manieroj batali por la egaleco, samrajteco de la popoloj.

– *Se la afero tiel evidentas, kial ne disvastiĝis ĉi tiu lingvo en pli vasta rondo?*

– Ties kaŭzo estas – krom antaŭjuĝoj – precipe de ekonomia naturo. La homaro devas longe batali por ĉiu progresiga ideo. La neceso emancipi la virinojn evidentas, same kiel la nepreco atingi la egalecon de la rasoj, tamen neniu el tiuj efektiviĝas facile. Por mi ankaŭ la geniedukado estas tute memkomprenebla, malgraŭ tio multaj homoj tamen havas antaŭjuĝojn koncerne ĝin. Samo validas ankaŭ por Esperanto. Parto de la homoj bone sentas sin inter la cirkonstancoj de la „Dia puno". La Babela konfuzo signifas por ili agrablan vivmedion. Ekzistas ankaŭ tiaj, kiuj per ŝvitiga laboro ellernis 2–3–4 fremdajn lingvojn kaj malvolonte cedus sian akiritan pozicion. Je alia ebeno: la ekonomie kaj politike regantaj nacioj volas regi ankaŭ lingve – tio rilatas en la nunaj cirkonstancoj precipe al la angla –, kaj evidente ili ne voĉdonus por Esperanto. Monopolo de iu aŭ alia historia-nacia lingvo signifas samtempe ankaŭ la diskriminacion de popoloj kaj



lingvoj. Kaj male, neŭtrala lingvo, ligita al neniu nacio, esprimus la lingvan egalecon de la popoloj. Pro tio mi konsideras humanisma batalo la klopodojn enkonduki Esperanton. Laŭ mia koncepto la lingvo de ĉiu nacio samvaloras el kvalita vidpunkto, pro tio ne estu lingva hierarkio inter ili.

– *Ĉu vi opinias, ke la historiaj lingvoj ĉesos post pli-malpli longa tempo?*

– Ne! Mi pensas ĝuste kontraŭe: se la lingvoj de ĉiuj nacioj samvaloras, tiam ĉiuj povas uzi kiel unuan sian propran lingvon. Sed kiel dua lingvo, kiel kompletigo ekzistu sendependa, neŭtrala lingvo, kiu povus plenumi la funkcion de ponto inter la diversaj nacioj. „La homa parolo bezonas du lingvojn – diris la eminenta hungara verkisto *Karinthy* Frigyes. – Unu por la nacio, familio, arto, sinesprimo kaj unu por servi la komunumon, homaron, mondon, interkomunikadon."

– *Ĉiuj akceptas, ke necesus unu aŭ pluraj komunaj lingvoj. Sed kial ĝi estu artefarita lingvo, Esperanto, kial ne la angla, rusa aŭ ĉina?*

– La angla estas sendube la internacie plej disvastiĝinta lingvo, kaj mi rekomendas al ĉiuj lerni ĝin. Post Esperanto! Hodiaŭ tiel estus nature. Ĉar la anglan parolas en la plejmulto de la landoj nur malvasta tavolo da homoj, kaj eĉ ili ĝenerale tute ne perfekte. Ĝia ellerno postulas multe da tempo kaj energio, do ĝi apenaŭ povus iĝi mondlingvo por grandaj amasoj, por la simplaj, ne sufiĉe eruditaj socitavoloj. Ĝi prezentus neakcepteblan malavantaĝon por personoj loĝantaj ekster anglalingvaj regionoj, kaj ĝi superpezus la ne-anglalingvajn kulturojn.

Kial ĝuste Esperanto elektiĝu kiel mondlingvo, estas facile pruvi teorie. Esperanto estas el pedagogia kaj socia vidpunktoj konscie planita, kreita lingvo. Ĝi fariĝis vivanta lingvo, kiu havos, eĉ nun jam havas tradicion. Ĝi havas pasintecon, estantecon kaj futuron. Inter la ekzistantaj planlingvoj ĝi pruviĝis sendube la plej bona, plej celkonforma. Logika, facile ellernebla kaj kapabla esprimi ĉiajn nuancojn, ĝi povas funkcii kiel komunikilo de internacia komunumo, kaj taŭgas por disvastiĝi amase. Ĝi povas fariĝi komuna dua lingvo por la amasoj. Lev *Tolstoj* skribis: Esperanto „tute plenumas la postulojn de internacia lingvo... Mi laŭpove penos disvastigi tiun lingvon kaj, kio estas la ĉefa, konvinki ĉiujn pri ĝia neceso."

– *Kial vi pledas tiel unusence por Esperanto?*

– Ĉar la planlingvo de L. L. Zamenhof (1859–1917) estas el logika kaj lingva vidpunktoj perfekta: ĝia gramatiko estas klara, travidebla, sen esceptoj, kaj samtempe kapabla ĉion esprimi. Ĝia sintakso estas facila. Zamenhof, kiu bone konis la rusan, jidan, germanan, polan, hebrean, francan, anglan, latinan kaj grekan lingvojn, kreis ĝin ne el artefaritaj,

elpensitaj vortoj, sed el la vivanta vortostoko de la latinidaj, ĝermanaj kaj slavaj lingvogrupoj kaj internaciaj vortoj. Tial ĝia vorttrezoro ŝajnas „konata" al multaj parolantoj de aliaj lingvoj. Foje, argumentante por Esperanto, mi eldiris kiel decidan kaj sufiĉe efikan pruvon: „Nun mi diros al vi kelkajn frazojn, certe vi komprenos ilin." Kaj vere okazis tiel.

– *Diru kelkajn tiajn frazojn!*

– „Esperanto estas internacia, simpla kaj logika lingvo. La ŝako estas ludo, scienco, arto kaj sporto. Zamenhof estis genia homo. La nova libro estas interesa." Verŝajne ne necesas traduki ilin. Ekkoni ĉi tiun lingvon gravas ankaŭ pro tio, ĉar ĝi estas kvazaŭ logika ludo, ekzerco de logiko. Ne hazarde konstatis la Franca Akademio de Sciencoj jam en 1924: Esperanto estas la majstroverko de logiko kaj simpleco.

– *Ĉu dank' al tio ĝi estas avantaĝa el pedagogia vidpunkto?*

– Jes. Ĝia vorttrezoro facile ellerneblas, ĝia gramatiko rapide alproprigeblas. Ĝia ortografio estas fonetika kaj ĝia prononco melodia. Ĝi ellerneblas almenaŭ dekoble pli facile ol alia lingvo, krome ĝi servas kiel fundamento, sur kiu konstrueblas aliaj lingvoj.

Ĉi-rilate menciendas la esploroj de la usona psikologo kaj pedagogo *Thorndike,* kiu efektivigis longdaŭrajn kaj amasajn eksperimentojn en diversaj lernejoj. Unue oni instruis Esperanton en diversaj nombroj da instruhoroj kaj diversnivele, poste oni komencis la francan, inter similaj kondiĉoj. El la rezultoj de la eksperimento *Thorndike* elstarigis la grandan pedagogian signifon de Esperanto; la alproprigo de Esperanto ja pruviĝis 15-oble pli facila ol tiu de la alia fremda lingvo, t.e. ĝia instruado estis tiomoble pli efika.

Krome pruviĝis, ke la tempo, dediĉita al Esperanto, abunde repagiĝas ĉe la ellernado de la sekva fremda lingvo. Estas ĝenerale konate, ke la posedo de unu fremda lingvo plifaciligas la alproprigon de la sekva lingvo. Dum por la solida ellerno de fremda etna lingvo (ekzemple la angla) necesas ĉirkaŭe 2000 horoj, por tiu de Esperanto nur 200. Se la scio de Esperanto mallongigas la tempon dediĉitan por alproprigi la anglan, nur je 20% (la ĝisnunaj spertoj tion konfirmas), tiam por la du lingvoj kune ni bezonas dediĉi sume 200 +1600 = 1800 horojn, do malpli da tempo, ol se ni ellernus nur la anglan.

Mi proponas efektivigi tion precipe nun, kiam ni transiras de la rusa lingvo, ĝis nun deviga en la hungara lerneja instruado, al aliaj lingvoj. Jen eblo por tio, ke la registaro kaj la gvidantoj de edukaj instancoj rebonigu kion ili preterlasis, kaj enkonduku la elekteblon de Esperanto – kompreneble tiel, ke ili faru la tiucele necesan propagandon. Tio estus utila



ankaŭ por la instruistoj, ĝi povus ja iĝi evidenta kaj rapida solvo por trejni la ĝisnunajn instruistojn de la rusa lingvo al nova lingva fako.

Permesu al mi mencii ankoraŭ unu pedagogian vidpunkton. La relative rapida sukceso en la lernado de Esperanto povus kontribui al la forigo de la sento de malplivaloro kaŭzita de la supozo de la lernanto, ke li ne kapablas lerni lingvojn, kaj ankaŭ al la superado de lingvaj inhiboj. Esperanto venigas la infanojn al rapida sukcesosento sur la tereno de lingvolernado. Se Esperanto rolus en la lernejo nur kiel logika ludo, eĉ tiam valorus enkonduki ĝin kiel devigan studobjekton.

– *En kio konsistas la kultura-movada karaktero de Esperanto?*

– Esperanto estas ne nur lingvo, sed simbolo de la lukto por lingva egaleco kaj ankaŭ movado kun tre vasta reto de internaciaj organizaĵoj, kongresoj, renkontiĝoj, konferencoj. Oni aranĝas eĉ infankongresetojn. Preskaŭ ĉiu grava faktereno havas propran tutmondan organizaĵon, tiel ankaŭ la ŝako.

Esperanto estas samtempe ankaŭ spontanea komunuma movado. Ekzemple, la aliĝintoj al la Pasporta Servo disponigas reciproke senpagajn tranoktejojn en 50 landoj de la mondo. Esperanto igis ankaŭ lingvo de sciencistoj kaj turistoj.

– *Ĝi estas sendube multflanka lingvo, tamen ĝi ankoraŭ ne trarompis la menciitajn barojn. Ĉu ĝi eble ne sufiĉe taŭgas por beletro?*

– Ĝi certe taŭgas! En ĉi tiu lingvo oni povas esprimi ĉiajn nuancojn, ĉiajn sentojn. Multajn verkojn de la mondliteraturo oni jam tradukis en Esperanton, kaj ĝi havas eĉ propran literaturon. Permesu al mi listigi nur kelkajn indikojn. Proksimume en cent lingvoj aperis lernolibroj de Esperanto. Pli ol cent nombras la Esperantaj fakvortaroj. En multaj landoj funkcias radioelsendoj en Esperanto. La nombro de Esperantlingvaj libroj sumiĝas al pluraj dekmiloj, kaj ekzistas plurmiloj da originalaj Esperantaj verkoj. Ĉirkaŭ cent gazetoj aperas ĉiumonate en Esperanto. Ankaŭ mi aperigis pedagogian traktaĵon en Esperanto, kaj el ĉi tiu lingvo oni tradukis ĝin en plurajn naciajn lingvojn.

– *Kiel interrilatas Esperanto kaj la ŝako?*

– Laŭfunkcie, kompreneble, ili ne interrilatas. Sed pro la fakto, ke ili ambaŭ baziĝas sur pura logiko kaj artaj travivaĵoj, kreiĝas simileco inter ili; krome ili ambaŭ proksimigas homojn kaj naciojn unu al alia. Cetere, kelkaj ŝakproblemoj publikiĝis jam en 1892 en la gazeto „La Esperantisto". Ekde la 20-aj jaroj regule eldoniĝis ŝaklibroj ankaŭ Esperante. Dum la Budapeŝta kongreso de la Internacia Ŝak-Asocio *(FIDE)* en 1926 oni proponis uzi Esperanton por organizaj aferoj. Tiun proponon oni ne akceptis, sed la

asocio alprenis la starpunkton, ke kvankam Esperanto ne fariĝos ĝia oficiala lingvo, ĝi tamen pretas kunlabori kun la movado. Ekde tiam la kontaktoj restis intimaj. Ekzemple eksterlande mi preskaŭ neniam ĉeestis konkurson sen renkonti esperantistojn inter la organizantoj, konkursantoj aŭ la publiko. Mi povas aldoni, ke ne nur ŝakistoj, sed ĝenerale ankaŭ sportistoj subtenas Esperanton. En la jaro 1965 ĝuste grupo de hungaraj sportistoj – inter ili tiaj homoj, kiel *Papp* László, *Kárpáti* György, *Balczó* András, *Sidó* Ferenc, *Szepesi* György, *Gyarmati* Dezső, *Zsivótzki* Gyula k.a., do plej elstaraj hungaraj olimpikuloj – petis, ke Esperanto fariĝu oficiala lingvo dum la olimpiaj ludoj.

*– Vi tute entuziasmiĝas, parolante pri tio. Evidente temas pri io plia ol nuraj logiko kaj racio. Mi scias, ke vi estas fortika kolono, membro de la kuratoraro de la fondaĵo „Talento" subtenanta la Esperantan kulturon kaj kleriĝon.*

– Jes, kaj kompreneble mi volonte transdonas miajn verkaĵojn, spertojn kaj ideojn al institucio, kies fonda dokumento entenas interalie jenon:

- evoluigo de la talento de infanoj je alta nivelo,
- disvastigo de la lingvo Esperanto, diskonigo de la ĉi-rilata pensmaniero kaj kulturo,
- medioprotektado, praktika realigo de medioprotektema edukado laŭ la principo „pensi tutmonde, agi surloke".



# III. LA ŜAKO

## 1. KIAL LA ŜAKO?

„Kiu opinias ĝin nur arto, estas malbona ŝakisto! Kiu opinias ĝin nur sporto, estas same malbona ŝakisto! Fine povas esti tiaj, laŭ kiuj la ŝako estas scienco. Tiuj estas ne malpli malbonaj ŝakistoj."

M. *Najdorf*

„La mensa agado estas eble la plej granda plezuro en la vivo; kaj la ŝako estas speco de mensa agado."

S. *Tarrasch*

„La ŝako estas por mi tuta mondo, sed la mondo konsistas ne nur el ŝako."

A.*Karpov*

*– Kial vi kaj via edzino elektis ĝuste la ŝakon objekto de via eksperimento?*

– Kiam ni komencis la praktikan fundamentadon de nia genipedagogia teorio, unue ni planis eksperimenti per matematiko, ŝako kaj fremdaj lingvoj. Influite de pluraj faktoroj, ni decidis fine favore al la ŝako. Min motivis ĉefe la sekvaj faktoroj:

- Nian teorion ni deziris pruvi sur la kampo de mensa kreado, ĉar kompareblaj eksperimentoj okazis nek en Hungario, nek eksterlande.
- Ene de tio ni elektis la ŝakon, ĉar ni konvinkiĝis, ke ĉi tie – kompare kun aliaj terenoj – oni povas pli rapide atingi mezureblan rezulton kaj precipe pro tio, ke ĉi tie la sistemo de taksado estas pli konturita, pli fiksita, do pli objektiva kaj ekzakta. Tio ebligas pli unusence pruvi la sukceson aŭ malsukceson de la eksperimento. Ni decidis ĝuste, ĉar tiam ni eĉ ne imagetis, kiom da malfacilaĵoj ni devos superi dum nia laboro. Se eĉ al la filinoj kaj al ni mem ni ne estus povintaj unusence vidigi, pruvi la rezulton, la atakoj estus multe pli malhelpintaj nian laboron. Ĉe la ŝaktabulo oni pli facile povas objektive pruvi, kiu estas pli bona, pli forta en la konkuro.

- Laŭ nia prijuĝo, la ŝako estas kompleksa kulturfenomeno, kie la specialiĝo venigas malpli da danĝeroj. Ĝi estas ja agado, efektivigebla ne nur en juna aĝo – ekde etinfaneco ĝis maljuneco iu ajn povas ja aktive konkuri –, krome ĝi disvolvas tiajn konverteblajn kapablojn en la homo, kiujn li povos bone uzi aliloke, en alia fako, daŭrigante sian vivon altnivele, eĉ post subita ŝanĝo, se ekzemple li tediĝus de la ŝakludo aŭ pro alia kialo forlasus ĝin. Do la specialiĝo sur ĉi tiu tereno ne malcertigus la sorton de la infano en okazo de eventualaj fiaskoj aŭ tediĝo.
- La fakto, ke post la unua infano ankaŭ la dua naskiĝis knabino, donis plian motivon al la decido. Aldone ni povis starigi kiel celon ankaŭ la pruvon de la simileco de intelektaj kapabloj ĉe knaboj kaj knabinoj – kaj kio precipe gravas, sur tia tereno, kiun oni citis ĝis tiam kiel pruvon por la kontraŭa aserto.
- Fine, ni decidis tiel, ĉar la ŝako ankaŭ per si mem estas kompleksa, tre valora, bela agado: ludo, scienco, arto, sporto kaj psikologio samtempe. Sprite rimarkis *Tarrasch:* „Mi kompatas homojn, kiuj ne scias ŝakludi, same kiel mi kompatas tiujn, kiuj ne kapablas ami. La ŝako, same kiel la amo, kapablas feliĉigi homojn."

*– Mi aŭdis de multaj homoj: „Nu jes, ĉi tiuj Polgár-oj fariĝis famaj homoj, sed la ŝako ja ne estas tro komplika afero. Se Polgár provus la samon sur alia kampo, ni diru pri lingvoj, matematiko aŭ muziko...!"*

– Mi certas pri tio, ke ĉi tiun laboron mi povus plenumi ankaŭ sur aliaj kampoj, tio ja sekvas rekte el la esenco de mia teorio.

Ĉu la ŝako ne estas tro komplika? Mi kredas, ke fari ion altnivele sur iu ajn tereno estas malfacile. La ŝako estas nek pli facila, nek pli komplika ol aliaj agadsferoj. (Kvankam en ĝi oni apenaŭ povas manipuli!) La konantoj kaj aprecantoj de la ŝakludo ĉiuj opinias, ke ĝi havas la saman kulturvaloron, kiel ajna branĉo de scienco aŭ arto.

*– Ĉu la ŝakludo kompareblas kun scienco kaj arto? Ĉu ĝi estas tiom multfaceta?*

– La sekreto de la ŝako kuŝas en ĝia komplekseco. En tio, ke ĝi estas samtempe scienco, arto, sporto kaj ludo. Al tiuj kvar trajtoj viciĝas ankaŭ plia, kiun eĉ hodiaŭ mi malfacile vortigas. Io tia, ke la ŝako estas samtempe ĉi tiuj kvar, ke ĝi estas kompleksa. La kvina trajto estas la komplekseco.

*– Kiomgrade ĝi estas scienco?*

– Tiom, ke la finrezulton donas ne la hazardo (kiel ekz. en kartludoj). La ŝako havas daŭran kadron, internan logikon, kaj ĝi estas por ĉiuj rekonebla, elkalkulebla kaj malkaŝebla. Ni povas ekkoni ĝiajn leĝojn per



analizo, sintezo, intuicio kaj kree apliki ilin. Ĝi estas do tia, kiel aliaj sciencoj. Kiel ekzemple la matematiko, kie ni havas taskon, kiun ni devas solvi, por kiu ni devas trovi formulon aŭ manieron de solvo. La samo validas ankaŭ en la ŝako. Ni havas pozicion, en kiu ni devas trovi la objektive eblan plej bonan movon, ni devas elpensi planon, t.e. vojon, kiu surbaze de la ekkono de objektivaj leĝoj kondukas al la plej bona rezulto. Ĉiu fazo havas sian teorion: ekzistas teorio de malfermoj, mez- kaj finludoj. Elformiĝis ties strategio kaj taktiko ktp.

*– Scienco estas tio, kies rezultoj montriĝas utilaj por la homaro...*

– Ankaŭ la ŝako estas utila, ĉar ĝi kontentigas ian societan bezonon de la homo; ĝi estas spirita distriĝo, sporto, ludo, arto. La ŝako kontentigas ĉi tiujn bezonojn – kun scienca postulemo.

*– Sur tia bazo ni povus paroli samrajte pri la teorio de sporto ĝenerale, kaj pri tiu de futbalo aŭ naĝado konkrete. Aŭ la ŝakteorio signifas pli ol tiuj?*

– Nepre pli, ĉar la ĵus menciitaj apartenas al la fizikaj sportoj, kaj kvankam ankaŭ ili havas teorion, sed por bone ludi, futbalisto ne bezonas ellerni la teorion de futbalo, ne devas trastudi bibliotekon da fakliteraturo.

*– Tio estas vera, sed fakuloj, trejnistoj kaj esploristoj, kiuj volas skribi pri ĝi, devas konatiĝi kun la teorio.*

– Laŭ fina konto jes, sed ĉe la ŝako temas ne nur pri tio: ankaŭ tiu, kiu plenumas la agadon (la ŝakisto) devas alproprigi la sciencon kaj ankaŭ la konkuranto mem kunkreas la teorion.

Se en la ŝako vi efektivigas varianton, kaj ĝi pruviĝas malbona, vi malvenkas, kaj vi devas korekti tion. Se vi denove malsukcesas, vi devas refoje provi, kaj dum vi ne alproprigos la ĝustan manieron de solvo je scienca nivelo, vi ne fariĝos sukcesa ludanto. Ne sufiĉas koni la ŝakteorion, oni bezonas ĝin ĉiam kree renovigi. La ludanto devas esti malkovranto, ĉar sen tio hodiaŭ neniu povas atingi sukceson inter pintuloj. Eĉ, por ellabori novigojn en la ŝako nun jam necesas scienca teamo.

*– Tion mi akceptas. Mi vidas, ke vi havas datenbankon konsistantan el 4000 volumoj kaj 200 000 partioj, kaj por malvolvi la eblajn variantojn, la knabinoj plenumas tipe laboratorian laboron. Sed ĝis kiu limo fareblas ĉi tiu esplorlaboro? Ĉu ne vidiĝas signoj de elĉerpiĝo?*

– Kvankam la ŝako estas relative fermita sistemo, mi asertas, ke ĝi ne ekkoneblas definitive. Unuopulo certe neniam kapablos komplete malkaŝi ĝin. La homa atingopovo kaj la ekkono havas kaj ĉiam havos limojn, barojn, malperfektaĵojn. Oni ne forgesu, ke ankaŭ la ŝako estas sporto. Oni multfoje timis ĝian elĉerpiĝon, sed ju pli scienca ĝi fariĝis, ju pli oni

ekkonis ĝin, des pli multe da novaj problemoj, solvendaj taskoj oni trovis en ĝi.

– *Ĉu ĝi estas ankaŭ arto?*

– Jes, la ŝako formiĝas ankaŭ laŭ la leĝoj de beleco. Konsekvenca taktika kaj strategia realigo de partio impresas ne nur logike, sed ankaŭ emocie, estetike, kaj la malkovro de nekonata vojo (eventuale kombinaĵo) donas ne nur ekkonan, sed ankaŭ artan travivaĵon. Pro tio ekzistas partioj premiitaj pro beleco; ili plezurigas ne nur tiujn, kiuj kreas, sed ankaŭ tiujn, kiuj rigardas aŭ poste reludas ilin. Same kiel en aliaj artobranĉoj: por la kreanto kaj ricevanto, t.e. „rekreanto", doniĝas same estetika travivaĵo, emocia efiko, kiu povas konduki al interna puriĝo. La ŝako estas „miraklo". La ŝakkomponaĵoj, taskoj aŭ traktaĵoj pri ŝako estas artaĵoj.

– *Kiel oni elektas la belecpremiindan partion?*

– Oni konas du specojn de belecpremieblaj partioj. Unu estas senerara partio, ludita kun logika precizeco (oni povus diri: kun scienca antaŭvido); la alia estas venko konstmita sur originala kombinaĵo, surpriza truko.

– *Ĉu viaj filinoj jam havis belecpremiitajn ludojn?*

– Kompreneble, sed ne nur belecpremiitaj partioj povas esti tre belaj, kvazaŭ superbaj artaĵoj; belecpremion oni donas nome nur en malmultaj konkursoj, krome ne estas devige doni ĝin. La plimulto de belegaj partioj neniam ricevis premion pro beleco.

– *Kiomgrade estas la ŝako sporto? La publiko ja komprenas sub sporto plejofte agadon kun fizika streĉiĝo.*

– Unue lasu min paroli pri afero ne sufiĉe konata al la publiko. Ankaŭ la ŝako postulas firman fizikan staton. Ne estas hazarde, ke ĉiuj pintoŝakistoj praktikas ankaŭ ian fizikan sporton kiel kompletigan agadon. Miaj filinoj tablotenisas aŭ naĝas ĉiutage 1 ½ ĝis 3 horojn.

– *Pri kiaj sportvaloroj ni povas paroli ĉe la ŝako?*

– Pri la samaj kiel ĉe aliaj sportoj. La sporto estas regula konkura okupado kun fiksa regularo kaj taksata laŭ la atingitaj rezultoj. Tiuj trajtoj validas ankaŭ por la ŝako. Ĝi estas same konkura ludo realigata laŭ fiksaj reguloj, kvalifikanta la ludantojn surbaze de iliaj atingoj (nuntempe ĉefe laŭ la *Élő*-poentoj kaj rezultoj de konkursoj); krome ankaŭ la ŝakludo necesigas regulan prepariĝon kaj partoprenon. La ŝako estas unu el la plej popularaj, t.n. grandaj sportobranĉoj, kiel la futbalo, glacihokeo, korbopilko aŭ teniso. Oni aranĝas amatorajn kaj profesiajn konkursojn. Ĝi havas spektantojn kaj partoprenantojn, inkluzive profesiajn, legitimitajn konkurantojn.

La ŝako same disvolvas la ecojn karakterizantajn sportistojn: volforton, batalemon, venkambicion, firman fizikan staton, konkursan rutinon ktp.



Ĝi inkludas la regulojn de sporta korekteco kaj la konsekvencojn de ties malobservo. Ankaŭ por la ŝako validas, ke la rezulto decidiĝas en konkurencbatalo, kaj la aktuala preteco aŭ agorditeco sekvigas pli aŭ malpli bonan lokadon. Krom multaj ĝojoj la ludo povas kaŭzi kelkfoje ankaŭ dolorojn, ĉar en konkursoj oni mezuras ĉiam la aktualajn atingojn, kaj iu povas esti samtempe bona ŝakisto, sed malbona konkuranto.

Ankaŭ la ŝako havas siajn regulojn de justeco, kaj ekzistas kondutformoj ne konformaj al tiuj. Al la nesportecaĵoj apartenas flustrado de kibico aŭ sekundanto, aŭ apliko de ekstertabulaj trukoj (ekzemple, se iu blovas cigaredfumon al la vizaĝo de la partnero, ronĝas ion aŭ piedfrapas la tablon, eventuale eĉ la krurojn de la kontraŭulo ktp.). Al la sama kategorio atribueblas ankaŭ la psikologia milito: misfamigo de aliuloj, senbaza klaĉado, nejusta gazetara kampanjo ks.

Mia starpunkto pri ĉi tiu demando estas rigora kaj koincidas interalie kun la opinio de la soveta grandmajstro D. *Bronstein*: ĉiuj teknikaj trukoj, fintoj, oferoj, ruzaĵoj estas permesataj sur la ŝaktabulo, sed ekstertabulaj psikologiaj aŭ fizikaj falsaĵoj, influantaj la personecon de la partnero, estas damaĝaj kaj morale rifuzendaj.

Per la ŝako mi volis formi ankaŭ la personecon de miaj filinoj. Mi ĉiam diris al ili: plej gravas, ke ili estu homoj – virtaj, honestaj homoj. El tio sekvas, ke miaj filinoj ĉiam ludas juste. Tio signifas, ke ili eĉ duonpoenton ne cedas unu al la alia. Foje ekzemple Zsuzsa havis la ŝancon gajni konkurson kaj per tio la dolarpremion, sed Judit, en la antaŭlasta etapo de la konkurso, ne cedis al ŝi la duonpoenton necesan por tio.

– *Do viaj filinoj LUDAS la ŝakon?*

– Kompreneble, la ŝakludo estas ja ne nur etimologie, sed ankaŭ laŭnature ludo. Ĝi estas agado praktikata ne nur konkure. Prave, ekzistas profesiaj kaj amatoraj konkursoj, sed la ŝako havas ankaŭ distrajn formojn. Oni ludas ĝin ankaŭ en kafejoj, sur placoj, plaĝoj, en amikaj rondoj, ĉe familiaj tabloj – je komenca kaj plej alta niveloj. Jen, kiel interese: ĝi ĝueblas ĉiunivele! La ludo kiel ludemo estas parto ankaŭ de altgradaj konkursoj. Superba specifeco de la ludo – kompare kun la sporto aŭ laboro – estas, ke ĝi ne estas deviga agado, sed libervole elektita ŝatokupo. La ŝako kiel ludo estas krea kaj sinevoluiga okupiĝo, kaj sekve ĝi donas agrablan senton, ĝojon. Miaj filinoj ŝatas ŝakludi, ĉar tio por ili estas unusence ankaŭ ludo.

– *Mi inklinas kredi tion, ĉar foje mi demandis duaklasajn lernantojn de la bazlernejo, kie mi instruas ŝakon, ĉu ili ne kompatas la* Polgár-fratinojn

*pro tio, ke tiuj ŝakludas ĉiutage 5–6 horojn. Ili respondis: ne, kial oni devus kompati iun, kiu tiel multe ludas?!*

– Videble, infanoj ofte pli ĝuste komprenas, sentas la aferojn ol plenkreskuloj. Multfoje oni demandas nin zorgoplene: ĉu ni ne damaĝas niajn filinojn, ĉu ni ne senigas ilin je la infanaĝo, ĉu ili ludas sufiĉe? Tiuj demandantoj ne komprenas, ke niaj filinoj ŝatas la ŝakon, kaj por ili ĝi estas ankaŭ ludo.

*– La ŝako do estas ne nur serioza laboro, sed ankaŭ ludo kaj kultura valoro?*

– Jes. La altnivelaj agadoj povas ja transformiĝi unu en la alian. La scienca laboro havas ankaŭ artan karakteron, la altnivela arto estas science fundamentita, la alte evoluinta sporto baziĝas sur sciencaj fundamentoj, kaj prezentas ankaŭ artajn elementojn, kaj en ili ĉiuj troviĝas iom da ludemo. Eĉ, ludo povas havi sian sciencon. Kaj ankoraŭ io: la fakto, ke la ŝako funkcias ankaŭ kiel komunikada rimedo estigas rektajn interhomajn kontaktojn.

*– Eble tio estas la lasta guto en la mielglason, dank' al kio multaj pedagogoj opinias, ke oni devus inkluzivigi la ŝakon kiel devigan studobjekton en la instruadon ĉe bazlernejoj. (Tion deklaris ankaŭ la renoma soveta pedagogo Suhomlinskij kaj la ellaborinto de novtipa eduksistemo en Hungario Zsolnai József, kiu volas integri ĝin en sian sistemon.)*

– Mi konsentas pri tio, sed oni atentu ne preni ĝin por tradicia deviga studobjekto, fortimigante per tio la infanojn. Estus do ĝuste enkonduki ĝin en la ĝeneralan instruadon, kaj ne nur el faka vidpunkto de la sporto, sed ankaŭ pro pedagogiaj kialoj. Ni scias ekzemple, ke estas malfacile instrui al infanoj longe sidi en la sama loko. Per la ŝako oni povas igi ilin sidi tiel. Pro la luda karaktero de la ŝako oni povas facile instrui la infanojn koncentriĝi. Helpe de ludo ili ellernus evoluigi sian persistemon kaj koncentriĝan kapablon. La ŝakludo kutimigas al regula problemsolvado.

Mi ne asertas, ke anstataŭ desegnado aŭ muziko oni devus preferi la ŝakon en la lernejoj. Sed se ekzistas ekzemple ses unuaj klasoj en iu lernejo, tiam oni devus ebligi elektadon inter desegnado, muziko, ŝako aŭ eventuale eĉ briĝo. Mi ne komprenas, kial havus iu aŭ alia el ili plirangecon. Oni povas ekkoni kaj ankaŭ eduki infanojn helpe de la ŝako.

*– Laŭ mi, krom la lerneja instruado oni povus apliki ŝakon en pluraj aliaj terenoj. Ekzemple, en la instruado de manaĝistoj, kiel fakulo pri manaĝistiko, d-ro* Bartha *Tamás asertas. Manaĝistoj staras ja ofte antaŭ similaj dilemoj en la praktika vivo kiel ŝakistoj. Verŝajne tio validas ankaŭ por pluraj aliaj terenoj. Ni povas vere ĝoji, ke ĉi tiu ludo, sporto ĝuas*



*nuntempe kreskantan popularecon. Ĉu vi havas proponojn, kiel oni povus ankoraŭ pli kreskigi ĝian sportkarakteran popularecon?*

– Kompreneble. Oni povus enkonduki multspecajn novtipajn konkursoformojn, ludoformojn. Ekzemple, paro ludus kontraŭ paro tiamaniere, ke alteme ili farus movojn. Ŝakistoj nomas tion kvarmana ludo. En tiu ludvarianto oni povus formi homogenajn kaj miksajn parojn (virino kaj viro) kaj la ludodaŭro estus mallongigita.

Oni povus aranĝi t.n. blindludajn konkursojn (ne por blinduloj aŭ vidhandikapuloj), same kun mallongigita ludodaŭro. Oni devus popularigi la konkursojn kun 5- kaj 30-minutaj partioj. Oni povus pli ofte organizi telefonajn, telefaksajn, radiofonajn kaj televidajn matĉojn. Granda malavantaĝo de la ŝakkonkursoj kun tradicia ludodaŭro (ankaŭ por la konkurantoj) estas, ke ili tiriĝas longe, kelkfoje plurajn semajnojn, kaŭzante ĉiam pli fortiĝantajn streĉojn. Ili devigas al longa forestado disde la familio. Krome, la aranĝantoj devas pli multe elspezi, kaj eventuale ankaŭ la spektantoj ne havas tiom da tempo por observi la ludojn. Malrapidaj ludoj enuigas laikojn.

En la praktiko de kvalifikado meritus konsideri la enkondukon de tri ŝtupoj de la grandmajstra titolo ĉe aktivaj konkurantoj: super 2650 valorpoentoj supergrandmajstro, super 2550 grandmajstro, kaj super 2450 grandmajstro-kandidato.

Indus akcepti la ŝakon por la someraj olimpikoj. Oni devus aranĝi ĉiujare individuajn kaj teamajn mondĉampionajn konkursojn kun pluraj ludodaŭroj (5-minutaj, 30-minutaj, normaltempaj). Ĉio ĉi pliigus la interesiĝon kaj altirus pliajn adeptojn, sportistojn kaj amatorojn ĉirkaŭ la ŝaktabulon.

## 2. KIEL LA POLGÁR-FRATINOJ ELLERNIS ŜAKLUDI?

„Ĉe ŝakludo partnero estas same nemalhavebla, kiel en amo."
S. Zweig

„Ŝako estas prepariĝi por la vivo."
B. Franklin

„Ne eblas ŝakludi, dum la domo brulas."
Itala proverbo

– *La publika opinio konsideras vin ŝakpedagogo kaj kredas, ke tiu estas la tereno, kie vi certe povas doni ian pluson. Kelkiuj estas eĉ konvinkitaj, ke vi kaŝhavas sekreton.*

– Do mi malkovras ĝin: mi aplikis mian ĝeneralan pedagogian konceptaron sur speciala tereno. Mi povus apliki ĝin ankaŭ sur aliaj. Mi certas: kun simila rezulto. Ne ekzistas sorĉrimedo eĉ en la ŝakinstruado, tial mi volus jam antaŭe „prudentigi" tiujn, kiuj atendas ekscii miraklojn. La ĉefajn pedagogiajn metodojn kaj la klarigon de psikologiaj baznocioj oni trovas nature en pedagogiaj, psikologiaj kaj ŝakmetodikaj lernolibroj.

– *Ekzistas almenaŭ unu aspekto de via metodo, kiu mirigas ĉiun ajn: nome viaj rezultoj kampe de la ŝakpedagogio. Kiel lernis viaj filinoj ŝakludi en la aĝo de 4 aŭ 5 jaroj? Kiel atingeblas disciplinita kaj daŭra laboro ĉe etinfano?*

– Unu afero certas: per trudo oni neniam povas atingi seriozan pedagogian rezulton, precipe altnivelan. La ŝakon oni povas instrui nur kun amo kaj ludemo. Se mi rajtas konsili: observindas antaŭ ĉio, ke la patro aŭ patrino ne nuligu per troseverecо la emon de la infano al ŝakludo. Ni atentu ankaŭ pri tio, ke ni ne ĉiam gajnu kontraŭ la infano, ni lasu lin kelkfoje venki, por ke li sentu: ankaŭ li kapablas pensi. Ni venigu lin tiamaniere al sukcesosento.

– *Kiel vi formulus la esencon de via instrua metodiko? Kio kuŝas en ĝi, kio faris vin tiel sukcesa?*

– Mi pensas, ke en ĝi kuŝas nenio mirinda, nenio sekreta: mi klopodis apliki miajn psikologiajn, pedagogiajn konojn en la ŝakinstruado. Kompreneble mi kompletigis ilin per miaj propraj ideoj, kaj klopodis konsekvence realigi ilin en la praktiko. Memkompreneble, mi ĉiam serĉis konvenajn kunlaborantojn, pretajn helpi al mi.

Komence plej gravas veki la interesiĝon. Ni konsciigu al la infano: kiu lernas, tiu scias. Ankaŭ la ŝakludo estas ellernebla. Se ni edukis la infanon



tia, ke li povas esti partnero, kapablas akcepti, krei, iniciati, tiam ni povas konfidi al li ĉiam pli da memstaraj taskoj. Ni igu la infanon ami, kion li faras – tiomgrade, ke li faru tion kvazaŭ obsedite. La hungara psikologo *Vekerdi* Tamás same atentigas, ke etinfanoj ellernas plej facile tion, kio vekas, altiras ilian interesiĝon, ilian atenton. Jam ĉe la komenco la infano devas senti ĝojon. Ni ne koleru, se dum ŝakludo li saltadas tien-reen, ja ankaŭ en la psikologio estas konata fakto, ke kvankam la infano pro siaj laŭaĝaj trajtoj petolas kaprice, liaj pensoj povas tamen resti ĉe la tasko. Ni ne diru al li ĉion; ni provu igi la infanon mem diri ion! Ni ne ludu mem ĉiun movon, ni provu igi la infanon mem fari la movojn! Tio estas la t.n. Sokrata metodo kaj la esenco de la problemsolva instruado – projekciita al la ŝako.

Sen motiviteco kompreneble ne atingeblas granda sukceso. En aĝo de 5–6 jaroj, se la agado estas sufiĉe intensa, ankaŭ la sukceso ekfunkcias jam kiel forta instigilo. La stimulado, kuraĝigo, fervorigo kaj fido tre gravas. Se la gepatroj kaj trejnistoj diras al la infano, ke li estas malsaĝulo kaj malbonulo, la infano eble vere ekkredas tion. Sed ankaŭ inverse validas: se ni diras, ke li estas saĝa kaj lerta, tion li same emos kredi. Ofte li vere ekkredas tion, kaj klopodas pli forte fariĝi fakte tia. Mi konsideras baza principo, ke la sukceso eksterordinare gravas. Kiam mi komencis la eksperimenton, mi opiniis, ke kvankam mi ne lasos la filinojn eviti fiaskojn, tamen ili devas plenkreski akompanataj de sukcesoj. La proporcio de fiaskoj kaj sukcesoj estu 1 al 10.

– *Ĉu ĉion ĉi oni devas apliki laŭ la propraĵoj de la frua infanaĝo?*

– Kompreneble, laŭgradecon oni devas observi en ĉio! Koncerne la enhavon de la instruata materialo kaj ankaŭ la tempodaŭron de la instruado oni devas eliri el la laŭaĝaj trajtoj de la infano, kaj tajli la taskojn laŭ la optimuma povo de la infano. Unue ni ŝakludu nur duonhoron, post kelka tempo denove iom. Post unu semajno ni povas plilongigi la tempodaŭron. Komence ni solvigu nur simplajn taskojn, kaj kun la paso de la tempo ni progresu al ĉiam pli komplikaj. Oni devas tre multe ludigi la infanon, sed ĉiam kun konvenaj partneroj, kiuj havas ĝenerale similan ludoforton. En kelkaj okazoj ili povas esti pli malfortaj, en kelkaj pli fortaj, por ke la infano sentu, kia estas la venko kaj kia la malvenko. Sed la ĝustan proporcion oni devas nepre trovi. Laŭaĝe propras al la infano, ke li ludas rapide, pro tio li ludu multe da fulmopartioj kaj tiajn kun mallonga tempodaŭro.

– *Mi scias, ke vi posedas grandan bibliotekon kaj kartotekan sistemon kun 200 mil pecoj. Kiel vi uzis ilin komence, kaj kiel vi povas utiligi ilin nun?*

– Ni havas bibliotekon kun 4-5 mil volumoj, kiu tre multe helpis en la instruado kaj lernado de la infanoj. Ĝi estas bone sistemigita kaj provizita per pluraj diversaj katalogoj. La kartotekan sistemon (kiun ni ĵus kompletigis per komputila datenbanko) ni pretigis laŭ la nomoj de ludantoj, variantoj de malfermoj kaj tipoj de mezludoj. La filinoj scias uzi ĝin ekde frua aĝo, kaj se ili bezonas ion, dum sekundoj ili trovas tion. La ŝaklibroj servas al ni kvazaŭ manlibroj.

La kartotekojn de malfermoj ni uzas unuavice por ellabori novajn malfermojn. Por unusola varianto ni trarigardas eĉ 50–100 partiojn, por elekti – ĉefe per komparado – la plej taŭgan, sed ankaŭ miaj filinoj mem kapablas ellabori novigojn. Ĉar ĉi tiu katalogo entenas kompletajn partiojn, ili povas studi en tiaj okazoj ankaŭ la mezludojn de tiuj partioj. Por verki artikolojn kaj analizi partiojn same taŭgegas la datenbanko.

La laŭnoman katalogon ni uzas ĉe prepariĝo laŭ kontraŭuloj. La katalogon de mezludoj ni ellaboris por du taskoj: unu estas la strategio, la alia la taktiko de mezludoj. Unuo de mezludaj strategioj enhavas 40–50 tipojn. Ekzemple: izolita peono, kontraŭflanka aroko, okupo de malfermitaj linioj ktp. En la unuo de taktikoj ekz.: ĉefpecaj gambitoj sur la kvadratoj f7, g7, h7, g6, h6, f6, d5, c3 aŭ intuiciaj peonaj kaj ĉefpecaj gambitoj ktp. Se mi volas, ke la infanoj trarigardu iun tipon, ili elserĉas por ĝi 50–100 ekzemplojn, post kies trastudo ili fariĝas sufiĉe informitaj por konstati certajn laŭleĝecojn kaj indukti ĝeneralaĵojn. Ni ne havas prilaboritan kolekton de finludoj en la formo de kartoteko,sed ni havas sufiĉe da rilataj libroj. Tre bona materialo estas la enciklopedio de finludoj, eldonita en Jugoslavio, la kolektoj de peonaj, turaj finludoj ktp. Ili grandparte anstataŭas la kartotekan prilaboron.

La matkombinaĵojn el du kaj tri movoj tre ŝatis la infanoj en frua aĝo. Tiuj estas ne tro malfacilaj, sed estetike tre belaj, distraj, kaj helpas al la infanoj ellerni matigon, evoluigi la kombinadan kapablon, kaj ŝatigi la ŝakludon. Pri la dumovaj matkombinaĵoj ni jam aperigis du librojn, kaj ni havas ankoraŭ multajn materialojn en manuskripta formo.

*– Ĉu la taskosolvado laŭ ripetiĝantaj temoj ne kontraŭdiras al memstara krea laboro?*

– Kompreneble ne, ĉar la solvoekzercojn ni faris ne nur en la formo de laŭtema taskosolvado. La infanoj trasolvis tre multajn tiajn librojn, kie la samtipaj taskoj estas miksitaj, aŭ kie ili ne estas aranĝitaj laŭtipe.

Ankaŭ la konkurigo signifas ekzercigon de memstara krea laboro; samtiel la analizo de la propraj konkurspartioj (kaj ofte ilia publikigo en la



gazetaro). Koncerne la konkurigon tre gravas, ke la infano partoprenu en konkursoj, kiuj havas nivelon konforman al lia ludoforto. En tro forta konkurso prema fiasko povas trafi la infanon, kaj en tre malforta konkurso li ne evoluas fake, nek sentas sukceson. Se la infano malgajnas en konkurso, ni neniam riproĉu lin: la malvenko mem sufiĉe doloras al li. Prefere ni konsolu lin kaj instigu lin al plua laboro. Ni helpu lin malkaŝi la kaŭzojn, mankojn kaj erarojn kaj korekti ilin. Ni atentu ne nur pri la eltenigo kaj mildigo de fiaskoj, sed ankaŭ pri tio, ke li ne havu tromemfidon, ĉar tio signifas tordiĝon de la realismemo same, kiel la manko de memfido.

*– Kiel vi opinias pri blinda ludo? Mi scias, ke ĉiuj viaj filinoj bone ludas dorse al ŝaktabulo.*

– La evoluigo de la ŝakmemoro tre gravas. En la konkura ŝako oni ludas ĉe fiksita tempo, do la bona memorkapablo helpas ŝpari tempon. Kontraste al sciencoj, ĉi tie ni ne rajtas uzi manlibrojn, do rekte aŭ nerekte ni devas ekmemori la konkretajn informojn. La figurojn ni same ne rajtas movadi por elkalkuli la variantojn. Parkere ni devas analizi, plani, kaj ne estas indiferente, kiom da movoj ni povas antaŭkalkuli, trarigardi en la memoro. Ĉe bona blindludanto tio okazas pli facile, pli bone kaj pli precize. La blinda ludo evoluigas la spacan vidkapablon, la pensadon laŭ la tuta tabulo.

*– Kiel oni povas evoluigi la blindan ludadon?*

– Unue per la parkerigo de partioj. Poste: per disvolvado de pozicioj (t.e. daŭrigi ludon el donita situacio) el diagramoj, analizado de tabula pozicio sen movi la figurojn. Fine: kompreneble per ludado de multaj partioj dorse al la kontraŭulo kaj tabulo. La memorekzercoj donas krome informojn, plivastigas kaj evoluigas la fantazion.

*– Kiel vi opinias pri la fulmopartioj, kie la partneroj havas nur po 5 minutojn?*

– Multaj timas, ke tio faras la ludon surfaca, do malhelpas la enprofundiĝon kaj koncentriĝon. Mi opinias, ke tiaj ludoj ĝenerale ne estas damaĝaj; eĉ: plej evidente ili utilas. La ŝakisto devas en multaj okazoj tre rapide – precize kaj bone – trarigardi la ŝaktabulon. Ni pensu pri la dumpartiaj tempopremoj. Dum konkura ludo ne estas indiferente, kia estas la unua ideo venanta en nian kapon, kaj ankaŭ dum analizado aŭ ĉe lernado ne neglekteblas, kiel rapide ni progresas. Per fulmoludoj oni povas tre bone ekzerci sin pri variantoj de malfermoj. Estas nature, ke la utilon de fulmoludaj ekzercoj ni spertas plejgrade en fulmokonkursoj.

*– Vi menciis, ke la knabinoj regule verkas fakajn artikolojn por eksterlandaj gazetoj. Kial tio gravas?*

– Se oni verkas artikolon, oni pripensas pli profunde la aferon, ol sen celtasko, pensante sola aŭ parolante kun iu pri ĝi. Unu el la plej bonaj metodoj por evoluigi la kapablojn estas verki artikolojn, eseojn kaj librojn. Tio postulas konsciencan sinpreparon kaj aktivan analizan laboron.

– *Ĉu vi konsideras ankaŭ la fremdajn lingvojn laborhelpiloj por la ŝako?*

– Jes, eĉ duoble nepraj laborhelpiloj ili estas. Unuflanke necesas studi la (eksterlandan) fakliteraturon, aliflanke la ŝakisto estas mondvojaĝanto, do li bezonas kontakti sportkunulojn kaj aliulojn. Tial mi atribuis grandan signifon al la instruado de fremdaj lingvoj. Sed nun mi jam opinias, ke por Zsuzsa sufiĉus malpli da lingvoj. La du pli junaj filinoj ellernis unuavice la anglan kaj rusan, plue mi instigos ilin nur pli funde ellerni Esperanton. (Zsuzsa ellernis 7–8 lingvojn, kaj tio verŝajne iom retenis ŝian evoluon en la ŝakludo.)

– *Al kio oni atribuu pli grandan signifon laŭ via opinio: al la teorio de malfermoj, al la mezludo aŭ al la teorio de finludoj?*

– Tre gravas trovi la ĝustan proporcion. Instruante infanojn, oni kutime neglektas la alproprigon de la malfermo kaj poste, inverse, oni trotaksas ĝian signifon. Mi ĉiam asertis, ke la ŝakisto, en ĉiuj etapoj de sia evoluo, pasigu pli-malpli egalan tempon per la studado de ĉi tiuj tri ludopartoj. Pli malfrue li povas oferi iom malpli da tempo por la finludo, ĝin oni uzas ja malpli ofte; malfermo kaj mezludo enestas ĉiun ludon, sed ne ĉiu partio disvolviĝas ĝis finludo. Tio ne signifas, ke mi subtaksas la gravecon de la studado de finludoj.

– *Per kio argumentas tiuj, kiuj neglektas la instruadon de la malfermo-teorio en la etinfanaĝo?*

– Ili asertas, ke oni devas komenci per la finludo, ĉar en ĝi staras malpli da figuroj sur la tabulo, do la infano pli facile trarigardas la situacion. Ili ne pravas. Finludo povas esti tre facila, sed ankaŭ tre malfacila. Ne la nombro de figuroj determinas la malfacilecon de problemo. Povas esti facila, interesa kaj simpla ankaŭ mezluda kombinaĵo, eĉ iuj variantoj de malfermo. Laŭ mi, ĉe la komenco oni devas samgrave instrui ĉiujn tri terenojn, por ke la problemsentemo de la infano povu ĉiurilate disvolviĝi. Por sukcesa konkurŝakludo oni devas bone malfermi la partion, orientiĝi en la mezludo kaj sukcese fermi la ludon en la finludo. Se oni komencas per malbona malfermo, la afero malfaciliĝas jam ĉe la komenco de la partio, eble jam neripareble, kaj tio rezultas baldaŭ la finon de la ludo. La fruan studadon de la malfermo apogas ankaŭ la argumento, ke por ellabori la repertuaron de malfermoj necesas almenaŭ 2–3 jaroj. La alproprigon de la



malfermo-teorio oni devas atingi kompreneble ne per mekanika lernado, engurdado, sed precipe per analizado, eltrovo, kreo de novaj variantoj...

– *Vi menciis plurfoje, ke anstataŭ subteno multaj kaj multfoje starigis obstaklojn kontraŭ la evoluo de viaj filinoj. Ĉu tio influis ilian stilon, bremsis ilian evoluon?*

– Memkompreneble, tio influis ilian stilon. Zsuzsa, kiu ricevis la plej multe da „vangofrapoj", fariĝis la plej singarda ludanto. Por ŝiaj fratinoj estis pli facile, ĉar ili povis jam triope alfronti la „potenculojn", reprezentantojn de la aŭtoritatoj, tiel la negativa efiko de malakcelaj fortoj jam malpli tuŝis ilian sorton. Sed se ilia evoluo ne estintus bremsata, ili certe progresus eĉ pli rapide.

La plej grandan damaĝon kaŭzis reprezentantoj de la politikaj organoj, en ilia mano estis ja potenco. La respondeco ŝarĝas ĉi-koncerne eĉ „la plej altan" gvidanton, ĉar oni konsultis lin aŭ resendis al li en situacioj diskriminaciantaj nin. *Szerényi* Sádndor, eksprezidanto de la Hungara Ŝak-Asocio (li abdikis en 1989) eĉ nun, en ĵus aperinta intervjuo diras: „Mi ĉiam agis laŭ tio, kiel mi interkonsentis kun *Kádár* János [ĉefsekretario de la komunista partio], *Buda* István [sportministro] aŭ kun aliaj kamaradoj, okupiĝantaj pri sportaj aferoj."

– *Pri kio vi kulpigas la gvidantojn de la Hungara Ŝak-Asocio?*

– Ili ne helpis la fakan laboron. Ekzemple dum longaj jaroj ili ne sendis miajn filinojn al junularaj mondĉampionadoj, kvankam miaj filinoj estis enlande la plej bonaj. Ili volis forigi Zsuzsa el la pinto de la virina mondranglisto. Tiu klopodado sekvigis, ke Zsuzsa fakte foriĝis de tie (sur la 2-an lokon); *Ĉiburdanidze* antaŭis ŝin – maljuste – tiel, ke ŝi ricevis „donace" 100 poentojn al sia valornombro.

Ne ĝustatempe, sed nur post pluraj jaroj ili prezentis ŝin al la Internacia Ŝak-Asocio *(FIDE)* por la titolo de virina grandmajstro. Ili misinformis la publikan opinion en la gazetaro. Ili ne sendis Zsuzsa al la vira zonkonkurso, kvankam ŝi rajtigis sin por ĝi en la hungara vira ĉampionado. Dum pluraj jaroj ŝi ne rajtis veturi al eksterlandaj konkursoj – ĉu al kapitalismaj, ĉu al socialismaj landoj. (La ministerio pri internaj aferoj regule rifuzis niajn petskribojn pri pasporto, tute ĝis la mezo de la 80-aj jaroj, deklarante, ke „via veturo eksterlanden malutilas al la publika ordo".) Ili ne fidis niajn filinojn, ne regis ĉirkaŭ ni trankvila atmosfero, kaj mi povus senfine daŭrigi...

Ankaŭ nun nin premas zorgoj pro manko de trejnistoj. Vane staras la filinoj pinte de la mondranglisto, vane ili fariĝis unuaj en la olimpiaj ludoj, gajnis laŭaĝajn mondĉampionajn orajn medalojn, kaj vane ricevis Judit

*Oscar*-premion. Zsuzsa de pluraj jaroj ne havas trejniston aŭ trejnopartneron. Ankaŭ la situacio de la pli junaj estas ne multe pli favora. Kvankam ili formas kun Zsuzsa malgrandan teamon, fakan laborrondon, sed tio en si mem tre malmultas. Nur nun atendeblas ioma antaŭpaŝo sur ĉi tiu tereno – ni baldaŭ ricevos helpon el eksterlando. Nederlanda mecenato pagas nun altruisme la trejnopartnerojn de la knabinoj, kaj same li aĉetis por ili personan komputilon utiligeblan kiel laborilon. Germana ĵurnalisto provizis ĝin per programo kaj datenbanko. Li ankaŭ instruis al la infanoj, kiel manipuli la maŝinon.

– *Ĉu la hungara gazetaro influis vian laboron?*

– Ĝi influis, kaj tre malfavore. Certe ni estus progresintaj pli, se ne estus aperintaj plurdekoj da atakaj, malicaj artikoloj falsigantaj la faktojn. Ni havis ankaŭ gazetarajn procesojn. Kvankam ni gajnis ĉiujn el ili, tamen ni ne volus senĉese procesadi; por ni pli gravas la almenaŭ relative trankvila preparîĝo kaj la bona laboro.

– *Kian gazetaran eĥon vi havas eksterlande?*

– Oni skribas pri ni ĉu en faka, ĉu en psikologia, ĉu en pedagogia rilatoj kun la plej granda rekono. Ĉi tiu rekono pliigis nian kredon je la laboro, nian persiston kaj signifis klaran sukceson por ni. Nature tio alportis rekonon ankaŭ por la hungara ŝakludo, la hungaraj pedagogio kaj psikologio. Ĝis nun preskaŭ 40 mil artikoloj aperis pri ni

– *Nun pri faka demando: ĉu viaj filinoj ludas kombinaĵan aŭ pozician ludon?*

– La pli junaj prefere kombinaĵan, Zsuzsa pozician. Vere bona ludanto devas aloji ambaŭ stilojn. Bedaŭrinde, Zsuzsa havis multajn trejnistojn, kiuj reprezentis la pozician skolon, kaj tiel post kelka tempo ŝi transprenis ĝin. Nun ŝi troviĝas en stadio, kiam ŝi relaboras sian stilojn. V. *Korĉnoj* konvinke atentigas, kiel oni povas ŝanĝi stilon: „Mi ne sciis kaj ne ŝatis ataki, la defendo estis mia medio. Miaj kontraŭuloj ofte utiligis por si ĉi tiun unuflankan strategion. Ili intence alĵetis peonon, ĉar ili certis, ke mi deprenos ĝin. Kaj ofte sekvis severa konsekvenco. Mi komprenis, ke mi devas plivariigi mian stilon, kaj mi bezonas scii ataki kaj batali por iniciatoj." Ankaŭ Zsuzsa bone atakas kaj scias bone kombini, ŝi devas nur iom „repreni" la singardemon. La elstara hungara ŝakisto, *Maróczy* Géza diris: „Kiu sidiĝas al ŝaktabulo ne kun tio, ke li volas venki kaj devas venki, sed sur esperas pri tio, ke eventuale preteratento de lia kontraŭulo helpos lin al neatendita poento de bonŝanco, kaj kiu konsideras sian kontraŭulon pli forta, tiu ne povas atingi sukcesojn. Por la malkuraĝa ŝakisto estas la konkurŝakludo ne ĝuo, sed pena, turmenta psika streĉo."



– *Kiel prijuĝas sin la infanoj?*

– Demandu ilin mem!

– *Mi demandis. Ili opinias unuanime, ke Zsuzsa estas pripensema pozicia ludanto, Zsófia preferas riskojn, kaj Judit – kvankam ŝi pli proksimas al Zsuzsa – klopodas aloji la du stilojn. Rilate ankaŭ al tio min interesus, kia estas, laŭ via opinio, bona trejnopartnero?*

– Li ŝatu sian laboron de trejnisto kaj trejnopartnero. Li estu honesta, havu spertojn pri trejnado kaj konkurado; estas utile, se li ankaŭ nun konkuras (malnovaj atingoj en si mem ne sufiĉas, ĉefe se ilin akompanas patologia vanteco). Gravas la personeco. Li estu preta por komuna laboro, intima, reciproka kunagado. La juna konkuranto ne povu ĉiam fari apud li ion ajn. Li havu memkritikon, kaj gravu por li la evoluo de lia instruato. Li atentu, ke lia disĉiplo ne kroĉu sin ĉiam sur lian manon. Se li havas grandan fakan reputacion, li kritiku tre singarde, tio povas ja tre forte efiki.

Li respektu la junan konkuranton, fidu al li, klopodu krei trankvilan atmosferon ĉirkaŭ li. Ne sufiĉas, se li nur superrigardas kaj direktas, li instigu, influu la disvolviĝon de la disĉiplo, sed atentu ne paralizi lin.

Li sciu trakti ĝuste la junan homon. Li apogu la originalajn esplorajn-konkuremajn provojn. Li kapablu esprimi rekonon, sciu laŭdi la laboron, la sukcesojn de aliuloj. Li evitu indiferentecon, estu entuziasma („la entuziasmo estas io infekta" – skribis *Selye*), kaj estu taŭga por levi ĉi tiun kapablon pli alten en la aliulo.

– *Vi estas patro, trejnisto kaj manaĝisto en unu persono. Kiel vi povas akordigi ĉi tiujn funkciojn?*

– Ĉi tiuj tri funkcioj kunplektiĝis efektive nur ĉe la komenco. Hodiaŭ miaj filinoj jam tiel superas min, ke mi ne povas esti ilia trejnisto. Mi nur kunordigas la trejnistan teamon. Mi estas ilia patro-manaĝisto, kaj diros sincere, ke eĉ ĉi tiujn du rolojn mi povas nur malfacile ludi.

Estus pli facile esti nur manaĝisto sen patra rolo, aŭ patro sen manaĝaj funkcioj. Plej granda problemo estas, ke patro povas tre malfacile postuli, ke la infano plenumu ankaŭ tiujn durajn trejnotaskojn, kiujn – nu, kiel diri – la infano faras nevolonte.

– *Mi kredas tion, estas ja konate, ke patroj – pro „amo" – ofte eĉ minimuman disciplinon ne postulas de siaj filinoj.*

– Tio estas ne nur demando de amo. Trejnisto, kiu ne estas patro de sia instruato, rajtas forsendi tiun, kiu ne plenumas la taskojn laŭ liaj postuloj. Sed kun propra infano li ne povas fari tion. La trejnistopatro de nia tablotenisa Eŭropa ĉampionino *Bátorfi* Csilla samsence deklaris: „Estas

malfacile por patro postuli ion, kion infano faras tede, ĉi-lasta ja eble eĉ malŝatos lin pro tio."



Tamen ni ne troigu la problemon. Ĝi havas ankaŭ avantaĝon: se la infano amas min, li plenumas ĉion pli facile.

– *La tri knabinoj kune posedas ĉirkaŭ 40 Guinness-mondrekordojn. Estas evidente, ke ili faligis reciproke siajn rekordojn. Sed ni transiru al alia temo! Kiel taksas nun la gazetaro la ŝakatingojn de viaj filinoj?*

– La gazetaro de la lasta jaro eĥis tre pozitive. Specimene mi citos kelkajn opiniojn. Mi devas diri, ke dum la antaŭaj jaroj neniu kredis, ke ankaŭ virino povas – almenaŭ proksime tiel bone – ŝakludi, kiel la plej ŝaklertaj viroj. Kun tio do oni devas kompari la nunajn deklarojn!

M. *Gureviĉ* (unu el la plej fortaj grandmajstroj de la mondo) skribas en *Actuell Schachmagazin* (julio, 1988) pri Judlt: „„...ĉi tiu knabino estas giganto. Tute certas, ke neniu montris tian rezulton estanta 12-jara, inkluzive la mondĉampionojn *Fischer* kaj *Kasparov*. En kiu biblio estas ja preskribite, ke la mondĉampiono de la 2000-aj jaroj devos esti viro?"

Grandmajstro *Keene (Chess,* 1988-08-08): „Se Judit povos teni la admirindan arkon de siaj sukcesoj, tiam ŝajnas tute probable, ke ĉirkaŭ la jarmilŝanĝo ŝi povos transpreni la rolon de defianto en la mondĉampionado. En la aĝo de 12 jaroj nek *Fischer,* nek *Kasparov,* nek Nigel *Short* paŝis sur tiel altan ŝtupon de la sukceso."

En *New York Post* (1988-09-10) grandmajstro A. *Soltis* direktas la sekvan demandon al eksmondĉampiono *Tal:* „Kiu havas la plej grandan ŝancon inter la nunaj ŝakludantoj por paŝi en la lokon de Kasparov?" *Tal:* ‚*Ivanĉuk* kaj *Polgár* Judit."

Sub la titolo „Admirindaj *Polgár*oj" skribas *The Spectator* (Londono, 1988-10-29): „Judit estas la plej eksterordinara fenomeno en la ŝakhistorio... En tiel juna aĝo neniu – eĉ Kasparov – estis tiel bona… nek Bobby *Fischer*... Iru ien ajn kaj vetu, ke fine de la jarcento la mondĉampiono estos virino."

*Molnár* Dániel *(Reform,* Budapeŝto, decembro 1988): „Kiam mi demandis Kasparov, ĉu li konsideras eble, ke post kelkaj jaroj ili fariĝos kontraŭuloj [temas pri *Polgár* Judit] por la titolo de la „vira" mondĉampioneco, unue li klarigadis ion pri la diferenco de la vira kaj virina cerboj, kaj poste per subita „Kvankam Dio scias!" li fermis la interparolon. Grandmajstro *Speelman* (kandidato por mondĉampioneco) deklaris kun angla flegmo: „Mi ne komprenas, kial oni kredas tion neebla."

Sur la titolpaĝo de la ŝakrevuo *New in Chess* (februaro 1989) sub la foto de Zsófia legeblas: „Super-Sofia". En *Inside Chess* (7/1989) ni trovas: „Zsófia



konkeras Romon! Ĉi tiun rezulton volonte akceptus por si eĉ *Kasparov* kaj *Karpov."*

En sia artikolo „Judit estas pli bona, ol mi tiutempe", aperinta en *Reform* (1988-04-05), *Harle* Tamás metas la sekvan demandon al *Karpov:* „Kiel vi opinias pri la olimpikaj atingoj de la hungaraj knabinoj?" *Karpov:* „Se nun ili denove sidiĝus al la ŝaktablo, mi donus al la hungarinoj pli grandan ŝancon." *Harle:* „Kiel vi opinias, kiom atingos la Polgár-knabinoj?" *Karpov:* „Ankaŭ Zsuzsa eksterordinare fortas, sed Judit... En tia aĝo nek mi, nek *Kasparov* ludis tiel, kiel nun Judit."

En la hungara gazeto *Szabad Föld* (decembro 1988) skribas *Flórián* Tibor „La ludon de Zsuzsa karakterizas multflankeco. Ŝi disponas pri enorma scio pri malfermoj, konas eĉ tiujn malfermojn, kiujn ŝi neniam aplikas. En la mezludo ŝi taksas la poziciojn objektive, realisme, tial ŝi povas trakti poziciojn de ajna tipo. Ŝi estas persista kaj prudenta en defendo – tre malofte ŝi perdas –, ideoriĉa kaj elana en atako... Ne mankas en ŝi ankaŭ la eco, kiu plej gravas en la finludo – pacienco.

Ankaŭ la ludon de Judit karakterizas bone fundamentita malfermo-teoria scio, infane senantaŭjuĝa taksado de pozicioj, bona finluda tekniko. En multaj rilatoj ŝi similas al Zsuzsa, sed en ŝia ludo troviĝas eble pli da dinamismo, iniciatemo, kelkfoje „buba spitado". Zsófia estas fakte »socie handikapa« infano: ekzistas ja plej granda kaj plej malgranda filinoj, sed ne ekzistas „plej meza". Ankaŭ ŝi multe scias kaj multe vidas sur la ŝaktabulo, sed ŝi eble kuraĝas fari malmulte. Ŝi ŝatas artecajn, estetikajn solvojn. Ĉiuj tri fratinoj estas modestaj kaj ĉarmaj. Zsófia estas la plej ridetema. Dum oni ofte spertas, ke infanŝakistoj estas morozaj kaj fermitaj, la *Polgár*-fratinoj restis malfermitaj, gajaj infanoj. Tio atribueblas verŝajne al la etoso, reganta en ilia familio."

## 3. KIEL NI ŜATIGU LA ŜAKLUDON AL NIAJ GEFILOJ?

„Ekzistas du specoj de homoj: iuj konformiĝas al la cirkonstancoj kaj kartludas, aliaj volas regi la cirkonstancojn kaj ŝakludas."

M. *Collins*

„Se vi terenbatas vian kontraŭulon per ŝaktabulo, tio ne pruvas, ke vi ludas pli bone."

Angla proverbo

„Sur ŝaktabulo estas facile vojperdi, la kvadratoj estas ja tiel samformaj..."

*Székely* J.

– *Ni ankoraŭ daŭrigu la ŝaklecionon. Certe troviĝas gepatroj, kiujn interesas, kiel oni povas instrui al 4-5-jaraj infanoj ŝakludi.*

– Mi rakontos al vi kelkajn miajn trukojn. Mi prenis du kvadratitajn foliojn, unu por mi, la alian por la infano. Ni enkadrigis 8 x8 fakojn (kvadratetojn). Unue ni komencis lerni la nomon de la fakoj. Mi nomis fakon, ŝi serĉis kaj traiksis ĝin. Poste ankaŭ ŝi nomis unu, kaj mi markis ĝin per punkto. (Tio fareblas ankaŭ per diverskoloraj krajonoj.) Fine de la ludo ni kontrolis la realigon de la tasko, kaj taksis la plenumon unu de la alia. En la sekva paŝo ni ellernis la koloron (blanka, nigra) de la fakoj. Ni indikis fakon, kaj sen rigardi la tabulon, ni devis diri la koloron de la koncerna fako. (Por tio oni same povas uzi la metodon de kvadrata reto.) Ĉi tiu agmaniero iom similas al la konata torpedoludo.

– *Kiam oni ekuzu figurojn?*

– Ankaŭ ĉi-okaze tre gravas la laŭgradeco. Unue oni ellernu la movojn de la reĝo. Plurajn tagojn ni ekzercis nin en tio, poste ni ludis „reĝo kontraŭ reĝo". La tasko estis la jena: oni devis atingi per la reĝo la bazlinion de la kontraŭulo, t.e. oni devis veni al la transa flanko de la tabulo. Kiu faris tion pli frue, tiu venkis. Se iu reĝo povis stariĝi kontraŭ la alia, tiam la ludo finiĝis sendecide. Kiam ni bone ellernis tion, ni aldonis la sekvan figuron, la peonon. Ankaŭ ĉe tiu ĉi ludo samis la celo: alveni al la transa flanko. Post kelkaj tagoj aldoniĝis la turo, poste la kuriero.

Post 3–4 semajnoj ni alvenis al la damo. Poste sekvis la alproprigo de matigo per damo. Posedante tian scion, ni ludis grandajn peonbatalojn dum la sekvaj semajnoj. T.e. nur la peonoj kaj la du reĝoj troviĝis sur la tabulo. Post interŝanĝo de peono por damo ni ludis ĝis mato. Tion la infanoj ege ŝatis. Dume ni komencis la lernadon de la ĉevalmovoj. Tio estas plej



malfacila por infanoj, sed ne vere problema, kvankam oni devas sin zorge ekzerci en tio.

Poste ni konatiĝis kun la plej simplaj matigaj movoj. Unue mi kolektis ĉ. 1000 unumovajn matbildojn, poste mi elserĉis du-, tri- kaj kvarmovajn matbildojn kaj transdonis ilin por solvado. Nur post tio ni komencis ludi verajn ŝakludojn. La tempo, dum kiu ni venis al tio, daŭris ĉ. 3–4 monatojn. Ni ne domaĝu la tempon por tio! Tiamaniere ni alproprigis (tre profunde kaj solide) ne nur la rudimentajn konojn, sed la infanoj alkutimiĝis ankaŭ al la zorge pripensita kaj fundamentita ludo, laboro. Posedante solidajn konojn, ili jam pli simple kaj
facile lernis la sekvajn taskojn. Ili ekhavis rezolutecon, memfidon, kaj venis al sukceso. Ili trasentis la scion kaj la ĝojon de ĝia uzado.

Ĉe la komencoj, la sekva paŝo estas la kombinado. Ni solvis multajn kombinaĵojn, ekz. jenajn: mi oferas unu aŭ du ĉefpecojn, kaj fine tamen la malpli granda materiala forto venkas kontraŭ la pli granda, do eta venkas grandan. Kompreneble ankaŭ ĉi-okaze oni atentu: komence donu nur facilajn kombinaĵojn. Tre malfacilajn la infano ne kapablas solvi. Valoras ludi multajn miniaturajn partiojn, ĉar ĉi tiuj (malpli ol dudekmovaj) entenas tre multajn kombinaĵajn elementojn. La infanon interesas ankaŭ ĉi tio, krome pro la bunteco kaj mallongeco de la partio la infana atento ne malstreĉiĝas.

Kiam la infanoj komencis bone ludi, ni transiris al memorekzercoj (ankaŭ por plivastigi niajn konojn), ekz. ni parkerigis kelkajn miniaturaĵojn.

– *Tio estas jam tasko por plenkreskuloj. Ĉu facile faris tion la infanoj?*

– Jes. Pli facile, ol enmemorigi poemon. Kiam kvinjara infano ellernas versaĵon, li ne ĉiam komprenas la logikajn interrilatojn. Sed en ŝakludo li scias, ke iu movo sekvas el alia, do li kapablas laŭiri la okazaĵojn.

– *Oni do devus proksimume tiel instrui la infanojn „ludi" ludeme. Ĉu vi havas ankoraŭ konsilojn?*

– Oni havu grandan paciencon. Ni lasu, ke la infano venu al sukcesosento, sed ni ne faru handikapon (ni ne donu ĉefpecan aŭ peonan avantaĝon), ĉar tiuokaze la strukturo de la ludo ŝanĝiĝas. La gepatroj aŭ instruistoj prezentu prefere tempan handikapon, aŭ enplektu vole mismovojn en la ludon, por ke la infano povu utiligi ilin por si. Dum la ludo la trejnisto aranĝu intence tiajn poziciojn sur la tabulo, kiuj taŭgas por la lernado kaj evoluo de la infano laŭ la konkreta aĝo.

– *Mi demandas pri praktika afereto. Ĉu oni instruu ankaŭ la uzon de ŝakhorloĝo, aŭ tio ankoraŭ superfluas, kiel kelkaj asertas?*

– La ŝakhorloĝo povas fari la ludon aparte interesa por la infano. (Cetere ĝia uzo povas buntigi kaj ĝuebligi ankaŭ alispecajn ludojn kaj lernadon.)

– *Ĉu en la kadroj de lerneja instruado oni povas instrui la infanojn per simila metodo?*

– Jes, sed en pli rapida ritmo, temas ja pri pli aĝaj infanoj. La esenco ĉiam samas: kaj hejme, kaj en la lernejo oni devas instrui ĉiun parton zorge, ĉiam ĉion solide. Duonlaboro ne havas sencon, ĉar en la sekva etapo mankos fundamento por surkonstrui la alproprigendan materialon. Cetere al mi ŝajnas, ke unu el la mankoj de la hungara instruado estas, ke oni ne konstruas la konojn sur aliaj konoj. Plua eraro mi konsideras, ke – ĉefe pro la manko de intensa instruado – post tri semajnoj la infano forgesas, kion li pli frue ellernis.

– *Ĉu vi havas proponojn, kiel oni stimulu dum instruhoroj? Ĉu oni donu notojn?*

– Se la instruado estas bona, oni tute ne bezonas doni notojn. Cetere, ĉe ŝakludo tio vere ne havas sencon. Mi arangûs prefere diversajn en- kaj interklasajn konkursojn. Al eksterlanda konkurso valoras sendi infanojn, nur se ni sentas, ke ili tie bone rolos. La konkurso havas sencon nur tiam, se evidentiĝas, kiu je kio kapablas, kiom evoluis, kaj surbaze de la rezultoj ni povas stimuli al pli grandaj plenumoj. Ni neniel pelu la instruatojn en fiaskon.

– *Sed troviĝas tiaj, kiuj salte evoluas.*

– Tiajn infanojn oni devus transigi en pli altan klason aŭ tie konkurigi ilin. Por konkurigo prezentas eblon ankaŭ diversaj plenkreskulaj konkursoj. La nuna lerneja organizformo ne konvenas, ĉar oni okupiĝas pri la infano ne tie, kie oni devus fari tion surbaze de liaj donitaj kapabloj. Vane vi provas saltigi infanon super 120 cm, se li kapablas nur 80. Sed same senbezone vi saltigas lin super 120, se li jam kapablas 180. Per tio li ne evoluas.

– *Kiel vi klarigas, ke ankaŭ la ŝakinstruadon de viaj filinoj vi organizis en la kadroj de familia pedagogio? Ĉu ne ekzistas en Hungario organizita ŝakinstruado?*

– Bedaŭrinde tiu problemo ne estas solvita. Krom kelkaj sporadaj lokaj iniciatoj (iutempe ekz. en la urbo *Tapolca*) mankas sistema ŝakinstruado – malgraŭ tio, ke la mondo faris grandan paŝon antaŭen ankaŭ sur ĉi tiu kampo.

En neniu klubo en Hungario ekzistas ĉiutaga, regula ŝakinstruado. Eĉ la junulara trejnisto de la Hungara Ŝak-Asocio ne gvidas regulajn trejnadojn. Tio estas stranga, ĉar en neniu sportobranĉo havas junuloj tiom da deficito



de trejniĝo. Ne ekzistas ŝaktrejnistoj, aŭ se tiuj tamen troviĝas, ili ne faras eĉ duonlaboron. La plej bonaj ŝakistoj ĉefe nur konkuras, kaj ne transdonas siajn spertojn. Kvankam oni devus ekkonscii: ne eblas sukcesa edukado sen multa laboro. La edukado alportas siajn fruktojn nur post 10–20 jaroj. Sed se ni komencos ĝin nur post dek jaroj, ni havos rezulton nur post 20–30 jaroj.

– *En kiu lando funkcias bona ŝakinstrua lernejo?*

– En Sovetunio troviĝas pluraj. La sovetianoj komencas tre frue la ŝakinstruadon. Ekzistas infanĝardenoj, kie oni okupiĝas pri ŝako, kaj troviĝas bazlernejoj (lernohejmoj), kie la infanoj hejmeniras nur dimanĉe posttagmeze. Tamen surprizas min, ke ĉi tiuj lernejoj ne funkcias kun sufiĉa efikeco, kvazaŭ oni fuŝus ion... Al mi ŝajnas, ke oni kalkulas je tio, ke el tiom multaj infanoj iel aŭ tiel certe elkreskos kelkaj eminentaj ŝakistoj. Sed ankaŭ en Anglio, Nederlando, Francio kaj FR Germanio oni faras multon por eduki gejunulojn en ĉi tiu direkto.

– *Per kiuj instruteknikaj rimedoj oni povus kontribui al la ekŝato de la ŝako kaj al ties pli sukcesa instruado?*

– La du plej gravaj instruteknikaj rimedoj estas la televidilo kaj videoaparato. En Usono oni jam pretigas videokasedojn por ŝakinstruado. En iu el ili ekzemple *Seirewan* lekcias pri ŝaktemoj. Multajn tiajn ni bezonus. Mi kredas, ke mi ne devas detali la avantaĝojn de la televido, sed en Hungario ekzemple preskaŭ malestas televidaj ŝakprogramoj. En Sovetunio kaj FRG ekzistas multaj tiaj: intervjuoj, elsendoj pri konkursoj, kompleta prezentado de paraj matĉoj ktp.

Sed eble la plej bezonata instruteknika ilo kaj laborrimedo estas la komputilo, ĉar:

– personaj komputiloj plenumas unuavice la rolon de datenbanko,

– ŝakkomputiloj servas kiel bona partnero precipe al infanoj, komencantoj kaj amatoraj ŝakludantoj (miaj filinoj blindludas per komputilo),

– en la problemŝako oni uzas ilin ankaŭ por kontroli la senerarecon,

– grandpovaj komputiloj uzeblas unuavice ĉe preciza analizo de malmultfiguraj finludoj.

– *Se tio dependus de vi, ĉu vi fondus ŝaklernejon? Kiun metodon vi tie enkondukus?*

– Mi ne povas respondi al la unua demando, sed se mi tamen establus ion tian, mi realigus unuavice tiujn ideojn, kiujn mi elprovis kaj sukcese aplikis ĉe miaj filinoj.

– *Ĉu supozeblas, ke funkciigante tian lernejon, Hungario starus longan tempon sur la pinto en la konkuro de la nacioj?*

– La demando kompletigendas per tio, ĉu ankaŭ aliaj farus la samon aŭ ne. Ĉar se oni laborus per simila metodo ankoraŭ en dudek aliaj landoj, oni atingus ankaŭ tie similajn rezultojn, kiajn mi povus promesi.



## 4. ŜAKO EN PSIKOLOGIO, PSIKOLOGIO EN ŜAKO

„La ŝakludo, same kiel la scienca esplorlaboro, estas unuavice pasio."

*Szentgyörgyi* A.

„Bona ludanto trompas sian kontraŭulon, dum malbona trompas sin mem."

*Székely* J.

„Mi evitas luktojn; male, mi ĉiam cerbumas, kiel venki."

R.J. *Fischer*

– *Via genieduka sistemo konstruiĝas sur la strikta unueco de pedagogio, ŝakteorio kaj psikologio, tamen mi opinias, ke indus ekzameni ankaŭ aparte, kio ilin interligas. Ni rigardu unue la psikologian flankon!*

– La ŝako kaj pedagogio kunplektiĝas per multaj fadenoj. La ŝako havas sian lokon en la psikologiaj esploroj, kaj la psikologio ĉeestas en la konkura ŝakludado.

La konkurantoj atendas kaj povas ricevi helpon de la psikologio. La konkura ŝakludado postulas specifan animstaton, kies konscia influado – kaj teoria fundamentado – povas kontribui al la sukcesa konkurado.

Psikologiaj konoj kapablas forte helpi la ekkonon de la propra personeco. Kio estas miaj malfortoj? Kio miaj virtoj? Kiel mi progresas en la meminstruado? En kiu direkto mi devas paŝi? Kiu stilo plej konvenas al mi? Multajn demandojn oni povas meti al si. Se estas vero, ke sen certagrada memkono oni povas sukcesi sur neniu tereno de la vivo, tio rilatas eĉ pli al konkuroj de ĉiaj specoj.

La psikologie fundamentita konkurado kapablas serioze helpi en la disvolvado de personectrajtoj: ĝi formas la volon kaj emociojn, pliigas la persistemon, memdisciplinon, luktemon ktp. *Botvinnik* ekzemple emfazis, ke konkuranto devas atingi la staton de maksimuma laborkapablo dum konkurso, kaj li opiniis tre grava ankaŭ la elformadon de konvenaj emocia stato kaj humoro. Per speciala trejnado li ellernis batali kontraŭ siaj negativaj emociaj manifestiĝoj. Li evoluigis maksimuma ankaŭ sian sinkoncentran kapablon. Li sukcese alojis en si trankvilon kaj luktemon. Nuntempe la psikologio funkcias jam por ĉiuj elstaraj konkurantoj kiel kompletiga scienco...

– *...uzata por ekkoni la kontraŭulon...*

– Nature, la ŝako estas ja ankaŭ spegulo de la animo. En la ludoj de la kontraŭulo bone reflektiĝas certaj liaj psikaj trajtoj. Ties studado povas liveri multajn informojn pri la temperamento kaj karaktero de la ŝakludanto, do la partneroj povas prepari sin unu por alia. Tio gravas ankaŭ pro tio, ke la trejniĝoj en la ŝako okazas sen la psika atmosfero de konkurluktoj. El jam luditaj partioj oni povas antaŭ la konkurso analizi, kia estas la kontraŭulo kaj elekti tiel la plej celtrafan taktikon. Se mi scias lian malforton, mi klopodas elekti tian ludvarianton, stilon, kiu psike malagrablas al li. Se mi scias, ke li ne ŝatas surprizojn, mi devas surprizi lin per ia malfermo aŭ kombinaĵo. Se mi scias, ke li havas agreseman temperamenton, mi klopodas direkti la ludon al fluo trankvila ktp.

Emanuel *Lasker* estis ĝuste tiu ŝakisto, kiu alte taksis la personecon de la homo, kaŝiĝantan malantaŭ la „vivo" de la ŝakfiguroj. Li faris ekzemple multfoje ne la movon laŭpozicie optimuman, sed tiun, kiun li konsideris plej malagrabla por la kontraŭulo. Li riskis eĉ pli malbonan movon, nur por ĝeni la kontraŭulon. Hodiaŭ bonan ŝakiston tio jam ne malekvilibrigus.

– *Se la afero tiel funkcias, oni povas evidente ankaŭ misuzi la psikologiajn konojn...*

– Oni povas, kompreneble, kiel oni povas misuzi en certaj okazoj ĉiun konon. Tial por honesta konkurado necesas la jam menciita etika kontrolo kaj korekta morala sinteno.

– *Kiuj estas la kapabloj, kies disvolvadon vi konsideras aparte grava?*

– Mi listigos kelkajn, kiujn priskribas en siaj verkoj *Djakov, Petrovskij* kaj *Rudjik* (ili faris interesajn eksperimentojn pri grandmajstroj en 1925), krome *Lasker, Krogius, Fine, Kotov, Hartston* ktp. Antaŭ ĉio do necesas atingi kaj konservi bonajn fizikan staton, sanon kaj nervostaton. Ŝakisto devas sidiĝi al la ŝaktabulo kun sufiĉa fizika fortorezervo kaj bona nervosistemo, por ke li povu rezisti al malagrablaj kaj ĝenaj ekscitoj. Tio postulas seriozan psikan harditecon: tiuj ĉi efikoj tuŝas ja la „animon" (la atakoj fare de la gazetaro ekzemple povas signife malpliigi la plenumpovon).

La persisto, krome la fizika, mensa kaj anima stabileco valoras samgrade, kiel en la fizikaj sportobranĉoj, kie oni nomas ĝin harditeco, sed fakte ankaŭ tie ĝi signifas la konservon de laborkapablo malgraŭ longedaŭraj kaj ripetiĝantaj ŝarĝoj.

En ĉi tiun kategorion mi ordigas la eltenon de monotonio, la kapablon de daŭra interesiĝo kaj persista atento. Ilia manko povas kaŭzi ekzemple gravajn pretervidojn, ŝakblindecon, erarojn faritajn en gajna pozicio, preterlasitajn kombinaĵojn. Eble la plej grava komponanto de la stabileco



estas, ĉu la ludanto kapablas koncentri sin en la „ĉefa direkto", forteni sin disde flankaj, ĝenaj faktoroj, t.e. kiom li povas „efektivigi" sian scion kaj karakteron.

Plue: disciplineco, memrego. La konsciaj disciplino kaj memdisciplinado ne malhaveblas por atingi bonajn rezultojn. Dum ludo aperas unu post alia humoraj elementoj: postefikoj de pli frua malvenko, streĉoj pro eblaj variantoj de la partio, la sekso, aĝo kaj psika taktiko de la kontraŭulo, hazardaj aŭ intencaj ŝanĝoj de la ĉirkaŭaĵo.

Notinda faktoro estas la kapablo de sinedukado surbaze de realisma sinkono, kio manifestiĝas en konstanta memkritiko kaj preteco al sinkorektado. Dum sana memfido ne malhaveblas, sintrompo certe kondukas al fiasko en la ŝako.

Tre gravas disvolvi plurajn intelektajn kapablojn, inter ili tiun de bona memorkapablo, kombinada preteco, kapablo je pura logiko kaj taŭgeco por intuicio. Ekzemple, bona memorkapablo servas al facila parkerigo de la movoj kaj figuraj kombinaĵoj de la partio. La kombinada preteco ebligas celtrafe grupigi pensojn kaj ideojn, krome imagi la figurojn dum moviĝo kaj samtempe en diversaj situacioj.

Krom ĉio ĉi aparte gravas la evoluigo de sana luktokapablo – unuavice kompreneble por konkurŝakistoj, sed ĝi povas esti utila por iu ajn. La lukto okazas samtempe sur diversaj kampoj:

- lukto por superi sin mem (la ĝisnunajn rezultojn, la proprajn barojn),
- lukto por akiri certan pozicion interne de grupo aŭ komunumo,
- lukto kun la kontraŭulo,
- lukto por atingi aŭ alproksimigi ian „eksterkonkursan" celon aŭ valoron.

Kompreneble estas vero, ke la sporto – krom esti ankaŭ multo alia – funkcias kiel unu el la eblaj rimedoj manifesti sin kaj distingiĝi. Ĉi-lasta neniam devas direktiĝi kontraŭ aliuloj aŭ damaĝe al aliuloj. Tio estas baza kondiĉo de la sportista vivo. La lukto premisas la ekkonon de la kontraŭulo, la taksadon de lia forto, ekkonon de lia stilo kaj lian venkon.En Hungario *Révész* Géza okupiĝis pri la psikologio de ŝakludantoj por utiligi ĝin en la disvolvado de talentoj. Mi povus daŭrigi la ekzemplojn. Eksperimentoj faritaj en Sovetunio en 1925 celis bazi novan branĉon de psikologio, la ŝakpsikologion. Atentindaĵon kreis sur tiu ĉi kampo la soveta ŝakgrandmajstro kaj ŝakpsikologo N. *Krogius*.

Ankaŭ *Lasker* asertis, ke la ŝakstilo estas projekciiĝo de certaj ecoj de la personeco. Li opiniis, ke el la ŝakludo oni povas konkludi ankaŭ pri karaktertrajtoj de la ŝakludanto, kaj tio estas ĝusta. Pro tio la psikologio

povas koncepti la ŝakon kiel teston, en kiu speguliĝas ecoj de la homo. Evidente, tiun teston, simile al aliaj, oni povas akcepti nur kiel parton de kompleksa ekzameno.

– *Kiel vi opinias pri la scienca esploro de specifaj kapabloj kaj entute pri la taksado de kapabloj de aliuloj?*

– Bedaŭrinde oni ofte efektivigas ĉi tiun taksadon malhavante sufiĉajn informojn; eĉ iuj fakuloj tiel faras malgraŭ tio, ke la ekkono de personeco kaj ene de ĝi la reala taksado de kapabloj havas tre grandan signifon kaj el teoria kaj el praktika vidpunktoj.

Multaj faras la eraron, ke ili provas konkludi pri esceptaj kapabloj surbaze de inteligentotestoj. Laŭ la fakliteraturo ekzemple *Varró* Margit esploris infanojn elstare talentajn pri muziko, kaj spertis ĉe ili la nesufiĉecon de inteligentotestoj. Al simila konkludo venis ankaŭ *Révész* Géza, renoma fakulo pri talentoesplorado. Li observis ĉe la ekzamenado de escepte talentaj infanoj, ke ilia inteligento apenaŭ superas tiun de solide mezinteligentaj infanoj. La rezulto de la testo ankaŭ laŭ li ne bone karakterizas la „eksterordinarajn intelekton, komprenkapablon kaj mensan nivelon de la infanoj". Same konkludis multaj alilandaj esploristoj surbaze de siaj esploroj, inter ili pluraj ŝakpsikologoj.

Unu el la plej gravaj metodoj ekkoni la kreokapablon estas ankaŭ la esploro de biografioj. La kapablojn oni povas rekoni, ekkoni kaj taksi nur surbaze de efektivaj agadoj. Ĉiu provo difini la kapablojn ekster la specialaj agadsferoj kondukas logike al eraraj konstatoj.

Tre grava aspekto estas la komparado de rezultoj (konkursrezultoj kaj kreaĵoj) de escepte kapablaj homoj. La principoj de esplorado de infanaj kreaĵoj ne diferencas laŭesence de tiuj principoj, kiuj gvidas nin ĉe la analizado de plenkreskulaj kreaĵoj. Sed ĉar temas pri aktuale evoluantaj infanoj, ĉe la prijuĝo de la kreaĵoj oni ne neglektu la propraĵojn de la evoluetapo! Por analizi la donitaĵojn de escepte kapablaj infanoj, kaj por havi bildon pri ilia atendebla disvolviĝo, oni devas kolekti kreaĵojn kaj konkursrezultojn el diversaj evoluperiodoj, kaj kompari ilin unuflanke inter ili mem, aliflanke kun infanaĝaj kreaĵoj de aliaj escepte kapablaj infanoj.

Tre utilas ĉi-koncerne la kompilo de familia arkivo: fotoj, gazeteltondoj, ekspertaĵoj, korespondaĵoj, ŝakpartioj ktp..

– *Ĉu oni povus uzi la ŝakon ankaŭ en la medicina psikologio?*

– Jes, kaj en la diagnozistiko kaj en la psikoterapio. Helpe de ĝi terapeŭto povas ekzemple direkti, kiam li venigu sian pacienton al sukceso (aŭ male). Tute simpligante: se mi sidas kun paciento kaj vidas, ke oni devus plifortigi lian memfidon, mi lasas lin venki; se mi vidas, ke li havas



tromemfidon, kaj oni devus iom malpliigi ĝin, mi ne cedas dum la ludo. Oni devas kompreneble senerare senti la proporciojn. Krom tio la ŝako estas terapia rimedo ankaŭ en tiu senco, ke ĝi kapablas aktivigi la personecon de malsanulo, stimuli lian obtuzan spiriton. En certaj okazoj oni povus uzi ĝin, por plifortigi jam atingitajn rezultojn.

– *Ĉu tiun ĝian propraĵon aplikas ankaŭ la psikopedagogio?*

– Nepre. Tre bone ĝi aplikeblas ekzemple ĉe kontraŭsociemaj, neŭrozaj, emocie kaj ambicie difektitaj infanoj. Pere de ĝi kapteblas la atento de la infano, kaj la ludo povas certigi en la ĝusta tempo travivon de sukcesoj. Denove mi simpligas: se iu multe ŝakludas, li havas malpli da tempo por drogumado. Deviajn agojn efektivigas ĝenerale tiuj, kiuj ne havas orientilojn, perspektivon, kiuj ne travivas sukcesojn sur aliaj terenoj.

– *Ĉu ŝaktrejnistoj utiligas la rezultojn de psikologiaj esploroj?*

– Kvankam tio certe utilus por ili, mi spertas, ke ili faras tion malofte. Ĝenerale ili nur instinkte utiligas la science pruvitajn spertojn. Mi diru ekzemplon: multaj homoj trapasis ekzamenon pri logiko, sed kiom da homoj aplikas konscie la tezojn de la logiko? Nu, simile statas la afero ankaŭ pri la ŝakpsikologio. Domaĝe.

– *Lasu min vortigi demandon de multaj gepatroj. Per kiu psikologia–pedagogia rimedo mi povas rekoni en mia infano la ŝaktalenton? Nome multaj diras: mi volonte edukus ŝakiston el mia infano, sed mi ne taŭgas por rekoni, ĉu li havas talenton por tio aŭ ne?*

– Mi kredas, ke ĉiu infano estas potenciala ŝaktalentulo. La specifaj kapabloj ne estas denaskaj donitaĵoj de la homo, sed oni devas manifestigi ilin per edukado. Do la rekoneblo de ŝaktalento ne estas fakta problemo. La demando sonas prefere tiel: ĉu la gepatroj pretas aŭ ne pretas, ĉu ili havas sufiĉan memfidon kaj kuraĝon por la edukado. Mi povus eduki ĉiun sanan infanon ŝakmajstro. La gepatroj interesiĝu, kiel ŝakmajstroj fariĝis ŝakmajstroj kaj kapabligu, klerigu sin por krei similajn psikologiajn kaj fakajn kondiĉojn por sia infano. Ili ne zorgu pro tio, ĉu la infano havas talenton aŭ ne!

## 5. PRI LA EMANCIPIĜO DE VIRINOJ

„Nur per egala mezurilo! Licu ankaŭ al virinoj, kio licas al viroj, aŭ ne licu ankaŭ al viroj, kio ne licas al virinoj."

*Bartók* B.

„Inter ĉiuj virinoj konataj de mi, sinjorino *Curie* estas la sola, kiun la sukcesoj ne koruptis."

A. *Einstein*

"Instrui knabinojn necesas same bone, kiel junulojn; tiuj same utilas al la lando, kiel ĉi tiuj."

*Mikes* K.

– *Nun jam kaj en-, kaj eksterlande granda atento turniĝas al la lukto de viaj filinoj por la egalrajtigo de virinoj. Ĉu vi ĉiuj opinias, ke venos la tempo, kiam la „vira" ŝakmondĉampiono estos virino?*

– Vi esprimas vin malĝuste. Virino neniam fariĝos vira ŝakmondĉampiono, ĉar la titolo „vira ŝakmondĉampiono" tute ne ekzistas. Ŝakmondĉampiono povas esti viro aŭ virino. La titolo de *Kasparov* ne estas „vira ĉampiono", sed nur ŝakmondĉampiono. Dum longa tempo la ŝakludo estis tiom vira aktiveco, ke la kreintoj de ĝiaj reguloj ne atentis eĉ pri tio, ke ili nomu ĝin „vira" konkurso. Tiel do ne ekzistas vira ŝakkonkurso.

– *Do virinoj rajtas konkuri sen seksotesto en konkursoj de viroj.*

– Niaj filinoj rajtas iam ajn ludi en viraj konkursoj: tio ne kontraŭas al la reguloj. Sed en konkursoj, olimpikoj kaj mondĉampionadoj de virinoj rajtas konkuri nur virinoj, per kio oni signas, ke la virina plenumpovo ne egalas al tiu de la viroj, kaj ĉi tiuj konkursoj estas nur „duaklasaj".

– *Vi luktas en la unuaj vicoj por la egalrajteco. Laŭ la vortoj de la filozofo Szabó György András „vi fariĝis fruaj revoluciuloj" de la batalo. Estas vero, ke en viraj konkursoj nun jam startas pluraj virinoj, sed vi estas la solaj, kiuj en la lasta tempo ne ludis en virinaj konkursoj (krom la olimpikoj). Vi faris tion por pruvi: virinoj ne postrestas post viroj. Kiel aperis ĉi tiu celo en via eksperimento?*

– Mi kredas, ke tiu estas la unusola punkto, kiu elformiĝis akcesore, dumlabore. La tuton de mia pedagogia sistemo mi planis ĝenerale antaŭ la



naskiĝo de miaj infanoj. Mi ne antaŭvidis, ke naskiĝos nur filinoj, kaj kiam ili naskiĝis, mi alfrontiĝis al speciala problemo: la diskriminacio de virinoj.

– *Kiel tio tuŝis vin ĉiujn?*

– Kiam mian unuan filinon Zsuzsa mi volis konduki laŭ la spirito de mia pedagogia koncepto al la pinto, multaj klopodis malhelpi nin ĉe tio. Oni ne permesis al ŝi konkuri inter knaboj, oni trudis ŝin partopreni nur en knabinaj konkursoj. Kompreneble, mia primara celo restis pruvi la ĝustecon de la geniedukado, sed mi kompletigis ĝin akcesore per la celo demonstri, ke inter la intelektaj donitaĵoj de viroj kaj virinoj biologie ne ekzistas esenca, decida diferenco, kaj argumentante per tio, oni nerajte motivas la flankenŝovon kaj „subjugadon" de virinoj.

– *Oni ne lasis disvolviĝi ĉi tiun vian ambicion, ĉu?*

– La kompetentuloj komunikis al mi, ke el Zsuzsa oni povas eduki praktike nur virinan konkuranton, virinoj ja ne kapablas je rezultoj egalaj al tiuj de viroj ktp., ktp.. Aŭdiĝis do unuflanke la malnova melodio, kaj aliflanke surpluvis min la diskriminaciaj reguligoj.

– *Ĉu tiam vi decidis turni vin kontraŭ ĉi tiu koncepto?*

– Jes. Unue mi trastudis la fakliteraturon kaj vidis, ke knabinoj brilege startas sur ĉiuj terenoj. En la unua klaso bazlerneja ili montras similajn aŭ pli bonajn kapablojn ol knaboj, kaj ili same progresas, ĝis ili alprenas kaj ludas virinajn rolojn postulatajn kaj destinitajn al ili fare de la socio. Tiuj roloj poste efikas negative sur la disvolviĝon de iliaj kapabloj. Al la elformiĝo de ĉi tiuj malavantaĝaj roloj kontribuas ekzemple, ke knabinojn oni enkondukas frue en loĝejpurigadon, lavadon, kuiradon, edukas ilin sekvi la modon, atenti pri detaloj de vestiĝo ktp., aŭ oni preparas ilin tiel por la vivo, ke laŭeble plej frue ili edziniĝu. Do oni atendas de ili esence ion alian, ol de knaboj. Oni ne miskomprenu min, mi ne volas diri, ke virinoj ne alprenu certajn virinajn rolojn, kiuj estas necesaj kaj bonaj. Gravas, ke ili edziniĝu, patriniĝu, eduku infanojn ktp.. Sed ili povas fari tion ankaŭ kune kun la edzo, do kune eduki infanojn, kune alpreni familiajn ŝarĝojn kaj ankaŭ avantaĝojn. Eble viroj ŝtomunos min pro tiu ĉi opinio, sed mi kredas, ke en la intereso de la socia justeco kaj emancipiĝo mi devas deklari tion.

– *Do por vi evidentiĝis, ke knabinoj disvolviĝas en la lernejo simile al knaboj, kaj el tio vi konkludis, ke virinoj povas atingi samajn rezultojn ankaŭ en la ŝakludo, kaj surbaze de tio vi ellaboris specialan strategion.*

– Jes. Ties esenco estas, ke por virinoj oni devas krei proksimume similajn psikologiajn kaj (ŝak)fakajn kondiĉojn, kaj tiam ili atingos tiajn rezultojn kiel viroj.

Mi provis organizi tion por miaj filinoj. Sed mi ne povis solvi la problemon, ke ankaŭ aliaj, do ŝakkamaradoj kaj la socio fidu al ili. Estis malmultaj trejnistoj, kiuj inklinis akcepti ĉi tiun teorion, sed troviĝis multaj, kiuj eksplicite malaprobis kaj kontraŭis ĝin.

*– Sur kio vi bazis viajn esperojn? Se ni rigardas la nunajn konkursojn, ni trovas konsiderinde grandajn diferencojn inter viroj kaj virinoj.*

– La nunaj rezultoj ne estas science fidindaj, ĉar kiel la psikologo *Klein* Sándor konstatis: Ni scias nur tion, ke la nuntempaj plenkreskaj virinoj estas pli malfortaj en la ŝako, ol la nuntempaj plenkreskaj viroj. Sed kio kaŭzas tion, ĉu biologia donitaĵo aŭ sole edukado, ni ne povas „elfiltri" el la fakto mem. La sperto pruvas, ke sur aliaj mensaj terenoj kiel matematiko aŭ lingvolemado la knabinoj centprocente kunprogresas kun knaboj dum la tuta tempo de la lernejaj studoj, ne nur en bazlernejoj, sed ankaŭ en mezlernejoj. La diferencoj aperas nur pli malfrue konturiĝas. Do la faktoj lasas konkludi prefere al egaleco.

Laŭ *Raskó* Gabriella: „Oni faris tre multajn eksperimentojn en la tuta mondo pri inteligenteco, inkluzive de memorkapablo, logikaj, abstraktadaj kaj kombinadaj kapabloj. La rezultoj klare pruvis, ke la averaĝa inteligentokvociento de virinoj esence koincidas kun tiu de komparebla vira populacio, almenaŭ en civilizitaj landoj„ Aparte ekzamenante la logikajn taskojn oni ne trovis bazita tiun tre disvastiĝintan aserton, ke la logika kapablo de virinoj malpli valoras."

*– Unu el la tendencoj de la moderna genetiko* Czeizel *Endre interpretas jene: "Diversaj esplormetodoj jam delonge pruvas, ke ekz. sur la kampo de parola komunikado kaj spaca orientiĝo inter la du seksoj montriĝas mezureblaj diferencoj. La parolkomunikada kapablo de virinoj estas signifike pli bona, ol tiu de viroj, kiuj siaparte havas pli bonan kapablon de spaca orientiĝo. Iom humure oni povus diri: Por la pliigita parolkapablo oferiĝis la spaca orientiĝo ĉe virinoj."*

– Mi restas tamen ĉe la opinio, ke la ĝisnunaj esploroj ekzamenis nur pretajn produktojn: junulojn kaj plenkreskulojn, kaj ne esploris sufiĉe la sen diskriminado kreskantajn infanojn.

Cetere, kiel G.W. *Allport*, usona soci-psikologo skribas: "oni troigas la primarajn kaj sekundarajn seksajn markilojn, kaj ĉi tiujn diferencojn, tufigitajn laŭ ia imagita teorio oni uzas por pravigi la malavantaĝigan diskriminadon de virinoj."

Oni esploru la genetikajn rezultojn ankaŭ en populacio, kie mankas sociaj diferencoj! En la nomo de la esplorista libereco mi postulas, ke oni



pridubu la suprajn elirpunktojn, laŭnecese ne pruvitajn. Jen kial mi adeptas, kiel logika sekvanto de mia sistemo, ankaŭ al la virina egalrajteco.

*– Tamen diru, kiujn argumentojn oni lanĉas kutime ankaŭ nuntempe kontraŭ la virina egaleco?*

– Ekzemple la pezdiferencon de la virina cerbo, aŭ ke la virina sango havas malpli da eritrocitoj ktp. Laŭ la neŭrofiziologio ĉi tiuj faktoroj ne signifas malavantaĝon por la virino. Aŭ ke virinoj havas menstruon, kaj ĝi malhelpas ilin en la konkurado. Pri tio mi opinias, ke unuflanke ĝi kaŭzas malfacilaĵojn ne por ĉiuj virinoj, kaj aliflanke la tempo de menstruo hodiaŭ jam influeblas. (Ekzistas interalie kontraŭspasmaj tablojdoj.) Ofte aŭdeblas ankaŭ la argumento (aludanta al la propraĵoj de la virina psiko), ke la virino kroĉiĝas ĝenerale al tio, kio estas malnova, kutima, ŝi timas novigojn, ne estas sufiĉe kuraĝa, iniciatema, ne povas esti agresa, estas tro milda kaj senforta, ne plenum- kaj sukces-orientita. Sed esploroj de mondfamaj scienculoj, *Mead*, *Allport*, *Maccoby* kaj aliaj pruvas kaj demonstras kontraŭe, ke ĉi tiuj stilmarkoj de psikologia naturo estas senescepte socie determinitaj. Kaj mi konsentas plene kun ĉi lastaj.

*– Se tiel estas, kial ne aŭdas trejnistoj (kaj ĉefe la ŝak-asocio) ĉi tiujn faktojn?*

– Nu, tio estas jam pli komplika demando. Tio havas plurajn kaŭzojn. Unue pro tio, ke ĉi tiu nuna sistemo estas oportuna por virinoj mem, ĉar virinaj ŝakistoj povas per multe malpli da laboro stari en la virina elito, kaj kiu tie staras, ne volonte rezignas pri ĉi tiu pozicio. Jen la klarigo por tio, kial la plej grandaj malamikoj de miaj filinoj troviĝas inter iliaj propraj "samsortanoj", la virinoj: ĉi lastaj batalas kontraŭ ili per ĉiuj dek ungoj. Laŭ la nuna virina mondĉampiono, Maja *Ĉiburdanidze* ne eblas por virinoj atingi la scion de viroj. Kaj se ŝi taksas sin netaŭga por tio, ŝi certe ne eldiros, ke ŝi konas iujn – ekz. miajn filinojn –, kiuj per konvena subteno eble povos tion fari.

*– Iu diris ironie: „La Hungara Ŝak-asocio estas bezonata por "ŝakigi" la Polgár-knabinojn."*

– Jes, da ĝiaj "benoj" ni ricevis abunde. Kalumniojn, malestimon, diskriminadon, gazetarajn kampanjojn. Ili diris ankaŭ, ke mankas en ni patriota sento.

*– Tio estas evidenta miopeco, sur titolpaĝoj de la monda gazetaro ja plej ofte aperas la Polgár-knabinoj apud aŭ eĉ antaŭ Boris Becker, Stefi Graf aŭ la italaj futbalistoj. Polgár Judit fariĝis premiito de ŝak-Oscar, kaj en mia lando eĉ inter viroj neniam estis ŝak-Oscar-premiito. Provinceca hungara vidmaniero!*

– Provinceca kaj proprece vira vidmaniero. Unu el la ĉefaj kaŭzoj de nia diskriminado estas, ke viroj volis provi per la ĉi-kampaj vidindaj diferencoj sian superecon al virinoj. Mi ne asertas, ke viroj kaj virinoj egalas en la nuna socio, sed jes ja decide, ke la kaŭzo de ĉi tiu malegaleco estas ne biologia, sed socia. Kaj la pruvadon mi komencas sur tereno, kiu servis por "virokratoj" kiel la lasta kaj eble plej atuta argumento: la ŝakludo. Tiuj, kiu propagandis intelektan diferencecon inter viro kaj virino, argumentis finfine ĉiam per la ŝako. Sed eble la rezultoj de miaj filinoj senmaskigos la malsolidecon de ilia argumentado.

– *Tio do estas la esenco de la granda kontraŭemo?*

– La moderna genetiko jam akceptis la similecon de IQ (inteligent-kvociento) de viroj kaj virinoj, sed ĝi tezas la diversecon de dispozicioj inter la seksoj. Ankaŭ tion mi ne kredas. Tio elformiĝas same sub la efiko de la socia edukado, oni ja instruas la ŝakludon al tre malmultaj knabinoj (kial?!), kaj oni ne konsideras ankaŭ la matematikon knabina "sporto". Sed se virinaj konkurantoj volas atingi similajn rezultojn, kiel la ŝakmondĉampionoj *Karpov* kaj *Kasparov*, ili devas lerni inter similaj kondiĉoj, devas konkuri inter similaj kondiĉoj. Kiu preparas sin esti nur virina konkuranto, kontraŭ tiu la postuloj de la medio estas aliaj, ŝi mem atendas ion alian de si, alimaniere ŝi travivas siajn sukcesojn kaj fiaskojn. La virinaj konkursoj estas tre malaltnivelaj, kaj se ni volas ŝanĝi ĉi tiun situacion, ni devas konkurigi virinojn inter viroj, absolute nur inter viroj.

Laŭ mia sperto: kiu konkuras inter viroj, atingas pli bonajn rezultojn, ol tiu, kiu ludas kaj kun viroj, kaj kun virinoj, kaj kompreneble nemezurelbe pli bonajn, ol tiu, kiu startas nur inter virinoj.Tion bildigas la sekva figuro:

<u>Virinaj konkursantoj</u>

| Ludas en virinaj konkursoj inter si | Ludas kaj en virinaj, kaj en viraj konkursoj | Ludas kun virinoj inter similaj kondiĉoj, kiel viroj |
| --- | --- | --- |
| 1 | 2 | 3 |
| 2700 | 2700 | 2700 |
| 2400 | | 2500 |
| Nur serpenta promenvojo supren | Serpenta vojo, kombinita kun krutaj etapoj | Nur kruta vojo |

Analogio de monto: la plej celproksima vojo al la pinto kondukas tra krutejo.



El ĉi tiu vidpunkto la ŝako neniel diferencas de aliaj intelektaj studobjektoj aŭ fakoj. En lernokonkursoj neniu havas la ideon postuli, ke iuj pruvu sian eminentecon inter knabinoj, kaj nur poste startu inter knaboj . Estus pli ol strange, se *Péter* Rózsa, la elstara hungara matematikistino ne povus ricevi la doktorecon pri matematikaj sciencoj, dum ŝi ne pruvas, ke ŝi estas la plej bona matematikisto inter virinoj .Hodiaŭ oni ne aranĝas matematikajn konkursojn aparte por knaboj kaj knabinoj, kaj se iu provus fari tion, oni tuj konsilus al li forlasi la katedron. Kial do oni apartigu la seksojn en la ŝako?

– *Ĉar ni konsideras la ŝakon sporto.*

– Ĉu la matematikan konkurson ne? Ankaŭ ĝi ja havas olimpikojn! Kaj ĉu ekzistas por Nobel-premiitoj apartaj virina kaj vira premioj?! Absolute nenie! Inter la intelektaj aktivecoj nur ĉe la ŝako.

– *Ĉu vi opinias, ke inter la nunaj cirkonstancoj oni povus ĉesigi la apartigitan konkursigon de viroj kaj virinoj?*

– Oni devus ĉesigi ĝin je ĉiuj niveloj, ĉar tio estas la kaŭzo, ke virinoj ne povas pluevolui. Ĉar virinoj diras, se mi estas stelo je virina ebeno, kial fariĝi tio je vira ebeno? Tre strangas, ke en la kongreso en Dubai en 1986 oni voĉjesis diskriminan regulon, laŭ kiu virino estonte ne rajtos ludi en "vira" teamo en mondkonkursoj. Ĝuste nun okupiĝas la konsilantaro de grandmajstroj pri la plano, peti la Internacian Ŝak-asocion pri la ĉesigo de ĉiuspeca diskriminado de virinoj, eĉ: iniciati la kompletan ĉesigon de la virina ŝakludo.

– *Ĉu dekomence vi intencis konkurigi víajn filinojn inter viroj? Ĉu vi ne timis, ke tio estas eble tia alteco, kiu kondukas al fiasko?*

– Mi ne timis, ĉar mi supozis, ke viroj kaj virinoj disponas pri egalaj kapabloj. Mi konsentas kun *Selye* János: "Ankaŭ el virino povas fariĝi eminenta scienculo". Mi eliris el tio, ke kvankam ankoraŭ ne estas unusence pruvite, ke virino povas atingi samajn rezultojn, kiel viro, tiel longe, dum oni ne pruvas la kontraŭon, oni ne rajtas ekskludi virinojn. Sed ĝis nun ankaŭ mia eksperimento pravigis nur parte la ĝustecon de mia hipotezo, ĉar mi pruvis nur, ke ĝi veras en tiu ĉi aĝogrupo. Se miaj filinoj ne plupruvus ĝin en postaj tempoj, el tio ankoraŭ ne sekvus, ke tio ne eblas. Ankaŭ en miaj edukaj principoj povas kaŝiĝi eraroj. Sed ege retropuŝas miajn filinojn, ke malmultaj fidas pri tio, ke ili kapablas atingi rezultojn. Do krom miaj metodoj ankaŭ eksteraj efikoj, cirkonstancoj sendependaj de ni, forte influas la disvolviĝon de ĉi tiu "partio".

– *Multaj homoj konsideris vin kurioza birdo, ankaŭ tiuj, kiuj cetere sentis al vi simpation ĉu en-, ĉu eksterlande. Ili diris: Kio okazus, se la*

*knabinoj tamen startus ankaŭ en virinaj konkursoj? Eĉ en plej malbona okazo ili ne malvenkus, tamen ili ne ŝajnus ekstravagancaj. Iu mia kolego, universitata profesoro kaj renoma ŝakisto el Baku, Jaŝa Abasov deklaris ekz.: Dum certa tempo ankaŭ mi pensis, ke la soveta virina ŝakskolo tiom superas, ke ne valoras serioze okupiĝi pri konkurenco.Ĉi-rilate la fakton, ke la fratinoj Polgár ludas nur kun viroj, mi kun la amikoj opiniis tipe virina kaprico... Sed post la olimpikoj en 1988 ni devis ĉion revizii.*

– Komprenu bone, la afero ne tiel simplas! La personeco estas tre komplika sistemo. Mi diros ŝajne senprobleman ekzemplon: Miaj filinoj rolis unuafoje en 1988 en olimpikoj, kaj tuj fariĝis ĉampionoj. Kio rezultis el tio? Ili ekhavis pli da memfido, fariĝis pli famaj, plimalvastiĝis la rondo de kontraŭvetantoj, ili ne plu bezonas tiom timi krudajn diskriminojn, ricevis pli da kuraĝigoj ktp., kaj ĉio ĉi bone efikas. Sed eble ili fariĝis iom tromemfidaj, kaj travivas la sukceson ne laŭ la mezuro, kiu estus reala, kaj tio havas negativan psikan reefikon: mi rimarkas, ke de tiu tempo ili multe rolas, kaj malpli laboras. Ilin ekregis jen tia humoro: Se ni estas sur la pinto, kial labori pli multe, ol ĝis nun? Mi timas, ke el la vidpunkto de la fina celo: la viraj mondĉampionaj konkursoj, ĉi tiuj olimpikoj influis malavantaĝe.

– *Mi havus provokan demandon: al via plej juna filino Judit oni aljuĝis ĉi-jare la Oscar-premion. Ĉu vi proponos al ŝi transpreni ĝin, aŭ malkonsilos al ŝi pro tio, ke kiu batalas kontraŭ la diskriminado de virinoj, ne transprenu premion por virinoj?*

– Kompreneble mi ne malkonsilos al ŝi pro pluraj kialoj. Unuflanke mi mem kundecidis, ke ŝi partoprenu la virinajn ŝakolimpikojn, aliflanke ŝi fakte plenumis la plej multe, atingis la plej bonan rezulton en ĉi tiu monda konkurso. Krome en 1988 sinsekve ŝi gajnis konkursojn multe pli fortajn ol la olimpikoj, ŝi staras pinte de la virina monda ranglisto ktp., do ŝi meritis la premion. Mi estas nur kontraŭ la diskriminado de virinoj.

– *Do vi ne estas militema feministo.*

– Kompreneble ne. Mi edukas la filinojn veraj virinoj. Interalie mi ne nur ne malhelpas ilian viriniĝon, sed tute kontraŭe: mi tre atentas, ke ankaŭ ilia psikoseksa evoluo estu normala kaj sana. Mi laboras por tio, ke oni rigardu ilin kiel verajn, altirajn, atentologajn virinojn. Mi klopodas atingi, ke ili konvenu al la t.n. „necesaj virinaj rolpostuloj". Inter ili mi malaprobas nur tiujn, kiuj povas malutili al ilia intelekta disvolviĝo.

– *Se estus necese, ankaŭ mi konfirmus tion, la knabinoj estas ja vere gajaj, petolemaj, simpatiaj. Amikoj, fakuloj, intimaj konatoj asertas la samon. La renoma psikologino* Mészáros *Judit, kiu loĝas kun vi en la sama domo, diris al mi: ĉi tiuj knabinoj estas ĉarmaj kaj virinecaj. Kvankam iom pli simple ili vestas sin, ol samaĝulinoj, sed ili estas same allogaj, kiel tiuj. Kaj Zsuzsa, se mi bone informiĝis, jam turnadas la planon de edziniĝo en la kapo.*



– *Kaj tio logike kondukas min al la penso pri amo. Amo, kiu povas direkti knabinojn al novaj vojoj. Kio okazos, se alvenos la granda "Li"? Richard* Münzert, *la nomhava okcidentgermana psikologo, simpatianta kun la familio* Polgár, *lanĉis la temon jene: "Alvenos la tempo, kiam ĉi tiuj ĉarmaj kaj plaĉaj knabinoj ŝarĝos la cerbon de knaboj ne nur per ŝakkombinoj: ili turnos al ili ankaŭ la kapon."*

– Tio estas vere grava, decida demando, kaj mi mem ne scias doni definitivan respondon al ĝi. Ĉiuokaze mi edukas miajn filinojn al tio, ke ili edziniĝu, havu infanojn, sed dume ili ne forgesu: ili havas tian vivprogramon, kaj staras antaŭ tiaj pintoj, ke ili devas ne rezigni. Mi esperas, ili havos du amatojn: sian karulon kaj sian karieron. Kaj neniun el tiuj ili "trompos". Plie, ili respondecas ankaŭ unu al la alia. Nun ili jam formas tre fortan teamon, ĝin ili devas konservi, tial ili devas, se necese, ankaŭ oferi, precipe se ili rekompensiĝas per ĝojoj. Mi esperas, ke ankaŭ ĉi tiun grandan taskon de la vivo ili solvos bone. Kiel bona ekzemplo servas por ili la geedza paro *Curie*. Unu punkto certas: edziniĝoj kaŝas en si riskojn, sed oni devas akcepti ankaŭ riskojn. Sed tio apartenos jam al la dua kaj tria aktoj de la psikologia-pedagogia eksperimento.

– *Sed kiel rilatas la koncernatoj al tio, ke ili estas flagoportantoj de la virina emancipiĝo?*

– Demandu ilin mem!

– *Mi jam demandis ĉiujn tri. Zsuzsa respondis prudente, laŭ ŝi: Tio estas emociiga sento, la temo okupas ŝin ofte kaj ŝi fieras, ke ĉe la ŝaktabulo ŝi luktas ankaŭ por la egalrajtigo de virinoj. Zsófi respondis petole: Kompreneble, volonte ni partoprenas en la eksperimento, kaj feliĉe ni pruvas – se ni venkas (kaj ni ŝatas venki) – la lertecon de la ina sekso." Judit, la plej juna respondis plej mallonge: "Mi pri tio ne zorgas."*

# IV. LA SENCO DE LA TUTA AFERO

## 1. LA FAMILIO KIEL VALORO

„Ne sputu en puton, ĉar povas okazi, ke soifante vi mem venos trinki el ĝi!"

I.A. *Krilov*

„Al la plej elementaj bezonoj de la homo apartenas la alia homo."

*K. Marx*

„Trovi anstataŭ bona patro same bonan ne eblas."

*V. A. Suĥomlinskij*

– *Multaj konsideras la plej grava rezulto ne la atingojn de viaj filinoj, sed la familian etoson, en kiu vi vivas. „En ĉi tiu familio – skribas la okcidentgermana Reinhard Münzert – regas harmonio kaj amo. Eble tio estas la plej granda sukceso de la Polgár-oj." Ĉu vi konsentas?*

– Kompreneble karesas min aŭdi, ke ankaŭ eksteruloj rimarkas, kio nin kuntenas kaj varmigas de-interne. Kiu kion konsideras plej granda rezulto, dependas de la vidpunkto. Mi voĉdonas por la feliĉo de nia familio. „La harmonio kaj amo reganta" ĉe ni, kvankam gravaj, sed ne estas la solaj faktoroj de nia feliĉo. Pri unu punkto mi povas deklari kun nepra certeco: sen bona familia fono, amoplenaj familiaj rilatoj la sukcesoj de miaj filinoj ne estus realiĝintaj.

– *Mi povas imagi pri vi, ke vi stariĝis kun plene ellaborita familimodelo antaŭ la oficisto registranta vian geedziĝon.*

– Jes, kompreneble. Mi planis image nian vivon. Mi pensas, ke ĉiu devus fari tion. Antaŭaj konsideremaj interparoladoj premisas la sanan geedzecon. Gravas, ke ambaŭ plenkreskuloj klarigu por si, ĉu ili volas entute vivi en geedzeco, kaj se jes, kion ili atendas de ĝi. Kiu kiun funkcion havu en ĝi? Poste ili klopodu tiel direkti sian vivon, ke ili fakte observu ĉi tiun interkonsenton, aŭ – por la kontento de ambaŭ – ili ŝanĝu ĝin kune.

Mi ne opinias neevitebIe, ke geedzoj post kelkaj jaroj fremdiĝas unu de la alia, mi eĉ konfesas ĝuste la malon: kun la paso de la tempo ili povas ĉiam pli ami unu la alian. Al tio kontribuas la reciproka laboro farita por la partnero, vico da komunaj travivaĵoj, edukado de infanoj, bonaj kutimoj ktp. Kvazaŭ modiĝis nuntempe laŭeble plej frue tediĝi de la partnero, emfazi la malfavorajn flankojn de la geedzeco kaj la malavantaĝojn de reciproka



adaptiĝo. Mi opinias: oni ne troigu la erarojn, kaj oni serĉu ankaŭ tion, kio plaĉas en la partnero. Tio ne estas tro malfacila, ĉar la bona flanko de homoj estas ĝenerale pli forta ol la malbona.Elementa bezono de infanoj estas senti sin en sekureco, sed ili apenaŭ ricevas ĝin en familio, kie unu konflikto sekvas la alian. Oni provu mildigi kaj maloftigi kverelojn. Ĉe ni validas la principo, ke tagon oni fermu nur en amo kaj paco. Per tio mi nature ne volas diri, ke se la situacio tre malboniĝas, oni ne divorcu: eble oni faros bonon al la infanoj ĝuste per tio, ke oni interrompas la kunvivadon ŝarĝitan de konfliktoj.

– *La sukceso de geniedukado ja fariĝus dubinda en ambaŭ okazoj. Kia estas laŭ vi la sana familimodelo?*

– Mi pensas: du homoj interligiĝas per geedzeco, por ke la vivo de ambaŭ fariĝu pli kompleta (ankaŭ fake) kaj feliĉa. Aliflanke, por ke ili havu infanojn, se eblas, almenaŭ tri, al kiuj ili donu ĉion necesan, por ke ankaŭ ili fariĝu feliĉaj. Ni planis ses infanojn, sed la cirkonstancoj malhelpis nin. Oni ne konsideru la infanedukadon necesa malbono, iĝu ankaŭ ĝi ĝojo kaj kreado!

– *Sed ĝi estu ankaŭ faka laboro!*

– Ĝi povas esti ankaŭ faka laboro, sed prefere alvokiĝo aŭ ankaŭ alvokiĝo. Evidente, ne ĉiu povas forlasi sian laborpostenon kaj resti hejme por eduki la infanojn, sed estus dezirinde, ke unu el la gepatroj faru tion. Mi konsideras tute eble, ke ankaŭ viro restu hejme kaj eduku la infanojn. Unu punkto certas: ankaŭ en la edukado necesas multe pli kleraj gepatroj. Oni devus dediĉi pli da tempo al la infanoj. Mi proponas, ke la ŝtato organizu apud la geedziga konsilado ankaŭ „porgepatran konsiladon", eĉ infanedukajn kursojn por gepatroj.

– *Kiel vi opinias pri la malfermita geedzeco?*

– Mi ne estas ĝia adepto. Eĉ, mi opinias ĝin danĝera. Nature, teorie mi havas nenion kontraŭ ĝi, se oni povas solvi la normalan edukadon de la gefiloj. En tia okazo ambaŭ plenkreskuloj organizas sian vivon, kiel al ili plaĉas. Se ili povas aranĝi ĝin tiel, ke ĝi estu bona ankaŭ por la infanoj, tiam mi diras: konsentite! Se ne, tiam ĝi egalas al senrespondeco.

La danĝero kaŝiĝas en tio, ke la malfermita geedzeco ofte donas sportan karakteron al la homaj rilatoj, kaj la seksa vivo – laŭ mi – ne taŭgas por sportado. Se tiuj rilatoj estas sen emocioj, mi malaprobas ĝin pro tio, kaj se ĝi baziĝas sur amo, ĝi havas alian riskon, nome ke la sentoj de la du partneroj malvarmiĝas malsamtempe; unu ankoraŭ amas, dum la alia ne plu, kaj ĉi tiu emocia „vintriĝo" kaŭzas dolorojn al tiu, kiu ankoraŭ amas. Mi ne

kredas, ke iu ajn rajtas kaŭzi dolorojn, ofte tre akrajn dolorojn al sia partnero, kaj provoki per tio eventuale eĉ sinmortigon.

Sed ni parolu pri la kondiĉoj de faka edukado! Mi ne kredas, ke iu povas fari zorgan kaj eminentan laboron, se li ofte ŝanĝadas siajn partnerojn. Pensu pri scienculo, kiu matene sidiĝas en biblioteko, kaj restas tie eble ĝis vespero. Mi faris tion tre longe. Kiam mi hejmeniris, tie mi daŭrigis la laboron. Mi do demandas, kiel oni povas fari tion ĉe ŝanĝataj partneroj? Kaj, ĉefe, ne estas indiferente – ni reiru al la edukado –, ĉu mi amas la virinon, de kiu mi havas infanon, kaj ĉu ankaŭ ŝi amas min! Ne estas indiferente, ĉu ni amas kune la infanon. Fine, ne estas indiferente, kion la infano vidas el tio hejme.

– *Ĉu geniulo bezonas gefratojn?*

– Jes, bona frato aŭ fratino estas granda valoro, sed kiu fariĝas bona frat(in)o, dependas en decida grado de la gepatroj, de la edukado. Sed pli valoras bona amiko, ol malbona frato. Mi tre ĝojas, ke niaj infanoj estas bonaj fratinoj, bonaj amikinoj, bonaj koleginoj, kaj ke ili tre amas unu la alian. Ankaŭ tio estas afero de edukado: oni devas estigi sanan konkuradon inter ili, sed eduki ilin samtempe al reciproka helpemo. Multaj kredas, ke homaj kontaktoj pliboniĝas de si mem. Tamen oni devas ĉiam fari ion por tio, senĉese plibonigi, formi tiujn kontaktojn. Tio postulas multan energion, sed ĝi certe repagiĝas.

– *Oni diras: kiu havas tri infanojn, estas heroo inter la nunaj cirkonstancoj.*

– Mi ne akceptas tiun kvalifikon. Mi rimarkis, ke en multaj familioj, kiuj havas tri infanojn, ĝenerale la vivo fluas tre trankvile, la gepatroj estas pli ekvilibrigitaj kaj la infanoj disvolviĝas normale. Ili spertiĝis, ke ili povas ĉiam kalkuli unu je la alia.

– *Ĉu finance ne tro ŝarĝas tri infanoj?*

– Malfacile estas respondi al tio. Se la loĝejproblemo jam solviĝis, en familio kun meza financa nivelo tio ne tre ĝenas. Mi ekzemple neniam pelis min post la modo. Ankaŭ la infanojn mi edukis al tio, ke ili preferu purajn, sportecajn, simplajn vestaĵojn. Pri manĝado mi same ne tro zorgis. Oni devas ellerni racie mastrumi per la mono. Ankaŭ pri tio oni devas instrui la infanojn sendepende de tio, ĉu oni vivas riĉe aŭ male.

– *Ĉu siatempe vi preparis vin por la patra rolo?*

– Kompreneble. Antaŭ la geedziĝo. Antaŭ ol plani ĉi tiun eksperimenton, mi tralegis longan vicon da porpatraj faklibroj. Ankaŭ emocie mi devis agordi min al ĉi tiu „laboro”.



– *Kiomgrade gepatroj intervenu en la sorton de siaj infanoj? Ĉu ili influu la elekton de profesio, partnero kaj partio?*

– Ni komencu per la elekto de profesio. Mi parolos nur pri gepatroj, kiuj klopodas serioze glatigi la vivovojon por siaj gefiloj. Inter ili troviĝas du tipoj. Iuj diras, ke la infano estu multflanka, „gustumu” ĉion, kaj en plenkreskula aĝo aŭ proksime al ĝi li mem decidu, kio li fariĝos. Mi povas kompreni ankaŭ ĉi tiun starpunkton. Tamen se la gepatroj volas, ke la infano atingu geniulajn rezultojn, tiam – mi opinias – ne prokrasteblas la gepatra decido, kaj oni devas elekti jam en etinfana aĝo la vojon de lia specialiĝo.

– *Sed ĉu sufiĉas la scio kaj kapablo de la gepatroj, por ĝiskonduki la infanon sur la elektita vojo? Kio fariĝos, se pro ia tragika evento ili ne plu povos helpi?*

– Ni rigardu komence la unuan demandon. Ĉu gepatroj kapablas je la tasko aŭ ne? Mi kredas, ke se ili decidis kaj havas konvenan vidmanieron, emas legi ankaŭ iom da fakliteraturo kaj ne hontas peti helpon de aliuloj, ili nepre kapablas je tia laboro.

La alia afero: se malĝojiga hazardo intervenas. Tio povas okazi. Sed se io intervenas, eĉ tiam la koncernulo ne perdas multe pli, ol se li estus irinta alian vojon. Infano povas fariĝi bona faklaboristo, bona instruisto, bona ekonomikisto ktp., sen esti geniulo. Se oni edukas la infanon kun alia vidmaniero kaj per aliaj metodoj, ankaŭ tiam povas interveni tragika evento, ĉu ne?

Ambaŭ vojoj, la multflanka kaj la specialigita instruado povas krei sanajn, feliĉajn infanojn kaj bonan familian etoson. Sed ambaŭ sistemojn oni devas elekti konscie, kaj ankaŭ konstrui konscie. La libereco de edukado same apartenas al la fundamentaj homaj rajtoj, ĉu oni edukas laŭ mia, ĉu laŭ alia maniero.

– *Ni transiru al la elekto de vivpartnero. Kiun rolon havas ĉi tie la gepatroj?*

– En la historio konturiĝas eble du ekstremaj tendencoj. Unu ekstremon reprezentis, kiam gepatroj mem elektis vivkunulon por sia infano. La alia ekstremo, en kiun laŭ mia kredo ni jam transpendolis, sperteblas nun, kiam gepatroj estas jam preskaŭ tute ekskluditaj el la partnerelekto. Laŭ mi, idealus la kombino de la du tendencoj, ia mezlinio, ĉe kiu gravas ankaŭ la opinio de la gepatroj, do la infano aŭskultas ankaŭ ilian opinion. Tio gravas, ĉar prave supozeblas, ke gepatroj volas bonon al sia infano, krome ili estas pli spertaj, kaj ne blindiĝas pro sentoj (junula amo), sekve ili povas decidi kaj antaŭvidi pli objektive. Plue, se temas pri sana familio, tiam certagrade

rekte aŭ nerekte la generacioj vivos kune, kaj ili laboros kune, por eduki la sekvan generacion.

Tial mi opinias, ke bona decido fariĝas komune; kompreneble la finan vorton elparolu la gejunuloj.

– *Ĉu laŭ via koncepto la gepatroj rajtu vetoi?*

– Temas pri memstaraj plenkreskuloj, do vetoo ĉi tie ne devas ekzisti. Ĉi-rilate gepatroj havas hodiaŭ praktike nur 5–10-procentan „voĉon". Laŭ mi 40% pli idealus, kaj la gejunuloj povus ankoraŭ decidi 60%, do en fina konto elektus ili. En nia kazo 50 procentoj estis la gepatra instigo kaj 50 procentoj la propra decido. Mi tre ĝojas, ke mi obeis al mia patrino, ĉar mi havas mirindan geedzecon. Se mi estus edziniginta la virinon, kiun mi volis origine, verŝajne forvaporiĝus mia edukada eksperimento kaj feliĉa geedzeco.

– *Kiomgrade la familio povas influi la partioelekton de la infano, do la elformiĝon de mondvido, mondkoncepto, politika orientiĝo?*

– Mi ĉiam ridetas en mi, kiam oni diras: nun mi edukas la infanon kredanto (aŭ ateisto), kaj poste, en plenkreskula aĝo li mem decidu pri sia mondkoncepto. Decida estas ja tio, kiaj influoj atingas lin en la familio, kian ekzemplon li vidas, en kiu direkto oni edukas lin – ne nur fake, sed ankaŭ mondkoncepte. Mi konsideras afero tute natura, ke la gepatroj transdonas sian propran mondkoncepton: ĉar ne povas ja doni ion alian. Absurde do estas, se iu – estante religiulo – diras al sia infano: vi estu ateisto.

Mi samtempe kredas, ke en la infanaĝo oni devas transdoni la fundamentajn moralajn valorojn, el kiuj plej multaj estas ĝenerale homaj, do oni ne bezonas rilatigi ilin konkrete, en la tradicia senco, al iu mondkoncepto aŭ politika partio.

– *Kian rolon havu la familio, la gepatroj en la preparado de la infano por la sporta vivo?*

– La sporto estas unu el la plej bonaj edukaj rimedoj en la manoj de la gepatroj, ĉar ili apenaŭ devas aparte peni; en preskaŭ ĉiuj infanoj enestas ja la deziro movi sin, aktive konkuri. Samtempe la praktikado de sporto kutimigas al la observo de certaj reguloj, krome kontribuas al ĝusta konduto, regula vivmaniero kaj disciplino. Pluse tre utilas, se la familianoj kune sportas, se ili kune faras ion. Se la familio sportas, ĝi pasigas pli da tempo kune, kaj tio senkompare bonefikas. Sed se tio tamen ne realigeblas, la infano vizitu klubon, kaj trejnu sin ĉiutage unu-du horojn eĉ, se li ne volas fariĝi sportisto. Sed se li volas fariĝi konkuristo, tiam evidentas, ke la gepatroj kaj la trejnisto havas siajn planojn, kaj tiujn ili devas sekvi.



– *En Hungario oni akceptas ankoraŭ kun rezervoj (ne nur ĉe la ŝako, sed ankaŭ aliloke) eksperimentojn, en kiuj la gepatroj estas parte aŭ tute trejnistoj de siaj infanoj. Jen estas la familioj Bátorfi (tabloteniso), Temesvári (teniso) kaj Mizsér (pentatlono). Sed vi estis la unuaj, ĉe kiuj la memstara familia „entreprenado" ekfunkciis.*

– Ĉi tiun entreprenadon la oficialaj institucioj tiam tute malaprobis, kaj eĉ nun ili ne aprecas ĝin laŭmerite. Stranga estas ankaŭ la sinteno de la gazetaro. Kiam la Ĉefurba Konsilantaro donacis al mia edzino kaj al mi la memormedalon „Por la Sporto de Budapeŝto", iu „kompetenta" ĵurnalisto indigne pikadis per la demagogiaĵo, ke ĝin meritus ankaŭ aliaj gepatroj, ĉar ankaŭ aliaj gepatroj zorgas pri siaj infanoj. Pri ĉi-lasta punkto li nepre pravas. Sed li forgesis aldoni, ke ni diferencas de aliaj gepatroj per tio, ke ni, forlasinte nian postenon, tra longaj jaroj per 15-hora laboro ĉiutage – rekte aŭ nerekte – penegis por la ŝakterena evoluo de niaj filinoj. Ni aĉetis nek somerdomon, nek aŭton, nek similaĵojn, nur ŝakbibliotekon kaj pagis trejnistojn. Okazis, ke dum du tagoj ni dormis nur kelkajn horojn, ĉar ni preparis kolekton el 200 mil partioj por niaj infanoj. La fakliteraturon ni studadis nokte. La eblon por la disvolviĝo de niaj filinoj ni devis elbatali same laŭ neordinara maniero. Ĉi tiu artikolo aperis komence de februaro 1989 en la ĵurnalo *Esti Hirlap*. Mi ne nomas la ĵurnaliston, ĉar mi konsentas kun la verkisto *Goda* Gábor: „Diskuti signifas levi la alian – malgraŭ la diferenceco de la vidpunktoj – al certa spirita rango. Pro tio bone rigardu, kun kiu vi komencas diskuton, por ne levi aron da senmerituloj al spirita rango!"

– *La gazetaro kaj la sportgvidantoj ne ŝatas ankaŭ, ke gepatroj sekvas kun aparta zorgemo la sportkarieron de siaj infanoj. Ironie ili nomas tiajn „hoke-panjo", „tenis-paĉjo". Parto de la amaskomunikiloj eĉ nun malestime traktas tiajn gepatrojn.*

– Tia konduto damaĝas, ĉar ĝi ŝancelas la fidon de la infano al la gepatroj. Estas ja facile malcertigi infanojn. Aliflanke tia kruda influado povas veki familiajn konfliktojn, kiujn oni povus „ŝpari". Mi estas ankaŭ ĉi-rilate por la familio. Oni devas gardi, ŝirmi la pacon kaj respekton de la familio.

– *Alia demando: kiu portas la ĉapelon en via familio?*

– Ĝenerale mia edzino faras la hejmajn laborojn, sed kiam ŝi akompanas iun filinon eksterlanden – kaj tio ofte okazas –,zorgas mi pri la dommastrumo. Sed dum nia geedzeco ankaŭ ŝi povis klerigi sin, ŝi lernis lingvojn (ŝi parolas 7 aŭ 8), akiris tri diplomojn, vojaĝis tra la tuta mondo, dume praktikis la lingvojn, kolektis multege da konoj, vidis multon belan en

la naturo, arkitekturo, muzeoj, do ŝia vivo estis kompleta, malgraŭ tio, ke samtempe ŝi plenumis ankaŭ „virinajn" taskojn.

Krome ŝi partoprenas en pedagogia eksperimento, en kiu ankaŭ ŝi kreee kunlaboras, ĉar kion ni faras, estas etgrupa, komuna pedagogia eksperimento. Mi volis farigi la hejmajn laborojn aŭ ties parton per iu alia, se niaj materialaj cirkonstancoj ebligus tion, ĉar tiel ŝi povus pli bone dediĉi sin al sia fako, profesio, sed dum nia komuna laboro por la disvolvado de la kapabloj de niaj filinoj ŝi venis praktike en iom fakte malavantaĝan situacion. Sed mia familimodelo estus kontraŭa al miaj principoj, se ŝi zorgus nur pri la dommastrumo aŭ pri la nekrea parto de la infanedukado.

– *El la tono de via argumentado mi sentas, ke vi havas konsciencriproĉon.*

– Ankaŭ mi mem konfesas la klarigon el la antikva juda literaturo, laŭ kiu la ordonon de la Sankta Skribo „Amu vian proksimulon, kiel vin mem!", ne validas por via patro, via patrino, viaj gefiloj kaj via edzino: ilin vi devas ami pli, ol vin mem. Mi konfesas sincere, ke mi havas iom da konsciencriproĉo, sed mi ne akceptas tiun opinion, ke mi realigas ortodoksan familimodelon.

– *Kiel opinias pri tio via edzino?*

– Mi pensas, ke nia rezulto estas produkto de nia komuna agado. Sed demandu prefere ŝin!



## Ekzemplo de sinjorino Polgár Klára: Fadeno iras, kien kudrilo ĝin tiras

– *Jam plurajn tagojn mi pasigis ĉe vi, sinjorino Polgár, kaj mi vidas, ke la tutan tagon vi silente fervoradas-laboradas. La loĝejo brilas en ordo, la tagmanĝo pretiĝas ĝustatempe, kaj kun pura konscienco mi asertas, ke ĝi bongustas. Ĉu tia laboro destiniĝis al vi?*

– –Jes kaj ne. En la centro de mia vivo, kiel ankaŭ de la familio, staras la ŝako. Mi faras ĉion, kio kontribuas al la prepariĝo de la filinoj. Ĉirkaŭ ili turniĝadas la mondo, kaj mi kredas, ke mi havas la taskon esti faktoro. Se necesas lernolibroj, mi alportas ilin, se necesas tradukoj, mi faras ilin; mi korespondas kun eksterlandanoj, se necesas, mi veturas kun la filinoj, iufoje mi donas intervjuojn, alifoje mi purigas la loĝejon. Mi preparas la tagmanĝon kaj lavas la vestaĵojn. Do mi kredas, ke mi havas tiel vastan „repertuaron", ke en fina konto mi ne enuas. Se nur la hejmaj laboroj restus por mi, mi verŝajne trovus ilin enuigaj.

– *Se mi komparus vian familion kun granda arbo, via edzo estus la radikoj kaj la dika parto de la trunko kaj vi la triiĝanta trunkosupro, kiu kuntenas, kunligas la tri brilajn, sanajn infanbranĉojn kun la trunko. Ĉu mi bone vidas tion?*

– La inicianto de grandaj ideoj estas László, sed mi ĉiam partoprenas en la realigo. Por ke la filinoj atingu sukcesojn, necesas la senlaca laboro de ni ambaŭ. Sed anstataŭ la komparo pri la trunko kaj radikoj mi preferus diri la proverbon: „Fadeno iras, kien kudrilo ĝin tiras." La fadeno estas mi. Li elpensas la aferojn, kaj mi provas realigi en la praktiko, kion mi kapablas.

– *Se vi volas, konsideru mian sekvan demandon provoko. Vi partoprenas eksperimenton, unu el kies celoj estas pruvi, ke inter viroj kaj virinoj estas egaleco, almenaŭ koncerne la intelekton. En via familio – kiel vi diris – unu plenumas la funkcion de kudrilo kaj la alia tiun de fadeno, sekve tamen ekzistas diferenco inter viro kaj virino.*

– Okaza vizitanto eble inklinas kredi, ke ĉe ni la fizika laboro apartiĝas de la mensa, kaj ke la mensa laboro apartenas al László, ĉio cetera al mi. Sed fakte la afero aspektas alie, ĉar tre ofte mi veturas al ŝakkonkursoj kun Zsuzsa, Judit aŭ Zsófia, kaj tiam László) restas ĉe la fajrujo, do li faras ĉiujn hejmajn taskojn. Sed kompreneble ankaŭ ĉe ni ekzistas certagrada „diskriminacio", kiel bedaŭrinde en preskaŭ ĉiu familio. Ankoraŭ foras la tempo, kiam tia diskriminacio tute ĉesos. Ideoj kompreneble ĉiam diverĝas de realaĵoj, ĉar ĉi-lastaj dependas ankaŭ de la donitaj kondiĉoj, kaj la kondiĉoj ankoraŭ ne ebligas la plenan realigon de la ideoj.

– *Ĉu vi kune planis vian pedagogian programon?*

– Ĝi estis fakte la revo de László. Kiam mi renkontiĝis kun li unuafoje, en 1965 en Budapeŝto, mi nur aŭskultis, aŭskultadis lin. Kelkfoje mi havis la senton, ke li estas fantaziulo, kiu plenas de ideoj, kies eĉ duonon oni ne povas kredi. Mi hejmeniris kun la penso, ke mi konatiĝis kun tre interesa homo, sed mi ne kredis, ke mi iam povus iĝi lia edzino.

Poste ni multe korespondis. Estas domaĝe, ke ĉi tiuj leteroj ne konserviĝis, ĉar ni sendis unu al la alia mirindajn leterojn. Komence temis ne tiom pri amo; ni interŝanĝis opiniojn pri pedagogiaj ideoj.

– *Ĉu vi memoras pri io, kion vi ne kredis al li?*

– Mi ne kredis, ke en 24 horoj povas eniĝi tiom da aferoj, kiom li – laŭ lia aserto – enŝtopas... Kie komenci? Li rakontis, ke li okupiĝas pri psikologio, pedagogio, filozofio, arto, lin interesas ankaŭ matematiko, krome li edukas, instruas, partoprenas la junularan movadon, vizitas bibliotekon, naĝejon ktp. Li listigis tiom da aferoj, ke mi ne kredis al li. La tempo pasis kaj ni korespondadis...

– *Kaj liaj pedagogiaj konceptoj?*

– Komence mi dubis, ĉu oni povas tiel frue komenci la seriozan laboron pri infano. Zsuzsa estis tri- kaj duonjara, kiam li komencis ĉe ŝi la specialigon.

– *Pri kio vi unue pensis, kiam vi komencis la eksperimenton?*

– Ni sciis, ke ion grandan ni volas manifestigi en la infanoj, sed unue ne estis tute klare, kiun fakterenon ni elektos. Zsuzsa tre bone progresis en matematiko. La materialon de la unuaj kvar klasoj ŝi tralernis jam en kvarjara aĝo. Tiam ŝi hazarde ekvidis ie ŝakfigurojn, kio montriĝis poste „feliĉa hazardo". Ŝi trovis ŝakgarnituron en tirkesto, kaj komencis ludadi per ĝi. Tiutempe László ofte estis kun ŝi, kaj iun belan tagon, veninte el laboro, mi vidis, ke ili ŝakludas. Mi tre surpriziĝis.

– *Do la eko estis hazardo. Ĉu ne laŭplana elekto?*

– Propradire ne estis planite, ke la infano fariĝu ŝakisto. Zsuzsa ellernis unue la rusan en la rusa infanĝardeno, sekve la germanan, poste sekvis la ŝako, kiu estis por ŝi nova ludo, kaj kiun ŝi verŝajne trovis tre interesa.

– *Ĉu László scipovis ŝakludi?*

– Li scipovis kaj ankaŭ tre ŝatis; mi memoras, ke iufoje li petis min ludi kun li, sed mi eĉ la movojn ne konis. Mi diris, ke ĝi estas por mi tre enuiga, kaj ne interesas min. Bedaŭrinde, tio estis vero; sed kiam Zsuzsa komencis ŝakludi, mi jam hontis, ke infano kapablas ellerni tion, kaj mi ankoraŭ ne scipovas ludi.

– *Krom ĉi tiu hazardo kio motivis, ke vi restis ĉe la ŝako?*



– Ni povintus elekti ion alian; ni povintus daŭrigi la matematikon aŭ la fremdajn lingvojn, tamen ni decidis por la ŝako – laŭ mi tial, ĉar ni sentis, ke Zsuzsa estas tre feliĉa ĉe la ŝaktabulo. Krome ankaŭ pro tio, ke venis la unuaj sukcesoj, kaj ni pensis: se iu gajnas sur 64 kvadratetoj, tio estas jam pruvo. Kvankam la geavoj kaj najbaroj ofte balancis la kapon: knabino ĉe ŝaktabulo? Kia afero?!

– *Do multaj trovis la elekton stranga. Evidente ankaŭ tio ne estas hazardo, ke laŭ la publika opinio tia aktiveco faras la vivon de infanoj senĝoja, malfeliĉa. Ĉu vi jam aŭdis tiajn opiniojn?*

– Bedaŭrinde ni devis alfronti tion. Estas vero, ke la ŝako fakte ne estas tradicia infanludo. La homoj ne aŭdis ion tian, ke knabino ŝakludas, ĉar oni opiniis ĝin sporto por knaboj. Multaj demandis min: Kia patrino vi estas? Kial vi lasas, ke via edzo ŝakludu kun Zsuzsa? Mi mem devis batali kun mi, kaj devis rekonsideri, ĉu mi faras tion bone kaj ĝuste, se mi konsentas. Sed rerigardante en la pasinton mi nun jam kredas, ke mia patrina „grandeco" konsistis ĝuste en tio, ke mi cedis iri tiun ĉi vojon.

– *Vi plej kompetentas respondi: Ĉu la infanoj estas enfermitaj en si mem, forturnitaj de la mondo, aŭ ili vivas vere feliĉe?*

– Mi kredas, ke miaj filinoj vivas almenaŭ tiel feliĉe, kiel iu ajn samaĝulino ilia. Sed mi riskas aserti, ke eĉ pli feliĉe. Mi opinias, ke ili estas ekvilibrigitaj, kaj havas tre riĉan animan vivon. Multaj dubas, ĉu ili havis kaj havas veran infanaĝon. Mi sentas, ke ili havas ne nur veran infanaĝon, sed samtempe tian, kiu preparas ilin por la tuta vivo, kaj fundamentas ilian feliĉon. Homo vere feliĉas tiam, se li faras tion, per kio li volonte okupiĝas. Ili trovis sin mem,
kaj estas pro tio ankaŭ respektataj. Ili faras ja ekde etinfanaĝo aferon, kiu intimas al ili, pri kiu ili estas memcertaj, kaj kiun farante, ili sentas sin bone.

– *Ĉu estis tia metodo dum la edukado de la filinoj, kiun vi intertempe forĵetis aŭ modifis, ŝanĝis?*

– Mi ne dirus la tutan veron, se mi asertus, ke ni edukis ĉiujn tri sammaniere. Sed da klopodoj, amo, prizorgo, kondiĉoj ni donis al ĉiu samtiom, ni ja amas ilin samforte. Kompreneble la cirkonstancoj diferencis ĉe Zsuzsa, Zsófi kaj Judit. Da lingvoj mi donis maksimumon al Zsuzsa. Bedaŭrinde ĉe Zsófi mi faris eraron. Ŝi ne estis sufiĉe diligenta, kaj eble ankaŭ pro tempomanko forrestadis lingvolecionoj, kvankam kaj Zsófi, kaj Judit ellernis la anglan kaj la rusan kaj bazgrade Esperanton.

– *Kiom da lingvoj vi parolas?*

– Mi alproprigis 7–8 lingvojn: mi estas instruisto de la rusa, germana kaj Esperanto, krome mi regas la anglan, ukrainan, mi konas iom la bulgaran kaj ankaŭ la hispanan.

– *Ĉu la infanoj estas sanaj?*

– Bonŝance, jes. Krom malvarmumo (kaj iam otito ĉe Zsuzsa) ili neniam malsanis.

– *Ĉu vi havas aŭ havis idealon pri familio? Ĉu vi sukcesis realigi ĝin?*

– Mi ĉiam volis vivi belan, trankvilan familian vivon, kaj ke el miaj infanoj fariĝu bonaj, honestaj homoj, kiuj atingas altajn ŝtupojn. Mi kredas, ke ni efektivigis tion. Kiel patrino kaj edzino mi estas tre feliĉa, ekvilibrigita. Mi pensas: se amo kaj respekto reciprokaj regas en familio, oni do havas tion, kio plej gravas.

– *Kiel vi opinias pri la malfermita geedzeco?*

– Mi kondamnas ĝin. Ĉi-rilate mi estas konservativa, mi insistas pri la tradicia rolo de la familio. En la nuna agitata mondo ĉi tiu malgranda komunumo restis eble la sola rifuĝejo, kie oni povas senti sin vere bone, kie oni komplete liberiĝas. Mi sentas, ke ankaŭ mi ege bezonas ĝin.

– *Ĉu vi edukas la filinojn en religia spirito?*

– Ne, tute ne.

– *Ĉu ankaŭ vi ne estas religia?*

– Ne. Miaj gepatroj same ne estis, kaj ankaŭ mi tiel edukiĝis. Mi ne bezonas religion.

– *Ĉu vi instruis viajn filinojn pri la t.n. virinaj roloj, ĉu ili scipovas ekzemple kuiri tiel bone, kiel vi?*

– Se ili kapablas solvi eksterordinare seriozajn ŝakproblemojn, kiuj postulas multegon da energio, inventemo, lerteco, kial ili ne povus ellerni ankaŭ kuiri, se necesos? Ili certe ellernos, sed ĉi-momente mi ne lacigas ilin per tia laboro. Mi same ne scipovis kuiri, kiam mi edziniĝis.

– *Kiujn planojn, ambiciojn vi havas?*

– Ĉu plano, revo? Kion ni komencis, mi volus daŭrigi tiel, ke la filinoj atingu pli altajn ŝtupojn, kaj mia laboro certe kontribuos al tio. Kiel patrino kompreneble mi deziras, ke ili edziniĝu, nasku gefilojn, mi fariĝu feliĉa avino, kaj kiel pensiulo mi ĝuu la fruktojn de mia laboro.

– *Vi volis eduki geniulojn. Ĉu la knabinoj fakte fariĝis tio? Ĉu vi opinias ankaŭ vian edzon geniulo?*

– – Mi opinias lin la plej granda geniulo. En la familio ne mankas geniuloj, sed li estas plej vere tio. Lia estis ja la ideo, kiun ni realigis. Kiam mi unuafoje diris al ĵurnalisto, ke li estas geniulo, tiu miris kaj ne kredis



min. Tio, ke la filinoj fariĝis tiaj, ŝuldiĝas al tre serioza, streĉita, ekvilibrigita, konsekvenca laboro, kiu efektiviĝis kaj efektiviĝas sub lia gvido.

Cetere tiurilate Klara *Kasparova* (la patrino de la mondĉampiono) deklaris jenon: „...Sen kunpremi la dentojn, sen videbla kaj daŭra penado ne eblas atingi la finan celon. Por ni la nocio „trankvilo" ne ekzistis. Ekde la 9-jara aĝo [de Garri] eĉ tago ne pasis sen serioza, laŭplana laboro. Ni konstante laboris. Ege malfacilis atingi la pinton." (El la verko de Reinhart Münzert: *Die Familie Polgár und ihre Bedeutung für die Anlage-Umwelt-Kontroverse-Deutsche Schachblätter.* 1989, p. 32-35.)

– *Kia vi vidas vin mem?*

– Mi kredas, ke mi estas adaptiĝema tipo. Mi adaptiĝas al ĉi tiu granda ideo. Mi submetis min al la ŝako, kaj ĉi tiu adaptiĝo estis mia „genieco".

– *Kaj se László establus lernejon, por eduki elstare kapablajn infanojn?*

– Ankaŭ mi prenus parton el la laboro. Mi instruus lingvojn, kaj klopodus helpi en ĉio, por ke la lernejo bone funkciu.

## 2. EN MINORITATECO

„La lernado estas juda sporto."

Dirajo

„Kion lernas judo plej facile de nejudo?
La manieron, kiel malami kaj persekuti judojn."

Talmudo

„Mi ne povas esti ĝisosta judo; des malpli mi povas tute ne esti judo."

G. E. *Lessing*

– *Ŝajnas al mi, ke via judeco estas alia kaj pli ol simpla ligiĝo al iu komunumo. Ĝi estas samtempe grava fonto de via pedagogia koncepto. Ĉu mi opinias ĝuste?*

– Jes. La konscio pri mia identeco kroĉas min ekde naskiĝo sendube al la juda komunumo; unuavice en tiu senco mi ligiĝas al la judaro. Unu el la kapilaroj de mia pedagogia sistemo originas nekontesteble tie, sed la analizo de mia ekzistosituacio malkaŝas ankaŭ filozofiajn rilatojn.

Estas ĝenerale konate, kiel elstarajn rezultojn atingis judoj sur la kampo de mensaj aktivadoj. Teorie stariĝas la demando: ĉu tio havas genetikajn-biologiajn kaŭzojn, aŭ fontas el socia determiniteco?

– *La fakto, ke hodiaŭ naskita bebo, estante judo, havas multe pli grandan ŝancon, laŭ la statistiko de Nobel-premiitoj, por ĉi tiu premio, ol se li naskiĝus en nejuda familio. Ŝajnas por multaj genetika determiniteco.*

– Mi havas tute alian opinion. Mi konkludis, ke la socia „transherediĝo" kaj la reagoj al la propra judeco sekvigas tiun ĉi fenomenon. Mi akceptas – tio ja estas fakto –, kion ankaŭ *Czeizel* Endre menciis en la Hungara Radio (1989-05-23), ke la proporcio de judoj inter la Nobel-premiitoj estas 30%..., kaj se iu naskiĝas judo, li havas centoble pli grandan ŝancon je Nobel-premio ol averaĝa nejudo. Ankaŭ la plejparto de la hungaraj Nobel-premiitoj estis judoj. Inter la ŝakmondĉampionoj ilia proporcio atingas – laŭ mia scio – pli ol 50%: *Lasker, Steinitz, Tal, Botvinnik, Smislov, Kasparov* kaj *Fischer* estas duonjudoj. Tamen mi asertas: ankaŭ ĉi tie temas pri socia determiniteco.

– *Pli precize?*



– Por mencii kelkajn faktorojn: La unua esenca punkto estas, ke juda familio – parte pro la fortaj tradicioj – estas relative stabila, kaj ĝi ĉiam multe zorgis pri edukado. Alia kaŭzo doniĝas el la minoritateco de la judoj kaj el la oftaj persekutoj dum ilia historio. Kiel tiuj faktoroj kontribuis al la mensa evoluo? De negativa flanko tiamaniere, ke pro la ĉiama malavantaĝa situacio de la judoj ili devis montriĝi en preskaŭ ĉio duoble pli kapablaj ol ceteruloj. Pro la oftaj persekutoj ili sciis, ke iam ajn povos okazi, ke ili devos forlasi siajn domon, loĝlokon, eĉ patrujon kaj komenci vivon aliloke. Do kio fiksiĝis kiel juda tradicio? „Filo mia, lernu, ĉar *(1)* nur tiel vi povos sukcesi en la vivo, *(2)* se vi devos fuĝi, la scion neniu povos forpreni de vi, do vi povos ĝin kunporti ien ajn." Sian domon judo ne povis porti kun si, tial li kutime preferis aĉeti ne domon kaj nemoveblaĵojn, sed oron kaj diamanton kaj bagatelaĵojn, por ke dum persekutoj li povu enpoŝigi ilin kaj forkuri. Kaj lia scio ĉie kreskigis fruktojn.

Aliflanke, judoj ĉiam estas periferiuloj, kaj tio vekas en ili streĉojn, ili fariĝas „eternaj adoleskantoj". Adoleskantoj ne scias, ĉu ili estas infanoj aŭ plenkreskuloj, kaj de tie originas ilia malcerteco. Plej ofte judoj same ne scias, kiomgrade ili estas – ekzemple – hungaroj, kiom judoj, kaj kiom ambaŭ. Ĉi tiun situacion ili malfacile povas klarigi al si. Pro tio ili konstante vivas kun interna konflikto. Tio formas ilin mense malfermita, problemsentema, aliflanke disvolvas ilian adaptiĝemon. (Tio povas sekvigi ankaŭ certajn negativajn ecojn, ekzemple trosentemon, laŭtecon, agresemon, ekstremismon, kritikemon kontraŭ si kaj aliaj, tre fortan ambicion al plenumoj, tropelitan aktivecon ktp.)

– *Ĉu tiuj trajtoj ne fiksiĝis dum la historio, ĉu ili ne fariĝis heredaj?*

– Ne. La psikaj kapabloj, akiritaj ecoj de la homo ne herediĝas. Mi akceptas kompreneble, ke certaj malsanoj pli oftas ĉe tiuj aŭ aliaj popoloj. Sed ankaŭ la kaŭzoj de malsanoj serĉendas unuavice en la vivcirkonstancoj kaj vivmaniero. Tial ekzistas ekz. tipaj judaj malsanoj. Sed la psikaj ecoj estas unusence socie determinitaj.

– *Do laŭ vi, koncerne intelektajn donitaĵojn kaj moralajn ecojn ĉiuj popoloj potenciale egalas?*

– Ĉe naskiĝo ĉiuj homoj egalas. Post naskiĝo homoj alprenas la t.n. gentopsikologiajn karakterizaĵojn, adaptiĝante al la kulturaj tradicioj kaj edukadaj postuloj. Tio kaŭzas, ke dum la historio la t.n. judecaj ecoj ŝanĝiĝadas. Longe oni misakuzis judojn, ke ili ne kapablas je krea fizika laboro, kaj ke ili ĉiam malkuraĝas, kio, eĉ se parte veris, sekvis el la edukado kaj trudo de la medio. Sed hodiaŭ oni ne povas trovi ĉi tiujn ecojn ĉe la judoj vivantaj en Israelo aŭ aliloke. Hodiaŭ la soldatoj de la israela

armeo estas la plej bonaj armiluzantoj de la mondo; *Mossad* estas unu el la plej efikaj sekretaj servoj de la mondo. La judaj setlistoj surprizis la mondon ankaŭ per siaj oazoj elkreskantaj el la dezerto de la Sankta Tero. Do hodiaŭ ne plu validas, ke ili okupiĝas nur pri mensa laboro.

– *Kio karakterizas la judajn pedagogiajn tradiciojn?*

– La juda religio preskribas por la gepatroj instrui siajn gefilojn ekde frua infanaĝo. La Talmudo preskribas, ke la gepatroj estu la unuaj instruantoj de la infano, ĉar ĉi tiu emocie proksimas al ili kaj amas ilin. Gravas, ke la infano sentu, kion la gepatroj atendas de li; tio forte influas la nivelon de liaj bezonoj, kaj poste ankaŭ tiun de liaj plenumoj. En juda familio oni edukas la infanojn al sciamo, ŝato de libroj kaj reciproka respekto. Oni ne domaĝas materialajn oferojn por la disvolvado de la kapabloj de la infano. Oni kuraĝas frue ŝarĝi lin kaj instrui lin en intensa formo.

– *Kiomgrade kontribuis via judeco al la disvolvado de via sistemo? Ĉu vi konsideris la taskojn preskribitajn en la juda literaturo kiel personajn devojn, kaj pro tio vi instruis viajn filinojn?*

– Verŝajne ne. Mi akceptis tiujn preskribojn, ĉar mi trovis ilin bone fundamentitaj kaj raciaj. Kompreneble mia familio havis ion komunan kun mia sistemo, ĉar miaj gepatroj multe okupiĝis pri mi jam en la infanĝardena aĝo. Ili instruis kaj instruigis al mi multon, ekz. traduki el la hebrea en la hungaran kaj similaĵojn. Jam mia praavo estis pedagogo kaj instruis lingvojn en sia lernejo en intensa formo al 4–5-jaraj infanoj. Ĉiuj liaj instruatoj fariĝis elstare talentaj homoj. Ekzemple la mondfama verkisto, poeto kaj tradukisto *Patai* József frekventis lian lernejon. En iu lia verko li rememoras mian praavon kun agrablaj sentoj.

– *Kion signifas la judeco por via familio? Ĉu religion, kulturon, identecon, genton, pedagogion?*

– Pedagogion nepre, tio certas. En pli larĝa senco mi akceptas mian judecon kiel gentanecon, same kiel mian hungarecon. Kompreneble efikis sur min kaj la bona hungara kulturo, kaj la bona juda kulturo, kiel ĝenerale ankaŭ la bona eŭropa.

Judo sentas sur la propra haŭto, kion signifas, se oni kondutas al li kiel naciisto, ŝovinisto. Tial judoj klopodas forigi ĉiajn antaŭjuĝojn, kaj reprezentas tuthoman samrajtecon, egalecon. Ne komprenante tion, oni akuzas ilin tre ofte pri kosmopolitismo.

– *Ĉu pri mondcivitaneco?*

– Mi konfesas sincere, ke mi eĉ ĝin akceptas. Kvankam mi estas judo kaj hungaro, praktike mi respektas en la homo unuavice la humanajn



valorojn kaj ne la naciecon. Mi akceptas ankaŭ la mondcivitanecon. Mi konsideras Hungarion kaj la Teron mia patrujo. Mi same diras kiel *Bartók* Béla: Ni devas alproprigi nur bonan kaj valoran kulturon, apartenu ĝi al iu ajn nacio...

– *Kio ligas vin ankoraŭ al la judaro?*

– Tio, ke 600 mil hungaraj kaj 6 milionoj da eŭropaj judoj estis ekstermitaj dum la dua mondmilito, do mi volas esti ankaŭ vivanta monumento. Kaj ankoraŭ unu afero: mi estas judo ne nur pro tio, ĉar mi akceptas tion; mi estus judo ankaŭ tiam, se mi ne akceptus tion, ĉar la fakto, ke aliuloj konsideras min judo, neeviteble determinas mian situacion.

– *Kion signifas la judeco en via vivo el mondkoncepta-religia vidpunkto?*

– Mi naskiĝis en religia juda familio. Mia patro ankaŭ nun estas kredanta judo. Post la divorco de miaj gepatroj mia adopta patro estis la ĉefrabeno de la urbo *Gyöngyös* kaj talmudinstruisto de rabena seminario. Proksimume ĝis mia 13-jara aĝo mi estis tre religia, jam 12–13-jara mi celebris junularajn diservojn. Plurajn infanojn mi preparis al la „bar-micvo", la inica ceremonio de viriĝo-plenkreskiĝo. Sed en la aĝo de 14 jaroj mi renkontiĝis kun instruisto de biologio kaj fiziologio, kiu direktis min al la materiismo. Unuavice tio kondukis min al tio, ke mi volis liberiĝi el la juda gimnazio kaj juda orfejo, kaj ke nun mi jam estas ateisto.

Por judo ekzistas du ebloj: asimiliĝo aŭ integriĝo. Tiam mi driviĝis unusence al asimiliĝo. Mi sentis tiel, ke mi havas preskaŭ nenion komunan kun la judaro. Mi kreskis unuavice en la hungara kulturo, kaj mi kredis, ke mi kapablos asimiliĝi. Sed la spertoj sufiĉe frue konsciigis min, ke la hungara antisemitismo (pli precize: ne la hungara antisemitismo ĝenerale, sed tiu de iuj hungaroj) ne ebligos tion. 23-jara mi konsciiĝis, ke la vojo de asimiliĝo praktike ne ireblas. Pro la neakceptemo fare de la socio. Pro la definitiva kondamniteco al judeco fare de nejudoj. Nun mi jam opinias, ke la tasko estas integriĝi. Integriĝi, alivorte tiel konformiĝi, ke ni malkaŝe akceptu nian judecon.

– *Ĉu vi jam havis malagrablaĵojn pro via judeco? Ĉu vi renkontiĝis nuntempe kun antisemitismo?*

– Mi havis tre multajn malagrablaĵojn kaj en la infanaĝo (miaj gepatroj same), kaj kiel plenkreskulo, eĉ nun mi havas abunde. Ni ofte ricevas fiumantajn, malamegajn leterojn kaj telefonvokojn, kiel ekz.: „Malaperu de tie ĉi, via loko estas *en Auschwitz*" k.s.

– *En kio vi vidas la kaŭzon de la ankaŭ nun vivanta kaj laŭta antisemitismo?*

En Hungario ĉiam ekzistis antisemitismo, sed nun, parte pro la streĉoj akumuliĝintaj dum la diktaturo, parte pro la ekonomiaj malfacilaĵoj ĝia voĉo plilaŭtiĝis. En malfavora ekonomia situacio homoj kutime serĉas propekan kapron, kaj ili trovas ĝin plej ofte en judoj.Krome, la homoj vidas, ke kelkaj judoj riĉiĝas spirite kaj materiale, kaj tio elvokas plusan malamon.

– *Kio fareblas kontraŭ la antisemitismo?*

– La antisemitismo timas nur kontraŭstaron. Nur organizite kaj nur organizaĵoj povas kontraŭbatali ĝin. Mi neniam komprenis tiujn judojn, kiuj hontis pro sia judeco, kaj aliflanke estis memmalamaj aŭ damaĝis aliajn judojn, por pruvi antaŭ sia medio, ke ili havas nenion komunan kun tiu ĉi afero. Se iu batas aliulon, kaj ĉi tiu ne rebatas, tiam tiu poste regule, eĉ pro nura plezuro vangofrapados lin. Sed se ĉi tiu rebatas, la alia sekvafoje pripensos, ĉu li vangofrapu.

Mia firma konvinkiĝo estas, ke nur grupoj, organizaĵoj (inter ili ankaŭ judaj organizaĵoj) povas sukcese batali kontraŭ la antisemitismo, kaj tial mi trovas tre salutinda la fondiĝon de demokrataj judaj societoj en Hungario. Krome psikologie bonefikas, ke en ĉi tiuj organizaĵoj la judoj povas vivi kaj fakte vivas grupovivon, ĉar tio certagrade „filtras", malakrigas la antisemitismon. Estas avantaĝe, se grupo retenas la malfavorajn efikojn, kaj ne individuo devas sola trasuferi ilin. Tiel mildiĝas la streso, la samsortaneco donas forton, instigon, subtenon. Necesas judaj organizaĵoj, kiuj prenas sur sin kun respondeco la lukton kontraŭ la antisemitismo. Sen tio kiel ni atendu, ke nejudaj organizaĵoj kaj iliaj membroj luktu kontraŭ ĝi?

Kompreneble, oni ne troigu la antisemitismon, sed laŭ mi estus same erare bagateligi ĝin. Ni pensu pri tio, ke bedaŭrinde judoj marŝis ankaŭ al *Auschwitz* tiel, ke ili subtaksis la gravecon de sia fortrenado, kredante, ke ili nur penados en labortendaroj, dum la milito daŭros...

– *Ĉu laŭ vi eblas lukti kontraŭ antaŭjuĝoj per informado?*

– Per nura informado, argumentado ne eblas sukcese lukti kontraŭ la antisemitismo kaj antaŭjuĝoj. Tamen: oni devas paroli pri ili ofte, malkaŝe kaj honeste. Se krom argumentoj ankaŭ la diversaj bonintencaj sociaj efikoj plifortiĝos, tiam, atendeble, la antisemitismo retiriĝos. Necesas por tio longa tempo kaj pacienca, persista laboro. Rigardante la tutan mondon, mi estas optimisto ankaŭ en ĉi tiu demando.



## 3. ĈEFATESTANTOJ DE LA GENIEDUKADO: LA FELIĈAJ INFANOJ

„La homo estas feliĉa, se li laboras kaj kapablas ami."

S. *Freud*

„Ne ekzistas tiel modesta feliĉo, kiu povus eviti la dentojn de malico."

V. *Maximus*

„La homo vivas por esti feliĉa kaj transdoni ĉi tiun feliĉon al aliuloj."

A.V. *Lunaĉarskij*

– *Mi spertis, ke ĉiutagulo malcertiĝas, se vi diras al li: „Ankaŭ vi povas eduki geniulon." Li observas de fore, sed ĝenerale ne allasas proksime la penson, kiun li trovas bizara. Li timetas ĝin. Mi demandis plurajn junulojn, ĉu ili edukus geniulojn. Ili respondis: se ili scius, ke la infano estos feliĉa, eble jes, sed se ne ekzistas garantio por tio, kaj la risko estas tro granda, tiam ne.*

– Mi kredas, ke la respondo estas rajta kaj simpatia – mi same hezitis. La sorto de niaj infanoj kuŝas en mia koro, kaj mia ĉefa strebo estas feliĉigi ilin. Sed ne sufiĉas nur deziri la feliĉon de niaj gefiloj, ni devas estigi kaj disvolvi en ili la kapablon esti feliĉaj. Multaj vojoj kondukas al la feliĉo, kvankam ne ĉiuj kun sama certeco, sed inter ili la plej certa kaj garantiita estas – laŭ mia opinio – tiu de la geniuliĝo. Pro tio mi elektis tiun vojon.

– *Laŭ la ĉiutaga opinio veras la kontraŭo, t.e. la vivo de geniulo malfacilas; pli danĝere estas sekvi ĉi tiun vojon, ol tradiciajn, averaĝajn vivovojojn.*

– Denove misopinio. Estas nekontesteble, ke la sorto de geniulo povas esti ankaŭ malfacila, sed tio ne signifas, ke malfacila homa vivo ne povas esti feliĉa, kaj ĉefe ne signifas, ke homoj kun nemalfacila vivo estas pli feliĉaj. Inter negeniuloj proporcie pli multas malfeliĉuloj, kiel alkoholuloj, narkotuloj, soluloj, neŭrozuloj, splenuloj, monotonuloj, senceluloj ktp.

– *Eĉ se mi akceptas tiun ĉi aserton, el ĝi ankoraŭ ne sekvas, ke geniuloj venas al feliĉo. Oni legas multajn kazojn en gazetoj, ke ekzemple olimpika ĉampiono ĉesas sporti kaj deklaras, ke li neniam plu prenos remilon en la manojn, ne stariĝos al tenistablo, ne saltos en akvon ktp. Ili tediĝis, trompiĝis en siaj esperoj, trosatiĝis.*

– Mi ne dubas, ke ekzistas vereroj en tiuj informoj. Troviĝas ja homoj, kiuj tediĝis de siaj ĝisnunaj okupoj. Ekzistas tiaj, kiuj trosatiĝis kaj tiaj, kiuj faras subitajn, nepripensitajn deklarojn. Sed ni ne juĝu tro rapide, kaj ne tiru el tiuj informoj teoriajn konkludojn.

Unue, sportĵurnalistoj soifegas sensaciojn, kaj ĉion plenblovas; nepripensitajn deklarojn ili ŝajnigas definitivaj decidoj. Due, mi konas multajn sportistojn, kiuj, ĉesinte sporti, daŭrigis sian aktivadon sur la sama tereno kiel trejnistoj, sekciestroj de kluboj, arbitraciistoj, manaĝistoj. Fine: kial estas malbone, se iu modifas sian karieron, ŝanĝas sian fakon? Mi ne komprenas ĉi tiun malaprobon. Kial tio malbonas? En tio ja manifestiĝas la multflankeco. Por ŝanĝi karieron, oni devas havi plurajn diversspecajn kapablojn. Ĝuste ĉi tie mi vidas la avantaĝojn de geniulo. La kapabloj de geniulo konverteblas pli efike ol tiuj de aliuloj. La kariermodifo pruvas ĝuste la vastan liberecsferon de geniula vivo kaj ne ties mankon. Mi tamen devas rimarkigi, ke la situacio de la steloj de fizikaj sportoj pli malavantaĝas: ili eble junaĝe maljuniĝas pro sia sporto.

– *Kiel pruveblas, ke genio kaj feliĉo interapartenas?*

– Tio pruveblas ankaŭ teorie, sed mi povas konfirmi tion per la ekzemplo de miaj filinoj – en la praktiko. Teorie de genio kaj feliĉo estas prefere interapartenaj, ol kontraŭaj statoj. Kiel mi jam menciis: *genio = laboro + bonŝanco.*

La feliĉo estas kompleksa fenomeno (procezo kaj stato), kiu enhavas ankaŭ komponantojn de la genio. Ĝin konsistigas multaj elementoj: ĝojo pri laboro, honesteco, sano, saĝeco, materialaj kondiĉoj, gajeco, amo, optimismo, kuraĝo, trankvileco, senzorgeco, plenumo de devoj, kontentigo de spiritaj kaj materialaj bezonoj, ĝojosento, kontenteco, perspektivo, ĝusta vivkoncepto, plena travivo de amado, ripozo post bone plenumita laboro, kreado, sukceso, starigo de celoj, altnivelaj bezonoj, kaj mi povus longe daŭrigi... Resumante kaj grupigante tiujn komponantojn, ni povas priskribi la feliĉon per la sekva formulo: *feliĉo = laboro + amo + libero + bonŝanco.*

Kie mi komprenas sub profesio laboron, plenumojn, kreadon; sub amo sentojn donatajn al aliuloj kaj reciprokatajn; sub stato de libero la eblojn kaj kapablojn de la homo iĝi memstara, memaga kaj krea individuo; kaj sub bonŝanco la unuecon de hazardaj eksteraj (rekono, paco, familia medio ktp.) kaj internaj (sano, forto, fiziologiaj donitaĵoj, spiritaj kaj materialaj bonoj ktp.) faktoroj.

Tiasence la feliĉo estas kompleksa fenomeno. El la formulo jam senteblas, ke ĝi ne ekskludas, sed inkludas ja la komponantojn de geniula vivo.



– *Mi akceptas, ke la feliĉo kaj la plenkreskula genieco interapartenas, sed el tio ne sekvas rekte la respondo al tio, kiel rilatas la vojo de geniinfano al ia feliĉo. Multaj opinias, ke la geniinfano egalas al prirabita infanaĝo, kaj la mirinfano al miro: „ĉu infano?”.*

– Vi vortigis tre gravan demandon, kvankam iom ironie. Unue, ne tiom sennubas la infanaĝo, pri kiu averaĝuloj tiel sopire rememoras. Kiel instruisto mi spertis tre ofte, ke ne tre multaj homoj havas feliĉan infanaĝon. Miajn impresojn konfirmas ankaŭ aliuloj. Antaŭ kelkaj tagoj mi legis ĉe la filozofino *Ancsel* Eva: „Observu longe la infanvizaĝon, kaj vi vidos: se ekzistas sorto, ĝi tre frue komenciĝas.”

Gepatroj faras multon por la feliĉo de siaj gefiloj, sed ili ne ĉiam edukas bone, ne ĉiam sukcesas, kion ili volas. Ili ne preparas la infanojn bone por la futuro; ofte ne sufiĉe valoras la „vojaĝkofro”, kiun la gepatroj donas al ili por la vivo. Ankaŭ materiale ili ne ĉiam antaŭzorgas. Ili aĉetas al la infanoj donacojn, altfidelan sonaparataron, aŭtomobilon kaj similaĵojn, sed ili domaĝas la monon por lingvoinstruado. Poste ili transŝovas la respondecon al la lernejo – kie ĝenerale mankas la necesaj kondiĉoj – kaj al la malbona amika rondo.

Mi kulpigas kompreneble ne nur la gepatrojn pro tiu situacio. Ankaŭ la socio ne donas la necesan subtenon. Okazas ekzemple, ke oni fortimigas la gepatrojn, kiuj volas plene evoluigi la kapablojn de siaj infanoj, per la argumentado, ke ili estas tro ambiciaj. Oni diras, ke ili pelas siajn infanojn por realigi tiamaniere, kion ili mem ne sukcesis efektivigi. Mi konas persone homon, kiu volis paŝi kun sia infano sur similan vojon, kiel la nia, sed kiam la gazetaro kaj radio malfermis tutfrontan fajron kontraŭ ili, la nervoj de la patro preskaŭ kolapsis, kaj li rezignis labori por la afero.

– *Ĉu malgraŭ ĉio ĉi vi povas pruvi, ke viaj filinoj estas feliĉaj?*

– Jes, tion mi firme asertas, kaj inter miaj edukadaj sukcesoj tion mi konsideras la plej grava. Duoble mi ĝojas pri tio! Unue, ĉar tio veras, kaj due, ĉar per tio praktike pruviĝis la valoro, senco kaj utilo de mia pedagogia metodo, tiu de la geniedukado.

– *Sed per kio vi povas atesti vian asertón?*

– Unuavice per la realaĵo. Rigardu miajn filinojn, kaj se vi havas iom da psikologia senso, vi povas konstati multon el ilia rigardo, mienado, teniĝo, rido, senĝeneco, moviĝo. Ne hazarde mi proponis publikigi multajn fotojn en la libro, por ke ankaŭ aliuloj vidu tion.

– *Mi scias, ke vi neniam fanfaronis pri via vivovojo, sed se aliuloj dubas pri la feliĉo de viaj filinoj, vi devus ilustri, kiom bunta kaj varia estas ilia vivo.*

– Ili renkontiĝis jam kun multaj famuloj: ĉefministroj, ambasadoroj, princino *Diana*, partoprenis societajn akceptojn de milionuloj, urbestroj; ŝakludis kun UN-delegitoj en la palaco de UN. Ili kontaktiĝis kun mondfamaj artistoj, olimpikaj kaj mondĉampionoj; partoprenis kontraŭnarkotaĵan kampanjon en Kanado; rolis en specialaj rektaj televidprogramoj; donis televid, radio- kaj gazetintervjuojn tra la tuta mondo. Antaŭ nelonge ili partoprenis la akcepton fare de la usona prezidento *Bush* en Budapeŝto.

Proksime al la Suda Poluso, ĉe la Magelana markolo ili ludis kun pingvenoj, en Aŭstralio kun kanguruoj kaj koaloj, kaj en la Negeba dezerto kun kamelo. En Islando ili sunumis sin en unumetra neĝo, ĵetadis neĝbulojn en bankostumo, kaj vidis la faman blankan nokton. En Nov-Jorko ili flugis en privata helikoptero inter nuboskrapuloj. Ili ekskursis en mezamerikan praarbaron, ĉe la Meksikia golfo descendis paraŝute en la maron.

Ili ŝakludis en interesaj lokoj, kiel la Brusela centro de la Komuna Merkato kaj la Nov-Jorka Monda Komerca Centro, unu el la plej grandaj konstruaĵoj de la mondo. Ili vizitis tiajn amuzparkojn, kiel *Disneyland*, la Kopenhaga *Tivoli*, la Viena *Prater* kaj la plej famajn botanikajn kaj bestĝardenojn de la mondo. Ili ruletis en la kazino de *San Juan;* baniĝis jen en la Atlantika, jen en la Pacifika Oceanoj, same kiel en la Mediteranea, Morta, Kariba kaj Nigra maroj. Okazas ankaŭ, ke dum morne vintras en Eŭropo, ili somerumas en Aŭstralio aŭ Meksikio. (Somere, se ni estas hejme, ili sunumas sin plej ofte sur la panorama teraso de la tegmento.)

Ili vizitadis kaj vizitadas sinsekve la plej famajn muzeojn de la mondo: *Louvre* en Parizo, *British Museum* en Londono, la Vatikanan Muzeon ktp. Mirindaj aerodromoj akceptas ilin ekz. en Singapuro aŭ Dubajo. Ili tranoktas en plej famaj luksaj hoteloj. Ili vidis mirindan artan fajradon en Parizo kaj en la svislande *Biel*. Ili promenis kaj rigardis vidindaĵojn en urboj, kiel Nov-Jorko, Vieno, Rejkjaviko, Zuriko, Parizo, *Cannes,* Varno, Sofio, Montrealo, Otavo, Vankuvero, Sidnejo, Melburno, Kopenhago, Bruselo, Buenos-Ajreso, *San Juan,* Moskvo, Munkeno, Kolonjo, Hamburgo, Berlino, Dresdeno, Ateno, Saloniko, Romo, Madrido, Londono, Meksikurbo, Prago, Jerusalemo, Amsterdamo, *Monte-Carlo, Las Vegas, Baden-Baden,* Bukareŝto, Beogrado. Longe mi povus daŭrigi.

Ili regule partoprenas esperantistajn renkontojn. Se ili emas kaj havas tempon, ili fotadas, videoumas, aŭskultas muzikon; kolektas ŝaklibrojn, prisakajn poŝtmarkojn, ŝaktemajn bildojn kaj ŝakgarniturojn. Ili havas grandan kolekton el sondiskoj kaj sonkasedoj.



Ili havas multajn amikojn en diversaj partoj de la mondo, kun kiuj ili korespondas, kontaktiĝas persone aŭ telefone. La domo – se ili estas hejme – staras ĉiam aperta por gastoj.

Tiom pri la „koloroj" de ilia vivo. Sed mi certas – kaj tio vere donas forton al mi –, ke tamen ne tio plej gravas por ili, sed la familio, la fratinoj, iliaj sukcesoj, komunaj ĝojoj.

*– Mi povas aldoni: mi neniam venis al vi sen trafi ĉe vi gaston, pli ĝuste plurajn gastojn, amikojn, ŝakkolegojn. Sed kion diras la knabinoj pri sia propra vivo? Ĉu ili sentas sin feliĉaj?*

– Demandu ilin!

*– Mi ne volas rekte demandi ilin, ĉar mi timas, ke ankaŭ min ili primokos, kiel la ĵurnalistojn metantajn similajn demandojn.*

– Do mi mem parolos: Hieraŭ ekzemple mia granda filino Zsuzsa, kiu pro la aĝo jam pensas pri edziniĝo, diris al mi: „Paĉjo, kiel feliĉa mi estus, se mi havus tian filinon, kiel mi."

*– Ho estas vere sprita respondo al la demando. Ne malpli frapa estis ŝia respondo al mia interesiĝo, ĉu ŝi edukus sian filon aŭ filinon tiel, kiel vi edukis ŝin. Ŝi diris nun „Mi ne scias." Sed post plua insistado ŝi respondis: „Mi sentas: ne certas, ke ankaŭ en mi troviĝas tiom da oferemo, memrezigno, kiom estis en miaj gepatroj." Por mi tio estas konvinka argumento, „pruvobjekto". Same opinias prie ankaŭ tiuj, kiuj bone konas ilin. Via najbaro, la akravida psikologino Mészaros Judit decide prijesis mian demandon, ĉu la knabinoj estas feliĉaj: „Certe, kvankam eble alimaniere ol ceteraj knabinoj. Sed feliĉo ne portas uniformon."*

*Mi citas kelkajn deklarojn de psikologoj, kiuj bone konas la familion. Ĉi-jare aperis ekzemple en la okcidentgermana gazeto Stern la artikolo de Jochen Harberg „Genio planeblas". Aŭdinte la ridojn de la knabinoj, la aŭtoro fermas la artikolon per la vortoj: „...tio signalas, ke ĉi tiuj knabinoj estas feliĉaj."*

*Reinhard Münzert, la renoma psikologo (pasintjare en FRG aperis lia libro kun la titolo Schachpsychologie) skribas jene: „Fine, ĉu la eksperimento vere sukcesis? Ĉu oni ne devas diri, ke kvankam la knablnoj atingis bonajn rezultojn, sed ĉu ili estas ankaŭ feliĉaj homoj? Ĉu ili ne estas edukitaj tro unuflanke, senigitaj je senzorga infanaĝo? Mi povis observi la familion Polgár... kaj kion mi vidis, absolute konvinkis min: mi vidis tri tute naturajn, amikemajn, ĉarmajn, prudentajn kaj petolajn knabinojn. Ili gajiĝadis ofte. Oni povis klare vidi, ke ili estas feliĉaj."*

*Al ĉi tiu vico apartenas la artikolo de la psikologo, internacia ŝakmajstro Leon Pliester kun la titolo „Mirinfanoj", kiun li verkis por la periodaĵo*

*„Ŝakludanta Nederlando" (1986), kaj kies enhavon li antaŭ nelonge, dum sia vizito ĉe la familio ankaŭ persone konfirmis: „Estas kompreneble, ke vizitante Budapeŝton en septembro, mi volis utiligi la okazon por konatiĝi kun la knabinoj. Min interesis ne nur ilia ŝakkapablo, mi volis mem sperti, kiaj mirinfanoj ili estas, en kio kaŝiĝas la sekreto de ilia ludforto, kaj kian edukon ili ricevas. Mi agrable surpriziĝis, kiam mi renkontis du plenkorajn gepatrojn en societo de tri tre ĉarmaj, senĝene kondutantaj infanoj. Mi devas agnoski, ke tiu familio impresis ankaŭ min profunde; mi alte estimas ilian vivmanieron."*

– Permesu al mi mencii ankaŭ taksadon en Hungario. Antaŭ nelonge vizitis min sinjorino *Dudás* Lászlóné, kiu verkis sukcesan diplomlaboron en la Pedagogia Altlernejo de *Eger* pri mia eduka sistemo. Laŭ ŝi: „Klare vidiĝas, ke la infanoj estas feliĉaj. Eĉ unu elementon mi ne trovis en ilia vivo, kiu supozigus, ke ili estas malpli feliĉaj, ol iliaj samaĝuloj."

*– Ĉi tiuj opinioj, citaĵoj, okazaĵoj aparte ne konsidereblas science valoraj pruvoj pri la feliĉo de la tri knabinoj, kaj ili same ne sufiĉas por refuti opiniojn, laŭ kiu la infanoj estas senĝojaj, teditaj „ŝakmaŝinoj". Tamen ĉiuj ĉi informoj kune jam konsidereblas iaspeca pruvo. Cetere, ankaŭ mi persone povas atesti, ke ĉiuj viaj filinoj estas sanaj – kaj fizike, kaj psike. Dum tiuj 4 – 5 monatoj, kiam mi vizitadis vin, ili ne malsanis eĉ unufoje. Mi parolis kun ilia kuracisto, kaj li eĉ ne memoras, kiam ili entute fartis nebone. Dum ĉi tiu periodo ili partoprenis multajn konkursojn alportantajn elstarajn sukcesojn kaj ankaŭ relative malfortajn atingojn. El psikologia vidpunkto min interesis ĉi-lasta kazo: kiel ili klarigas al si la malsukcesojn. Eĉ unufoje mi ne aŭdis, ke ili atribuis la malpli bonajn plenumojn al eksteraj faktoroj. Neniam ili ŝovis la kulpon al la medio, vetero, eĉ unufoje ili ne senkulpigis sin per malvarmumo aŭ dentodoloroj, kiel mi „alkutimiĝis" aŭdi de konkursantoj en aliaj sportobranĉoj.*

*Mi unufoje povis ĉeesti „miraklon": mi kunaŭdis telefonvokon, kiu sciigis pri elstara venko de Judit en Anglio. Zsófia akceptis ĝin ĉi tie hejme kun vasta rideto kaj signo de sennuba feliĉo sur la vizaĝo, fiere ŝi fingroklakis – sen la plej eta ombro de ĵaluzo.*

*Alifoje mi fariĝis atestanto de la lingva ĵonglado de Zsuzsa, kiam en rondo de eksterlandaj gastoj ŝi senĝene interpretadis el la germana en la anglan, el la angla en la rusan kaj el ĉiuj en la hungaran, tute precize. Pripensu la leganto, kia afero estas, se ies plej grava problemo – ĉi-okaze temas pri Judit – estas, ĉu ŝi trejnu sin iom pli en tabloteniso, por fariĝi tablontenisisto de internacia rango, aŭ ŝi ne ŝarĝu sin pli, por ne damaĝi*



*sian senrompe suprenarkantan ŝakludistan karieron. Al ĉiu, kiu volas fariĝi feliĉa, mi deziras nur tiajn zorgojn.*

*Koncerne ĉi tiun temon ni devas priparoli ankoraŭ unu teorian demandon. Ĉu oni povas eduki konscie al feliĉo, aŭ ni lasu, ke ĝi mem kreiĝu? Laŭ Freud: „La intencon fari la homon feliĉa, la plano de la Kreado ne enhavis."*

– Mi estas pedagogo, do mi okupiĝas „laŭofice" pri la celo de la edukado, kaj estas nature, ke kiel unu el la celoj de la edukado, la feliĉo devas okupi sian lokon en mia sistemo. Ĉu oni povas eduki konscie al feliĉo? Mi opinias, ke jes, eĉ se ne kun tia certeco, kiel al konkreta lingvokono aŭ lerteco en fizika sporto. La unua kaj nemalhavebla kondiĉo fariĝi feliĉa estas, ke oni volu la feliĉon. Multaj homoj deziras feliĉigi sian infanon, volus vidi lin tia, sed ili faras por tio nesufiĉe aŭ eĉ tre malmulte. Ili lasas sin gvidi de la spontaneeco de edukado. Mi, kontraŭe, havas la principon, ke tre konscie oni aliru kaj faru la edukadon al la feliĉo.

*– La pedagogia fakliteraturo ŝuldas ties reserĉadon.*

– La fakliteraturo eĉ ne metis la bazon de la metodika teorio de edukado al feliĉo. Sed mia genieduka koncepto povas servi kiel kontribuo al ellaborota teorio pri la feliĉo.

*– Kio konsideriĝas celo kaj kio rimedo en via pedagogia sistemo?*

– La ĉionampleksa celo estas sendube la feliĉo, kaj rilate al ĝi la geniedukado konsideriĝas rimedo, sed ankaŭ ĉi tie temas pri dialektika procezo: en la reala vivo unu transkreskas en la alian, t.e. ili antaŭenigas, plifortigas sin reciproke. La atingoj kondukas al feliĉosento, kaj la feliĉo donas novan motivan forton por pli altaj atingoj. Tiel fariĝas el celo rimedo kaj el rimedo celo.

*– Tamen: kio okazus, se la geniedukado iam kontraŭdirus al la feliĉo de viaj filinoj?*

– Estas ekskludite. Sed se tamen ia paneo estiĝus en mia sistemo, tiam sendube la celo havas unuan rangon, kaj en ties intereso mi forlasus la malbonajn metodojn.

*– Nun, bonŝance, eĉ ombro de tia danĝero ne minacas. Jen vi pruvis, ke eblas eduki geniulojn. En ordo, sed por kio tio servas? Ĉu tio valoras la penon?*

– Mi respondas per unusenca kaj decida „jes". Valoras, ĉar tio kondukas individue al feliĉo, sed temas pri io pli ol nur tio: la geniedukado estas dezirinda kaj utila ankaŭ en socia senco.

*– Mi vidas, ke vi staras senkomprene antaŭ la demando, tial mi provas refoje vortigi ĝin. Ĉu la geniedukado estas entute pozitiva celo? Ĉu ni*

*bezonas t.n. piramidan valorordon? Anhelante, ni grimpas al la pinto. Sed por kio? Tio povas esti nek individua celo, nek socia programo.*

– Kion diri? Mi ne asertas, ke sube aŭ meze de la piramido individuo ne povas esti feliĉa, tamen la suban nivelon ni ne faru socia celo! La homo progresas, ankaŭ la historio kaj nia lando bezonas laŭeble plej bonajn fakulojn, ĉiam pli multajn kreajn geniulojn. Sen tio forrestos ĉia progreso. Se la socio ne strebas al la pinto, ankaŭ progresi ĝi ne kapablas.

– *Se estas vero, ke nian intelektan evoluon en decida grado determinas la edukado, facile povas okazi, ke etike malpli evoluinta geniulo estas pli damaĝa, ol etike evoluinta, sed mezkapabla homo.*

– La homara historio montras, ke por la socio estas danĝeraj unuavice la etkapablaj aŭ mezkapablaj (do ne geniaj) kaj morale ne evoluintaj homoj, precipe se ili ekposedas potencon (kiel *Hitler*). Kompreneble, estas ankaŭ danĝere, se persono tre talenta sur iu specifa kampo, sed samtempe malmorala, ekregas. Ekzemple *Napoleon* sendube estis talentega organizanto kaj gvidanto, tamen li uzis tiujn kapablojn por sensence militi kaj subjugi popolojn.

La geniedukado – laŭ mia difino –celas la disvolvadon de la personeco., la feliĉan homon kaj la evoluigon de socie kaj morale progresema individuo. Tial mi diras: la geniedukado, la edukado al feliĉo kaj la humanismo estas unueca afero; oni ne evoluigu unu sen la alia. Cetere, tiu, kiu intencas eduki elstare kapablan homon el sia infano, certe ne volus, ke tiu fariĝu etike neevoluinta, malhonesta homo. En la historio geniuloj reprezentas prefere la bonon ol la malon.

Estas vero, ke la plej multajn elementojn de mia eduka metodo – kiel rimedojn – oni povas turni en iun ajn direkton. Sed la samo validas por ĉiu rimedo, eĉ por ŝtono. Per ŝtono oni povas rompi nukson, sed ankaŭ homan kapon – kaj pri tio kulpas ne la ŝtono. Kvankam ankaŭ mi ne respondecas, por kio oni aplikas miajn konceptojn kaj metodojn, tamen estas mia devo atentigi pri la danĝeroj de la eventuale neĝusta, damaĝa apliko. Do estas nepermesende, ke oni apliku nur parton de miaj metodoj – nome tiujn, kiuj rilatas al intensa trejnado sur iu mallarĝa faktereno –, neglektante mian starpunkton pri la morala edukado. La elstare talentajn fakulojn necesas eduki tiel, ke ili prezentu eksterordinarajn ecojn ne nur en sia fako, sed ankaŭ koncerne la moralon.

Oni ofte asertas, ke la sciencistoj ne respondecas pri tio, se aliaj utiligas la sciencajn atingojn por malmoralaj celoj. Tio veras nur parte: hodiaŭ jam ĝenerale maleblas utiligi la sciencajn rezultojn sen la aktiva kunlaborado de sciencistoj. Ju pli klerigita kaj ju pli talenta iu estas, des pli granda estas lia



socia respondeco. Mia edzino kaj mi klopodis vivi konforme al tiu principo, kaj ni edukis niajn filinojn laŭe.

– *La edukado havas du „m": miraklon kaj misrezulton. Vi pruvis la unuan, sed ankaŭ ĝi havas sian riskon. Klein Sándor opinias pri tio jene: „Mi devas diri, ke dum mi ne sciiĝis pri la Polgár-fenomeno, mi ne kredis, ke geniulo edukeblas. Se iu tamen sukcesis atingi tion, kial aliulo ne povus tion fari? Se la homo vere tiom edukeblas, plej granda risko kaŝiĝas en tio, ke ege granda respondeco pezas sur la gepatroj. Sed se ni ne uzas ĉi tiun metodon, ankaŭ tiam enormas la respondeco: ni disponas pri mirindega afero, kaj ni ne utiligas ĝin".*

## 4. ESTU VIA VIVO ETIKA MODELO

„Misedukiton ne naŭzas kulpo."

Talmudo

„Kio estas humanismo? Homamo, nenio alia, kaj per tio ribelo kontraŭ ĉio, kio malpurigas, senhonorigas la homan personon."

T. *Mann*

„Plezuro ne kuniras kun virto, sed virto kuniras kun plezuro."

*Aristotelo*

– *Refoliumante al la antaŭaj ĉapitroj, nun mi rimarkas, ke al miaj demandoj postulantaj raciajn respondojn, vi reagis ĉiam rivelante emociajn „kolorojn" kaj ankaŭ moralajn valorojn. Mi sentas min iom kiel dum legado de Kant, kiu skribis, eĉ se temis pri la plej pura logiko kaj malvarma konsekvenceco, ĉiufoje kun alta patoso, se ektemis pri la moralo. Kio estas ties kaŭzo?*

– Kiu volas vivi en paco kun si kaj aliuloj, kiu volas havi puran konsciencon, kiu okupiĝas kun alvokiĝo pri pedagogio, kiu amas sian familion, kiu volas harmoniigi sin kaj sian socian medion, tiu ne povas preteriri la etikon. Sen moralaj valoroj mankas kompaso por la vivo. La tasko de la homo sur ĉi tiu Tero estas konduki sin kaj aliulojn al perfekteco.

– *Dum niaj interparoloj ĉiam revenadis al mi la penso, kial vi, kiun trafis tiom da vangofrapoj, nekomprenemo kaj insidoj, kaj kiu tamen ne enfermis sin, ne retiris sin, ne ofendiĝis, nun publikigas viajn pensojn, metodojn kaj spertojn, kiam la fruktoj de via laboro maturiĝis, via elektita vojo montriĝis ĝusta, kaj kiam vi ne plu bezonus insisti pri pruvado?*

– Por mi estas interna leĝo, fari bonon. En mia tuta vivo mi klopodis realigi altajn moralajn valorojn, mi ĉiam kredis je moralaj ideoj, kaj kiel pedagogo kaj patro mi ĉiam disvastigadis ilin. Mi ne povus vivi alimaniere, ol mi konfesas. La strebo harmoniigi vortojn kaj agojn, la bezono enpraktikigi ideojn estas integra parto de miaj moralaj koncepto kaj praktiko. Pro tio foras de mi ĉia malgrandanima reago, venĝemo, taktikado – por mi la malfermiteco estas interna ordono. Kvankam mi scias, ke per ĉi tiu libro mi „incitas" multajn al atako, mi scias, ke oni kritikos kaj ofendos min, kaj mi elmetos min al kontraŭagoj, tamen mi faras tiun ĉi paŝon – ne sekvante la konsilon de la saĝa reĝo Salomono: „Ne estu tro virta, kaj ne rezonu tro multe: kial vi devas vin konfuzi?"



– *Multaj, kiuj konas vin pli proksime, asertas, ke ĉe vi estas interesa unuavice ne la ŝakmetodo, plej gravas ne via pedagogia teorio, sed la morala modelo, kiun vi efektivigas per via vivo. Oni diras, vi estas heroo de nia tempo: vi eltenis malfacilan provon, dum kiu vi pravis. Vi ne lasis deflankigi vin de via vojo, ne ŝanĝis haŭton, restis simpla kaj modesta. Oni laŭdas vin, ĉar vi ĵetis ŝtoneron en la mortan akvon de la ŝakmondo de la sepdekaj jaroj, ĉar vi ellaboris novan familimodelon, ĉar via individua ekzemplo fariĝis socie kaj morale modelvalida.*

– Tio estas troigo en certa senco. Mi faris, kion mi devis fari, kaj ankaŭ nun mi faras la samon per ĉi tiu libro. Mi transdonas miajn spertojn, ĉar kiel la Talmudo diras: „Kiu scias ion belan kaj ne transdonas ĝin, same kulpas, kiel tiu, kiu scias ion malbelan kaj transdonas ĝin."

– *La libro temas pri edukado de geniuloj. Ĉu ekzistas morala geniulo?*

– Ni aliru la temon el pluraj flankoj! Se ni komprenas sub la nocio „genieco" aktivadon je avangarda nivelo de la koncerna epoko kaj la socian maturecon de „perfekteco", tiam morala geniulo nomiĝas tiu, kiu staras je la nivelo de morala „perfekteco". En eksterordinaraj situacioj ĉiam aperis eksterordinaraj homoj (Mahatma *Gandhi*, Martin Luther *King*, *Herzl* Tivadar, Raoul *Wallenberg*, *Semmelweis* Ignác, Albert *Schweitzer* ktp.), kiujn ni nepre povas nomi moralaj geniuloj. Sed ne nur en eksterordinaraj situacioj homoj povas fariĝi moralaj geniuloj.

– *Permesu al mi ĉi-rilatigi la penson de Bertolt Brecht: „Oni devas kompati la popolon, kiu bezonas heroojn."*

– Mi konsentas pri tio, ke oni kompatu tiun popolon, kiu bezonas heroojn, sed mi aldonus, ke oni devus eĉ pli kompati tiun popolon, kiu – kiam ĝi bezonus – ne havas heroojn. La morala edukado devas sugesti ne: „Estu heroo!" Ĝi devas transdoni valorojn, kiuj en okazo de bezono kapablas altigi la homon ĝis heroo. La morala geniulo estas ekzemplo – kaj en limsituacioj, kaj en firmaj periodoj. Ekzemplo ĉiam trovas sekvantojn.

– *Mi parolis ankaŭ kun majstrotrejnisto Gyimesi János, kiu jene respondis al mia demando, ĉu ekzistas geniuloj en la korbopilka sporto: „Se kvin ludantoj trejnas sin sur la korbopilkejo, mi diras, ke kvinopo laboras, sed se aperas inter ili Larry Bird [usona profesia korbopilkisto], sur la kampo ludas jam ses geniuloj." Jes, geniulo havas emanadon, aŭron. El kiuj ecoj vi elektas, kiam vi „planas" moralan geniulon?*

– Mi vidas antaŭ mi homon, kiu estas oferema, honesta, kuraĝa; bona amiko kaj bona familiano, ne cinika, ne egoista, sed kunsentema kaj bonkora, kiu sentas respondecon, estas atentema kaj kapablas gardi sekretojn, kiu ne misuzas sian potencon, ne kalumnias, kaj povas regi siajn

ambiciojn, kiu estas justa, postulema rilate kvaliton, internaciisto kaj ne enviema, kiu kondutas ĝenerale amikeme kaj ne juĝas facilanime aliulojn, kiu estas persista, iniciatema, devoscia, kritikema, memkritikema kaj konscienca, kiu bone rilatas al lernado kaj sinklerigo, kaj kiu kapablas je sinedukado (sinperfektigo), kiu havas memregon, kiu estas sincera kaj strebas al propra kaj aliula libero, kies faka etiko estas same altnivela, kiu estas modesta, kapablas ami aliulojn, kiu estas solidara, tolerema kaj ĝentila, sane konkurema, helpema, pacama kaj bonintenca, kiu montras respekton al tiuj, kiuj meritas ĝin ktp. Jen tia homo estas nepre ekzemplodona morala aŭtoritato. Kiuj havas en si ĉiujn el la supraj ecoj je alta nivelo, estas moralaj geniuloj eĉ, se ili neniam fariĝas herooj kaj eĉ, se ilia medio ne konsideras ilin tio.

– *Kiel ni eduku homojn moralaj?*

– La homo ne naskiĝas morale preta, ne kunportas el la utero moralajn valorojn, maksimume kapablon por fariĝi morala estulo. Sed kia li fariĝos: familiama aŭ malamema, altruisto aŭ egoisto, humanisto aŭ faŝisto – ne estas genetike fiksite, sed dependas unuavice de la edukado kaj medio. Kiel ĉiujn kapablojn, tiel ankaŭ la moralajn oni povas kaj devas eduki.

Estas vere, ke ankaŭ ĉi tie plej gravas la infanaĝaj influoj. Sed plenkreskulo same ankoraŭ formeblas. Demokrato povas transformiĝi en faŝiston aŭ faŝisto en demokraton. Povas okazi ankaŭ, ke forlasinte prizonon, iu venas en bonan societon kaj fariĝas honestulo.

Ankaŭ ĉi tie ni ne povas lasi nin gvidi de spontaneeco: oni devas formadi la moralon konscie. En nia jarcento la etiko estas tre neglektata tereno de la instruado-edukado. Oni povus certe fari pli multe ĉi-rilate, ol kiom ĝis nun la socio faris. Ne nur la familia kaj lerneja edukado povus havi enorman rolon, sed ankaŭ la scienca direktado de la socio kaj la utiligo de amaskomunikiloj. La informado mem kompreneble ne sufiĉas, kvankam ĝi estas pli ol nenio. Oni devas krei la kondiĉojn de la moralpraktikado.

– *Kiel vi opinias pri la t.n. dekalogo de moralaj valoroj?*

– Laŭ mia sento tia kodo superfluas. La morala vivo de la homo estas tiel komplika, kompleksa, vastega, ke ĝi enŝtopeblas en nek 6, nek 12, nek 128 punktojn aŭ ordonojn. Cetere, tian rigidan kaj fermitan sistemon mi opinias elradiado de dogmeca vidmaniero. Tio kompreneble ne ekskludas, ke observante la vidpunktojn de la edukado, oni formulu iun ŝanĝeblan, modernan dekalogon.

– *Provu tamen! Kiajn principojn vi opinias gravaj por vi?*



– Estu laŭ via deziro, mi listigos dek principojn sen aparta pripenso. Tio signifas, ke morgaŭ mi eble envicigus aliajn valorojn inter jenajn dek (konservante ĉi tiujn).

1. Montru ekzemplon: vivu tiel, ke aliuloj sekvu vin!
2. Lernu, laboru multe, estu postulema al vi kaj aliuloj!
3. Volu ami, doni kaj ricevi amon!
4. Vivu kun vi kaj aliuloj en paco, vivu sanan kaj moderan vivon!
5. Strebu al feliĉo kaj klopodu fari feliĉaj ankaŭ aliulojn!
6. Havu humanismajn ideojn kaj luktu kontraŭ antaŭjuĝoj!
7. Gardu la pacon, trankvilon de la familio, eduku viajn infanojn laŭeble plej perfektaj!
8. Estu honesta, respektu vian kaj aliulan liberon!
9. Fidu la evoluon de la homoj, flegu la malgrandajn kaj grandajn komunumojn!
10. Kaj fine: la ĵokero, t.e. ĉio, kion mi opinias morala kaj aktuala, sed kio ne eniĝas en la antaŭajn naŭ punktojn.

– *Se vi elstarigus unu „ordonon", kiu estus tiu?*

– Mi citas Hilelon el la Talmudo: „Ne faru al via homfrato, kio estas malaminda por vi – jen la tuta leĝo, la cetero estas nur klarigo."

– *Ankaŭ el la supra valorordo emaniĝas humamisma, puritana koncepto. Mi opinias, ke vi vivas vere laŭ ĝi kaj en simpla maniero, dum multaj konsideras vin ĝuste kontraŭaj: karieristoj kaj monameguloj.*

– Mi ne estas asketo, nek puritano. Tamen venadas tempoj, kiam oni devas redukti siajn bezonojn. Tiel estis komence, kiam preskaŭ en mizero – nutrante nin per grasopano – mi ekis per la laboro kun la edzino kaj filinoj. Tamen mi ne opinias min asketo. Mi rifuzas la asketismon same, kiel la alian ekstremon, la hedonismon.

Mi ne asertas, ke mi ne postulas tion, kio ŝuldiĝas al mi. Ĉi-jare ekzemple, kiam ni subskribis kontrakton kun la sportklubo MTK, la gazetaro publikigis, ke ni ricevas 600 000 forintojn jare. Pasintjare ĉi tiu sumo estis multe malpli. Ĝi ŝajnas granda monsumo, sed oni ne forgesu, ke ĝi pagiĝas al ni kvin, kaj ĝi estas ne pli, ol po 10 mil forintoj malnetaj ĉiumonate. (= Monata salajro, konkursaj elspezoj, financado de trejnadoj kaj ceteraj elspezoj kune.) Ĉu multe?

Ne miskomprenu min: mi ne diras, ke iu donu senpage siajn valorojn. Ankaŭ ni volas vendi nin por tiu prezo, por kiu aliaj profesiaj konkurantoj, do kiom ni fakte valoras. Laŭ nia konkur- kaj reklamvaloro. Ankaŭ mi

postulas monon por la gastroloj, sed estas jam alia afero, ke ni elspezas ĝin ne por luksaĵoj, sed por libroj, trejnistoj, lingvolernado k.s.

– *Máte Gáspár, internacia ŝakmajstro, kiu ofte vizitadas vin, diris ĉi-koncerne: „Ĉi tiuj infanoj ne estas dorlotataj. Mi jam vidis dorlotatajn infanojn, sed ĉi tiuj ne estas tiaj. Koncerne la klasikan dilemon, „ĉu vilao aŭ infano", la homoj voĉas ĝenerale por la materialaj bonoj. La Polgár-oj ne. Oni povas vidi, inter kiaj cirkonstancoj ili vivis, kiajn malfacilaĵojn ili havis ankaŭ materiale. Tial mi konsideras ilian vivmanieron kaj tion, ke eĉ nun ili ne ŝanĝis siajn malnovajn kutimojn, ne nur pedagogia modelo, sed ankaŭ morala. Kiel homoj, ili ŝajnas al mi tro normalaj."*

– Laŭ mi, mia vivo estas normala, ne eksterordinara. Mi estas konvinkita, ke ankaŭ aliuloj povas fari la samon, kaj ekzistas periodoj, kiam ebla ekzemplo devas ja fariĝi modelo.

– *„La ekzemplo de patro Polgár estas sortodecida – skribis Mezei András –, ĉar la futuro de la hungara popolo dependas de tio, ĉu ĝi kapablos rekoni, kulturi kaj ekspluati la spiritan perfektecon" Ĉu la pedagogia eksperimento, pri kiu ni parolis, harmonias kun la antaŭe eksplikitaj moralaj valoroj, inkluzive ankaŭ tion, ĉu oni rajtas eksperimenti per homo?*

– La objekto de pedagogia eksperimento povas esti nenio alia ol homo, kaj por lia bono oni ne nur rajtas, sed eĉ devas efektivigi pedagogiajn eksperimentojn. Fakte, ĉiuj gepatroj, eĉ se ne konscie, „eksperimentadas" per sia infano. La konscie, humanisme organizita eksperimento estas multe pli pravigebla. La eksperimento estas unu el la rimedoj de la scienca ekkono, per kiu ni estigas laŭplane kaj organizite ian fenomenon, kondiĉon, kaŭzon. Dum la eksperimento ni povas observi la supozatajn efikojn kaj modifi ilin laŭdezire. Mi konsentas kun akademiano *Tétényi* Pál, kiu diferencigis unuflanke eksperimentojn en fermitaj kaj malfermitaj sistemoj, aliflanke – el la vidpunkto de ilia efiko – riskajn kaj sendanĝerajn por la homo. La specifaĵo de nia eksperimento konsistas en tio, ke ĝi efektiviĝas en malfermita sistemo kaj ĝia danĝereco egalas al nulo.

Nia programo jam multfoje ripetiĝis dum la historio. Similaj vivovojoj estas konataj ĉe multaj, escepte plenumkapablaj homoj. Ni nur faris ĝin konscia, kaj per tio ni levis ĝin al teoria rango. Nia eksperimento estas en absoluta senco – humanisma. Ĉi tiu eksperimento ne kontraŭdiras al moralaj valoroj, ĉar ĝi estas utila kaj feliĉiga por la partoprenantoj. Ĝi ne malhelpas la fakan kaj moralan progreson, la harmonian disvolviĝon de la personeco, eĉ, ĝi havas malan efikon. Per la malpliigo de fiaskoj, sensukceseco kaj



malfeliĉo, formado de vivmaniero kaj realigo de vivprincipoj efektiviĝas inter idealaj cirkonstancoj.

La eksperimenton oni devas fari kompreneble kun granda respondeco kaj optimismo. Sed por tio la socio devas esti pli tolerema. Tia kompleksa eksperimento daŭras 15–25 jarojn, kaj en multaj rilatoj povas perturbi ĝin eksteraj faktoroj, kiel la nekomprenemo de oficialaj instancoj, gazetaro kaj publika opinio. La tradicia eduka metodo povas esti ĉu damaĝa, ĉu utila. Nia vojo – laŭ la ĝisnunaj spertoj de nia eksperimento – pruviĝis unusence bona kaj utila. Laŭ mi ĝi estas ekzemplodona, kiun aliuloj povas ripeti laŭ krea maniero.

– *Hodiaŭ vi jam havas multajn estimantojn; kvankam kelkaj homoj ankoraŭ klopodas flankenpuŝi vin, sed forstreki vin oni ne plu povas; viaj rezultoj hodiaŭ jam impregniĝis en la teksaĵon de la hungara socio. Vi jam estas ne nur objekto de sensacio kaj diskutado: vi havas valoran socian influon. Unuavice per tio, ke vian novecan pedagogian teorion vi realigis en la praktiko sur vi mem. En la pedagogio vi kreis sekvindan modelon per tio, ke vi unuigis teorion kaj praktikon.*

– *Sed eble mi parolis tro multe. Eble miaj longiĝintaj laŭdaj frazoj nur malfortigas la pruvopovon de la faktoj, ĉar laŭ la vortoj de Szentgyörgyi Albert: „Oni honoras kreantan artiston plej bone ne per laŭdaj vortoj, sed per tio, ke oni komprenas kaj aprecas lian verkon."*

*Do: al kiuj parolas ĉi tiu libro? Al kiuj vi turnas vin?*

– Kompreneble al miaj kolegoj, al fakuloj, al psikologoj, pedagogoj, al tiuj, kiuj interesiĝas pri ŝakludo, sed unuavice al gepatroj, geavoj, estontaj patroj, patrinoj, edukantoj. Ili pripensu ĉi tiun vidmanieron kaj tion, ke ankaŭ tiel oni povas eduki feliĉan homon.

Mi donas ne recepton, nur vidmanieron kaj volas persvadi neniun al edukado de geniuloj. Mi volas nur montri, ke eblas eduki geniulojn. Mi alvokas neniun, instigas neniun, ĉiu devas mem decidi, kion li volas fari. Mi nur transdonas mian pedagogian sistemon kaj kondukas ĉiun sur la vojo, kiun ankaŭ mi trairis, kun la certeco, ke eblas eduki geniulon kaj ankaŭ indas, ĉar el geniulo fariĝas feliĉa homo.

*Budapeŝto, la 3-an de junio 2004*

## BIOGRAFIO
## de
## POLGÁR LÁSZLÓ

Li naskiĝis la 11-an de majo 1946 en Gyöngyös. La unuan diplomon akiris en la filozofia fako, la duan en la psikopedagogia instruista fako. 15 jarojn sukcese agadis en la instruista kariero, poste plenumis la manaĝadon de trejnoj, konkursoj kaj reklamaferoj de siaj filinoj. Akiris sciencan ŝtupon (PhD), sian disertaĵon skribis kaj defendis pri la disvolvado de kapabloj. Estas majstrotrejnisto (ĉi tiu estas la plej alta trejnista rekono en Hungario).

Ŝiaj filinoj gajnis 12 olimpikajn ormedalojn, plurajn mondĉampionajn titolojn. Ekde 1984 ili gvidas la virinan mondrangliston. Estas plurfojaj Oscar-premiitoj.

Lian pedagogian agadon rekone analizas faklibroj, altlernejaj diplomlaboroj kaj doktoraj disertaĵoj.

Proks. 20 libroj aperis de li. La unua „Eduku geniulon!"en 1989 en la hungara lingvo. Ĉi tiu libro estas ties esperantigo.



## PLI NOVAJ KONKURSREZULTOJ DE LA POLGÁR-KNABINOJ

Zsuzsa:

- unua virino ricevinta, post plenumo de la normoj, la titolon „vira" grandmajstro
- mondĉampiono en rapidŝakludo
- mondĉampiono en fulmoŝakludo
- mondĉampiono en ŝakludo kun tradicia tempo
- plurfoja olimpika ĉampiono
- plurfoja Oscar-premiito
- superis altproporcie la mondĉampionojn *Ĉiburdanidze* kaj *Xie*
- gajnis la viran usonan apertan fulmoŝakan ĉampionadon
- paramaĉo inter Polgár Zsuzsa – Anatolij Karpov 3:3, 2004
- paramaĉo inter Polgár Zsuzsa – Anatolij Karpov 3:3, 2005
- en 1984, 1985, 1986 unua en la mondranglisto, plue dua post sia fratino Judit
- venkinto de tre multaj internaciaj konkursoj
- en 2004, kiam Judit naskis sian infanon, ŝi transprenis ŝian unuan lokon en la virina mondranglisto

(Akiris unuversitatan diplomon, patrino de du filoj.)

Zsófia:

- plurfoja olimpika ĉampiono
- arĝentmedala, post sia fratino Zsuzsa, en la rapidŝaka mondĉampionado
- ŝia Roma konkursrezulto estas Guiness-mondrekordo: el 9 ŝi realigis 8,5 poentojn antaŭante je du poentoj mondfamajn virajn kandidatojn por mondĉampioneco. Ĉi tiu ŝia rezulto estis la 5-a plej bona rezulto de la ŝakhistorio (post *Fischer*, *Karpov*, *Kasparov* kaj *Aljeĥin*. Judit estas la 6-a per sia Madrida rezulto)
- Oscar-Premiito
- mondĉampiono en rapidŝakludo de viroj sub 20 jaroj
- arĝentmedala en la mondĉampionado de tradicia ŝakludo de viroj sub 20 jaroj
- venkinto de tre multaj internaciaj konkursoj

(Finis altlernejon. Patrino de du infanoj.)


Judit:

- plurfoja olimpika ĉampiono
- Usona aperta n-ro 1: 8 poentoj el eblaj 9
- 1-a antaŭ viraj mondĉampionoj en Benidorm
- la plej juna grandmajstro de la mondo en aĝo de 15 jaroj; rompis la rekordon de Robert Fischer (ĉe plenumo de la 1-a normo ŝi ne pli aĝis 13 jarojn)
- 15-jara gajnas la hungaran viran superĉampionadon
- plurfoja Oscar-premiito
- venkas en para matĉo je 5:3 la viran mondĉampionon Anatolij *Karpov*
- venkas la viran eksmondĉampionon Boris *Spasskij* je 4 ½:3 ½
- en la matĉo de la vira mondelektita teamo kontraŭ Rusio venkas la mondĉampionon Garry Kasparov
- laŭ voĉdonado de – la plej grava eldonaĵo – Sakk-Informátor (pri la plej bela-bona partio) finis 7-foje en la 1–2-a aŭ 3-a loko
- ekde januaro 1988 gvidas – sen interrompo – la virinan mondrangliston kaj 7-a en la vira mondranglisto
  – venkinto de multaj internaciaj konkursoj

Polgár-knabinoj havas 15 orajn olimpikajn medalojn.



JUDIT: 2735
ZSUZSA: 2567
ZSÓFIA: 2500




Arpad E. Elo: The Rating of Chess Players Past and Present. New York, 1978.

| Age | A. Karpov | Polgár Zsuzsa | Polgár Zsófia | Polgár Judit |
|---|---|---|---|---|
| learnt chess | 4 | 4 | | |
| 3rd category | 7 | 7 | | |
| 2nd category | 9 | 8 | | |
| 1st category | 9 | 10 | | |
| candidat master | 11 | 11 | | |
| master | 15 | 13 | 12 | 10 |
| international master | 18 | 13 | 14 | 11 |
| grandmaster | 19 | 19/20 | 14 (1) | 13/15 |

(1) GM normo + 1,5 poentoj

*(O'Connell and Adams: The Games of Anatolij Karpov, 1974.)*

## La plej bonaj rezultoj en la olimpiadoj


| Nr | Year | Place | | Player | | Board | W | D | L | Performance Perc. | Performance rating |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | 1927 | London | (GB) | Maroczy | (HU) | 1 | 6 | 6 | 0 | 75 | 2595 |
| 2 | 1928 | The Hague | (NL) | Kashdan | (US) | 1 | 12 | 2 | 1 | 88.2 | 2646 |
| 3 | 1930 | Hamburg | (DE) | Rubinstein | (PL) | 1 | 13 | 4 | 0 | 88.2 | 2694 |
| 4 | 1931 | Prague | (CS) | Alekhine | (FR) | 1 | 10 | 7 | 1 | 75 | 2606 |
| 5 | 1933 | Folkestone | (GB) | Alekhine | (FR) | 1 | 8 | 3 | 1 | 79.2 | 2653 |
| 6 | 1935 | Warsaw | (PL) | Dake | (US) | 4 | 13 | 5 | 0 | 86.1 | 2610 |
| 7 | 1937 | Stockholm | (SE) | Kashdan | (US) | 3 | 13 | 2 | 1 | 87.5 | 2639 |
| 8 | 1939 | Buenos Aires | (AR) | Engels | (DE) | 3 | 12 | 4 | 0 | 87.5 | 2641 |
| 9 | 1950 | Dubrovnik | (YU) | Bolbochan | (AR) | 2 | 9 | 5 | 0 | 82.1 | 2661 |
| 10 | 1952 | Helsinki | (FI) | Smyslov | (SU) | 2 | 8 | 5 | 1 | 80.8 | 2671 |
| 11 | 1954 | Amsterdam | (NL) | Keres | (SU) | 4 | 13 | 1 | 0 | 96.4 | 2751 |
| 12 | 1956 | Moscow | (SU) | Bronstein | (SU) | 4 | 9 | 4 | 0 | 84.6 | 2647 |
| 13 | 1958 | Munich | (DE) | Tal | (SU) | 5 | 12 | 3 | 0 | 90 | 2667 |
| 14 | 1960 | Leipzig | (DD) | Petrosian | (SU) | 6 | 11 | 2 | 0 | 92.3 | 2651 |
| 15 | 1962 | Varna | (BG) | Petrosian | (SU) | 2 | 8 | 4 | 0 | 83.3 | 2685 |
| 16 | 1964 | Tel Aviv | (IL) | Portisch | (HU) | 1 | 9 | 6 | 1 | 75 | 2688 |
| 17 | 1966 | Havana | (CU) | Fischer | (US) | 1 | 14 | 2 | 1 | 88.2 | 2822 |
| 18 | 1968 | Lugano | (CH) | Petrosian | (SU) | 1 | 9 | 3 | 0 | 87.5 | 2762 |
| 19 | 1970 | Siegen | (DE) | Spassky | (SU) | 1 | 7 | 5 | 0 | 79.1 | 2665 |
| 20 | 1972 | Skopje | (YU) | Tal | (SU) | 4 | 12 | 4 | 0 | 87.5 | 2759 |
| 21 | 1974 | Nice | (FR) | Karpov | (SU) | 1 | 10 | 4 | 0 | 85.7 | 2761 |
| 22 | 1976 | Haifa | (IL) | Timman | (NL) | 1 | 6 | 5 | 0 | 77 | 2689 |
| 23 | 1978 | Buenos Aires | (AR) | Kortchnoi | (CH) | 1 | 7 | 4 | 0 | 81.8 | 2728 |
| 24 | 1980 | La Valetta | (MT) | Karpov | (SU) | 1 | 6 | 6 | 0 | 75 | 2729 |
| 25 | 1982 | Lucerne | (CH) | Ljubojevic | (YU) | 1 | 9 | 4 | 1 | 78.6 | 2771 |
| 26 | 1984 | Thessaloniki | (GR) | Nunn | (GB) | 2 | 9 | 2 | 0 | 90.9 | 2809 |
| 27 | 1986 | Dubai | (AE) | Kasparov | (SU) | 1 | 7 | 3 | 1 | 77.3 | 2753 |
| 28 | 1988 | Thessaloniki | (GR) | Kasparov | (SU) | | | | | | 2877 |
| női | 1988 | Thessaloniki | (GR) | Polgár J. | (HU) | | | | | | 2694 |



## La plejbonaj resultoj en la ŝakturniroj

| Nr | Year | Place | | Player | | W | D | L | Performance Perc. | Performance rating |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | 1970 | Buenos Aires | (AR) | Fischer | (US) | 13 | 4 | 0 | 88 | 2850 |
| 2 | 1979 | Waddinxveen | (NL) | Karpov | (SU) | 4 | 2 | 0 | 83 | 2848 |
| 3 | 1919 | Hastings | (GB) | Capablanca | (CU) | 10 | 1 | 0 | 95.4 | 2826 |
| 4 | 1975 | Manilla | (PH) | Torre | (PH) | 3 | 3 | 0 | 75 | 2826 |
| 5 | 1983 | Niksic | (YU) | Kasparov | (SU) | 9 | 4 | 1 | 79 | 2814 |
| 6 | 1930 | San Remo | (IT) | Alekhine | (FR) | 13 | 2 | 0 | 93.3 | 2812 |
| 7 | 1986 | Brussels (Ohra) | (BE) | Kasparov | (SU) | 6 | 3 | 1 | 75 | 2809 |
| 8 | 1948 | The Hague, Moscow | (SU) | Botvinnik | (SU) | 10 | 8 | 2 | 70 | 2799 |
| 9 | 1982/83 | Hastings | (GB) | Vaganian | (SU) | 9 | 4 | 0 | 84.6 | 2794 |
| 10 | 1970 | Mallorca | (ES) | Fischer | (US) | 15 | 7 | 1 | 79.5 | 2792 |
| 11 | 1979 | Riga | (SU) | Tal | (SU) | 11 | 6 | 0 | 82.4 | 2782 |
| 12 | 1952 | Stockholm | (SE) | Kotov | (SU) | 13 | 7 | 0 | 82.5 | 2775 |
| 13 | 1959 | Bled | (YU) | Tal | (SU) | 16 | 8 | 4 | 71 | 2773 |
| 14 | 1984 | Tilburg | (NL) | Miles | (GB) | 5 | 6 | 0 | 77 | 2773 |
| 15 | 1987 | Brussels | (BE) | Ljubojevic | (YU) | 6 | 5 | 0 | 77 | 2773 |
| 16 | 1980 | Bad Kissingen | (DE) | Karpov | (SU) | 3 | 3 | 0 | 75 | 2768 |
| 17 | 1984 | Wijk aan Zee | (NL) | Beliavsky | (SU) | 7 | 6 | 0 | 76.9 | 2767 |
| 18 | 1987 | Amsterdam | (NL) | Timman | (NL) | 2 | 4 | 0 | 66.7 | 2767 |
| 19 | 1980 | Bugojno | (YU) | Karpov | (SU) | 5 | 6 | 0 | 73 | 2766 |
| 20 | 1922 | London | (GB) | Capablanca | (CU) | 11 | 4 | 0 | 86.6 | 2760 |
| 21 | 1987 | Leningrad | (SU) | Vaganian | (SU) | 4 | 8 | 0 | 67 | 2760 |
| 22 | 1918 | Berlin | (DE) | Lasker | (DE) | 3 | 3 | 0 | 75 | 2758 |
| 23 | 1973 | Portonoz | (YU) | Portisch | (HU) | 3 | 5 | 0 | 68.8 | 2757 |
| 24 | 1970 | Zagreb | (YU) | Fischer | (US) | 10 | 6 | 1 | 77 | 2756 |
| 25 | 1924 | New York | (US) | Lasker | (DE) | 13 | 6 | 1 | 80 | 2755 |
| 26 | 1987 | Belgrade | (YU) | Ljubojevic | (YU) | 5 | 6 | 0 | 72.7 | 2755 |

Zsófia, Romo ŝakturniro, 1985: 2900
Judit, Madrido ŝakturniro, 1992: 2850



Zsuzsa kaj Zsófia, 1974



Fratinoj, 1977











Zsuzsa, 1973; Zsófia, 1979; Judit, 1983



Zsófia, 1979



Zsófia kaj Judit, 1983






Zsuzsa, 1973



Zsófia kaj Judit, 1985




Judit, 1984




Zsófia, 1983







László Polgár kun siaj filinoj, 1984



László kaj Judit, 1989




Klára, László kaj Zsófia, 1985




Blindludo, 1985





Zsófia, blindludo, 1989




László Polgár, 1985





Klára kaj László – gepatroj de la tri geniaj filinoj, 1990



Judit, 1984



Judit, 1989







Zsuzsa, 1995



1990



Judit, 1989



Judit kaj László, 1989






Olimpiado 1988
Tessaloniki



Zsófi post la tutmonda
rekordo, Romo, 1985



Judit–Karpov kaj Zsuzsa–Korchnoj dum analizo



Zsófi kaj Pál Benkő dum konkurso





Kun Barbara kaj George Bush, Budapeŝto, 1989



Ĉefministro Ehud Barak, Zsófi kaj Yona Kosashvili



Mondĉampionino. 1996





1995






Klára kiel avino kun la genepoj



Tri generacioj



Endre Farkas kaj László Polgár, 1989



1. Nevelj zsenit! Budapest, 1988.
2. Švako dete je genije! Novi Sad, 1990. *(szerb)*
3. Zsuzsa, Zsófia, Judit Polgar tactics. Budapest, 1991 *(angol)*
4. Le phénomène Polgar ou l'art de former des génies. Bruxelles, 1991. *(francia)*
5. Chess Training in 5333+1 Positions. Köln, 1994. *(több világnyelven)*
6. Minisakk – Minichess. Budapest, 1994. *(angol – magyar)*
7. Reformchess. Köln, 1977. *(több világnyelven)*
8. Chess Middlegames. Köln, 1998. *(több világnyelven)*
9. Chess Endgames. Köln, 1999. *(több világnyelven)*
10. Salom Haver – Zsidó származású magyar sakkozók antológiája. Budapest, 2004.
11. Ne Ölj! – Harc a terrorizmus ellen. Budapest, 2004. *(magyar – eszperantó)*
12. Polgar Superstar® Chess – Szupersztár® Csillagsakk. Sakk – humor. Budapest, 2004. *(angol – magyar)*
13. *Pe***chess** *ember, el***chess***te?!*, Budapest, 2004. Színdarab – viccjáték – humor *(magyar – eszperantó)*
14. Betűfeladványok. Budapest, 2004. *(magyar – eszperantó)*
15. Királynők és királyok. Sakk – szerelem – szex – humor. Budapest, 2004.
16. Hatágú csillag. Sakk – humor. Budapest, 2004.
17. Gyerek – gyalog. Sakk – humor. Budapest, 2004.
18. Sakkmat(t)ek. Sakk – humor. Budapest, 2005.
19. Aristokratiko. Sakk – szex – humor. Budapest, 2005. *(eszperantó – angol – magyar)*
20. Blanka (♕, ♕♘, ♕♗, ♕♖, ♖♖, ♖♗, ♖♘, ♗♗, ♘♘, ♗♘) Miniatűr sakkfeladványok. Budapest, 2005. *(eszperantó – angol – magyar)*
21. Biztonság. Sakk – humor. Budapest, 2005.
22. Queens. Budapest, 2005. *(angol – magyar)*
23. Polgár Szupersztár® 6x6 sakk kezdőknek I. Sakk – humor. Budapest, 2005. *(angol – magyar)*
24. Polgár Szupersztár® 6x6 sakk. II. Sakk – humor. Budapest, 2005. *(angol – magyar)*
25. Eduku geniulon! Budapest, 2004. *(eszperantó)*
26. Tréfacsiná-ló – Knight. Sakk –szex – humor. Budapest, 2005. *(angol – magyar)*
27. Futó kaland – Bishop. Sakk – szex – humor. Budapest, 2005. *(angol – magyar)*
28. Hódít6 a szupersztár csillagsakk. Sakk – szív – szex – humor. Budapest, 2005 *(angol – magyar)*
29. Hódít6 a 6x6. Sakk – szív – szex – humor. Budapest, 2005. *(angol – magyar)*
30. Eszperantó és sakk. Sakk – humor. Budapest, 2005.
31. „Serĉu en sako – ŝercu en ŝako". Ŝercoj, karikaturoj kaj ŝakvortaro. Budapest, 2005. *(eszperantó)*
32. Sagacaj saĝaĵoj. Proverboj, aforismoj kaj citajoj.Karikaturoj. Budapest, 2005. *(eszperantó)*

***Kárpáti Tamás: Partik – Perek – Pofonok. Polgár dosszié 1974–1989. Budapest, 1989. (Egy fejezet: Polgár László: „Hogyan neveljünk zsenit?")

*Előkészületben:*

33. Krimi. Budapest, 2006.
34. Kedvenc játszmáim – Polgár lányok válogatott gyermekkori sakkjátszmái (4-től 16 éves korig). Budapest, 2006.
35. Polgár Szupersztár® 5x7 sakk. Budapest, 2006.
36. Polgár Szupersztár® játékok. Budapest, 2006.
37. Mártír sakkozók antológiája. Budapest, 2006.
38. Polgár lányok olimpiai,- és világbajnokok ellen. Budapest, 2006.



László Polgár

Vivas nuntempe iu en Hungario, kiu antaŭ pluraj jaroj anoncis, ke li estas en la posedo de tia personeckonstrua tekniko, kiu povas disvolvi la kapablojn imanentajn en la infanoj kun maksimuma – almenaŭ je gradoj pli bona ol la nuna – efikeco. Post tiu deklaro multaj moke ridetis, sed distordiĝis ilia ridetaĉo, kiam la tri filinoj de la nomita pedagogo aperis kiel ŝakfenomenoj sur la firmamento de ĉi tiu praa mensa sporto.

Por mi ne estas diskuteble, ke *Polgár* László kunmezureblas sur sia tereno nur kun *Teller* Ede, *Szentgyörgyi* Albert, *Gábor* Dénes, *Szilárd* Leó, *Neumann* János (eĉ, povas esti, ke la komparo estas honoriga ne por *Polgár* László.) Por mi estas nur unu afero nekomprenebla: kial ĉi tiu homo ne ricevis tuj institucian fonon, konstruaĵojn, ĉiaspecajn moralajn kaj materialajn subtenojn por establi geniedukan lernejon? Kial ni ne taksas lin konvene laŭ lia valoro? Kiom da centoj da pedagogoj, kiom da centoj da jaroj devus labori por tio, kion *Polgár* László realigis dum dek jaroj?

Kaj ĉu ni ne devus diri al ni post ĉio ĉi: ni estas nacio indiferente rezignanta pri geniaj spiritaj atingoj, generacioj de geniaj gefiloj, malŝparanta sian futuron, mallonge: lando de malŝparantaj patroj?

(Szőcs Géza: Polgár aŭ la malŝparemaj patroj. Perdita tuteco. Red. *Tóth* László, Kortárs Kiadó, Budapest, 1994)



9789638653109